

EL POPOLO CINIO

中国新闻

4 1988





Ekskursantoj

Avino kaj nepo



VIVO DE ORDINARAJ ĈINOJ

Printempa ekskurso de tibet-naciecanoj

Fotoj de BAŬ ŜJAŬJONG

La tibet-naciecanoj loĝantaj sur la altebenaĵo en la okcidenta Junnan-provinco havas la kutimon ekskursi en printempo. Kiam venas printempo, reprosperiĝas herbejo kaj disvolviĝas floroj, tieaj tibet-naciecanoj, ĉu viroj ĉu virinoj, ĉu junaj ĉu maljunaj, en festaj kostumoj rajdas al herbejo kunportante sekalvinon,

buteran teon kaj aliajn frandaĵojn. Ili starigas tendojn por prepari piknikon.


Tage junaj paŝtistoj okazigas rajdkonkurson kaj nokte gejunuloj dancas la tradicion Gŭoĝŭang-dancon. La gaja kanto kaj muziko disportiĝas en la nokta ĉielo.



Gaja renkontiĝo

Ludo sur ĉevalo





Tendo en tibeta stilo



Amikaj knabinoj

ENHAVO

SUR LA KOVRILO:

Tibeta junulino

Foto de ĜIN JAŬŬEN

VIVO DE ORDINARAJ ĈINOJ:

Printempa ekskurso de tibet-
naciecanoj

Fotoj de BAŬ ŜJAŬJONG

Nuntempaj porcelanaĵoj

Fotoj de ĜAŬ ĜISŬO

Vido en Lhasa

Fotoj de JAŬ ŬEN

kaj TAŬ PENG

SUR LA DORSKOVRILO:

[ĈINAJ POŝTMARKOJ]

Drako

- 2 Varman gratulon al UEA okaze de ĝia 80-jariĝo
- 2 Demokratiigo en Ĉinio
- 14 La ĉina aŭtoindustrio ĉe turnopunkto
- 6 Ĝjaŝing, perlo sur Hangĝjahu-ebenaĵo
- 55 VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (16): Grandiozaj Tri Gorgoĵoj
- 17 La E-movado de Ĉangĉun en disvolviĝo
- 22 Karmemore al prof. Ivo Lapenna
- 20 Por akceli interkomprenon kaj amikecon
- 23 POR KOMENCANTOJ: Malgranda montvilaĝo
- 24 ESP-NOVAĴOJ
- 27 Internacia konferenco por antaŭenpuŝi akupunkturon kaj mokson
- 29 POR VIA SANO: Masaĝo (V)
- 30 Pri la envazaj miniaturaj fruktarboj de Ĉinio
- 37 Krei sian figuron per siaj verkoj
- 39 Gu Heng kaj Li Ŝjangnan
- 44 ĈINA LITERATURO:
Granda realisma poeto Du Fu
Elektitaj poemoj de Du Fu
- 50 Diferenco kaj kompreno
- 12 ĈINAJ MOROJ: Templo de homaj prapatroj kaj argilaj bestoj
- 67 Tibeto — nedisigebla parto de la ĉina teritorio
- 19 2-a konkurso por teatraĵo de EVA
- 63 Agrikulturo en la estonteco
- 52 ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Filoj de drakoj en la ĉina mito
- 49, 66 KURANTAJ AFEROJ
- 54 INTER NI: Pri apliko de Esperanto kaj kontaktiĝo per ĝi
- 19, 26, 62 KORESPONDI DEZIRAS
- 65 Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

JARABONTARIFO	Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00		
Aŭstralio	\$A	15.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	1500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	14.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugaliao	Esc	1100			

Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 8.00 US\$ 10.00 Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 5.00 US\$ 6.50

Demokratiigo en Ĉinio

La Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio estas la plej supera organo de ŝtata potenco, en kiŭ la popolaj reprezentantoj diskutas pri ŝtataj aferoj kaj faras leĝojn. Iuj komparas ĝin kun parlamento de okcidentaj landoj.

Kiel raportisto, mi havis ŝancon lastatempe interparoli kun reprezentantoj de la Tutlanda Popola Kongreso. Samtempe kun tio, mi pripensas la demandojn multe diskutatajn eksterlande: Kio estas la esenco de la ĉina demokratio? Kia estas ĝia perspektivo? Kian vojon ĝi trairis?

KVALITA ŜANĜIĜO

Foliuminte la nomliston de ĉirkaŭ 3 000

reprezentantoj de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso, mi trovis, ke inter ili estas gvidantoj, generaloj, eruditoj, laboristoj, kamparanoj kaj nacimalplimultanoj, kiujn mi iam intervjuis. Iuj el ili estas meritoplenaj postvivantoj de revoluciaj militoj kaj laboruloj, kiuj baraktis en mizero en la malnova socio. La Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso nombras pli ol 150 membrojn, inter kiuj Ŝi Lajhe, kamparano de Liŭĝuang-vilaĝo de Henan-provinco, estis dungita kamplaborulo antaŭ la Liberigo; Tjemur Daŭamajti (ujguro), prezidanto de la Ŝinĝjang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, iam vivis el pruntoj; prof. Pan Dakuj, respondeculo de la Ĉina Demokratia Ligo en

Varman gratulon al UEA okaze de ĝia 80-jariĝo

Pekino, 1988 02 01

A1: Universala Esperanto-Asocio

Karaj kolegoj,

Okaze de la 80-a datreveno de la fondiĝo de la Universala Esperanto-Asocio, en la nomo de la ĉina esperantistaro kaj de ni mem, ni esprimas al vi varman gratulon!

La Universala Esperanto-Asocio, per siaj obstinaj kaj senlacaj laboroj kaj penado dum la pasintaj 80 jaroj, atingis ĝojigajn progresojn en la disvastigado kaj uzado de Esperanto kaj faris siajn pozitivajn kontribuojn por forigi la lingvajn barojn en la internacia komunikado, por akceli la interkompreniĝon kaj amikecon inter ĉiuj popoloj kaj por defendi la mondpacon. La faktoj elokvente pravas, ke "UEA fariĝis la plej grava institucio de nia movado".

Ni kore deziras, ke la Universala Esperanto-Asocio pli kresku, pli fortiĝu kaj akiru pli grandajn sukcesojn en la gvido de la Esp-movado kaj en ĉiuj siaj laboroj, en la dua jarcento de Esperanto.

De la lastaj kelkaj jaroj ni havas tre bonajn kunlaborajn rilatojn kun UEA. La sukcesa 71-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Pekino en 1986 ĝuste estas frukto de tiaj kunlaboraj rilatoj. Ni sincere esperas, ke la amikaj kunlaboraj rilatoj inter ni kaj UEA plue disvolviĝos kaj fortiĝos.

Kresku kaj floru nia komuna afero!

**Ĉina Esperanto-Ligo
Redakcio de "El Popola Ĉinio"**

Siĉŭan, multfoje ekde 1919 partoprenis en manifestacio por demokratio; Ju Ĉiŭli, generalo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, aliĝis al la Ĉina Laborist-Kampanara Ruĝa Armeo en la aĝo de 15 jaroj kaj perdis sian maldekstran brakon en batalo. . .

La ĉina popolo faris longtempan penigan batalon kontraŭ la klasa subpremado kaj ekspluata sistemo kaj por demokratio kaj libereco. Post enkonduko de marksismo kaj la okcidenta moderna ideologio en Ĉinion, la ĉina popolo alvokis demokration kaj sciencan en la kontraŭimperiisma kaj kontraŭfeŭdisma Movado de la 4-a de Majo 1919. Laŭ la okcidenta vidpunkto demokratio enhavas liberecojn de parolo kaj kredo kaj liberecon de saviĝo el malriĉeco kaj timo. Tamen por la ĉina popolo la plej reala libereco estis tiu de vivo, tiu de saviĝo el malriĉeco, katastrofo, milito, subpremado kaj ekspluatado. Dum sia vizito al Ĉinio en la 30-aj jaroj la usona ĵurnalisto Edgar Snow surpriziĝis, ke miloj kaj dekmiloj da kampanoj mortis de malsato. Fakte tio estis ofte videbla en la malnova Ĉinio. En 1942 katastrofo atakis Liŭĝŭang, la hejmvilaĝon de Ŝi Lajhe. El la 570 loĝantoj pli ol 70 mortis de malsato kaj 37 estis forvenditaj. 80% de la ceteraj vilaĝanoj fuĝis de la katastrofo. Ĉiuj parencoj de lia patrino mortis en fuĝo. Historia libro notis, ke en Ĉinio okazis naturaj katastrofoj sinsekve de 1927 ĝis 1937. En 1928 la nombro de la plagitaj ĉinoj atingis cent milionojn, kaj en 1929 ĝi kreskis. Tiam Ĉinio havis nur 440 milionojn da loĝantoj. En 1929-1932 jam 17.7 milionoj da loĝantoj mortis de malsato en la provincoj Ŝenŝji,

Henan, Gujĝoŭ, Gansu, Ŝanŝji, Siĉŭan kaj Ŝandong.

La venko de la novdemokratia revolucio en 1949 finis la regadon de la ekspluata klaso super la laboranta popolo kaj efektivigis la popol-demokratian diktaturon. Tio estis kvalita impeto de la ĉina demokratiigo. En 1956 Ĉinio fundamente plenumis la taskon transformi la privatan posedsistemon de la produktaj rimedoj, abolis la ekspluatan sistemon kaj metis la ekonomian bazon por disvolvi la socialisman demokration. En 1954 okazis la Unua Tutlanda Popola Kongreso, kio estis komenco de demokratia elektado de la organo de ŝtata potenco. La ŝtata potenco apartenas kaj servas al la popolo, kio sendube estas granda progreso de la demokratia konstruado. Tamen la influo de la feŭda ideologio formita en la jarmiloj ne povas mem malaperi.

ZIGZAGOJ

La malnova Ĉinio postlasis multe da tradicioj de la feŭda aŭtokratio, sed malmulte da tradicioj de demokratia leĝa sistemo. En la reala vivo de la nova Ĉinio oni estas ne nur atakata de malbona ideologio, sed ankaŭ ofte suferanta pro nesufiĉa kono, en la pasintaj pli ol 30 jaroj, pri likvido de la feŭdaj postrestaĵoj kaj pro malforta batalo kontraŭ ili. Rezulte de tio okazis la tumulta kultura revolucio de 1966 ĝis 1976.

Analizante la historion, Ĝang Tengŝjaŭ, reprezentanto de la Tutlanda Popola Kongreso kaj

Membroj de la Konstanta Komitato de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso diskutas pri iu leĝo, antaŭ ol ĝin aprobi.



vicrektoro de la Ĉina Popola Universitato montris: "Se tiam la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio praktikus minimume demokratian centralizismon, la popolo kutimiĝus al demokratio kaj la ŝtato havus minimuman leĝan dignon, do la kultura revolucio estus malfacile iniciatebla. Suferinte tiun turmentadon, la popolo fortigis sian demokratian ideologion, sekve en la lastaj jaroj rapide progresis la konstruado de la socialisma demokratia leĝa sistemo. La historia progreso devas esti fundamentita sur la popola politika konscio."

Tamen oni ne devas subtaksi la influon de la restaĵo de la feŭda ideologio. Nemalmultaj popolaj reprezentantoj en sia parolo kritikis burokratismon, fenomenon de superflua personaro, privilegion, patriarkan koncepton, luksemon, malŝparemon, diboĉadon, regaladon kaj donacadon je ŝtata pago ktp. kaj proponis efikajn rimedojn, inkluzive ellaboron de necesaj leĝoj kaj dekretoj, por likvidi la suprajn malbonaĵojn.

LEĜDONO

Post kiam la tutlanda laboro sin turnis ĉefe al la socialisma moderniga konstruado en la fino de 1978, oni metis en la tagordon la problemon perfektigi la socialisman demokration kaj leĝan sistemon. Oni emfazas, ke ne estas modernigo sen

demokratio, necesas sistemigi kaj leĝigi demokration kaj necesas serioze antaŭenpuŝi demokratiigon de la partia kaj ŝtata politika vivo, la ekonomia administrado kaj la tuta socia vivo. La popola kongreso jam fariĝis reala ŝtatpotenca institucio kaj leĝdona organo, kaj ne plu estas mokita kiel "kaŭĉuka stampilo". Tio estas progreso de demokratiigo kun historia signifo.

En la pasintaj 9 jaroj la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso ellaboris novan konstitucion kaj 63 leĝojn. La popolaj kongresoj kaj iliaj konstantaj komitatoj en diversaj provincoj, aŭtonomaj regionoj, municipoj kaj kompare grandaj urboj ellaboris pli ol mil lokajn leĝojn kaj dekretojn.

Nun kaj la tutlanda kaj la lokaj popolaj kongresoj perfektigis la organojn de siaj konstantaj komitatoj por plenumi la funkcion kontroli la laborojn de la samnivelaj registaroj, juĝejoj kaj prokurorejoj. En la lastaj jaroj ĉiuj sesioj de la Tutlanda Popola Kongreso serioze uzis siajn rajtojn diskuti kaj sankcii la laborraportojn de la registaro, juĝejoj kaj prokurorejo, planon de la nacia ekonomio, finanĉan budĝeton kaj finan kalkulon.

Antaŭ ol doni ĉiun projekton de leĝo, la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso devas fari sisteman esploradon en diversaj lokoj kaj la koncernaj departementoj de la

Reprezentantoj de la Naŭa Popola Kongreso de Pekino balotas por elekti novan estraron de la urbo.



centra registaro. Post kiam la projekto estas farita, la komitato devas plue aŭskulti opiniojn en diversaj lokoj kaj departementoj kaj okazigi apartajn kunsidojn por diskuti. Kiam la komitato disdonas la projekton al siaj membroj, ĝi ankaŭ liveras grandan kvanton da materialoj, i.a. pri koncernaj artikoloj el leĝoj de aliaj landoj.

Hoŭ Ŝjueju, membro de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj fama ekologo, diris: "Mi trovis, ke la Konstanta Komitato plibonigas sian laboron kaj demokratia atmosfero pli kaj pli kreskas. Ofte la membroj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso varme diskutas pri leĝoprojekto, bone studas la verojn pozitivan kaj negativan kaj unuigas la konon antaŭ voĉdonado. Voĉdonado per levo de mano estas anstataŭita de tiu per premo de komputila butono. Nun ĉiuj kuraĝas diri veron kaj foje-foje modifas kaj perfektigas la projekton laŭ la komuna opinio, ankaŭ mi preferas kritikojn." En la 24-a Sesio de la Konstanta Komitato de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso okazinta januare de 1988 oni kvarfoje diskutis pri la "Leĝo de la Publikaj Industriaj Entreprenoj de la Ĉina Popola Respubliko (projekto)". Ĝi estis unuafoje donita al diskutado en 1985, la nova projekto estis modifita laŭ la spirito de la 13-a Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio okazinta antaŭ nelonge kaj laŭ la opinioj prezentitaj de diversaj lokoj kaj departementoj. Laŭ la decido de la 24-a Sesio la plena teksto de la projekto jam estis publikigita en ĵurnaloj por peti opiniojn de la konstantaj komitatoj de la popolaj kongresoj kaj la popolaj registaroj ĉe diversaj niveloj, kaj tiujn de diversrondaj personoj kaj kadroj, laboristoj, gvidantoj de publikaj entreprenoj kaj fakuloj de ekonomiaj kaj juraj rondoj.

ELEKTADO

Nun voĉdonantoj povas senpere elekti ne nur subdistriktajn, sed ankaŭ distriktajn kaj guberniajn reprezentantojn por la popola kongreso. Dum elektado, enoficigo kaj eksigo de samnivelaj registaraj gvidantoj, la diversnivelaj popolaj kongresoj kaj iliaj konstantaj komitatoj ne funkcias kiel "voĉdona maŝino". Laŭ difinoj de la leĝo iuj lokoj ekpraktikis elekton el pli da kandidatoj, kaj okazis, ke iuj kandidatoj ne estis elektitaj. Printempe de 1987 la Popola Kongreso de Junnan-provinco plenumis elekton laŭ proceduron por la prezidanto de la provinca supera juĝejo, kiu jam tenis la oficon 3 monatojn, sed ne estis elektita pro manko de jura talento, dum alia taŭga kandidato proponita de 13 reprezentantoj estis elektita.

La Popola Kongreso de Ŝjamen kaj ĝiaj distriktoj kaj gubernioj komencis ŝanĝi siajn membrojn en junio de 1987. Antaŭ la kongreso reprezentantoj



Kampanoj de Ĝuojang-gubernio, Anhuj-provinco, lernas sciojn pri leĝo.

okazigis kunsidojn kaj disdonis enketilojn por peti opiniojn de voĉdonantoj pri la laboro de la registaro kaj pri la kandidatoj de la sekvanta registaro. Post kiam la kongreso preparis nomliston de kandidatoj por gvidanteco, iuj reprezentantoj denove petis opiniojn de la voĉdonantoj, kaj rezulte 9 el la kandidatoj proponitaj de koncernaj organizoj ne estis elektitaj, kaj la kandidatoj kune proponitaj de la reprezentantoj estis elektitaj.

Prof. Pan Dakuj, kiu magistriĝis pri politiko en Usono en la fino de la 20-aj jaroj kaj funkcias kiel konsilisto de la Ĉina Politika Asocio, diris: "Mi opinias, ke la Komunista Partio de Ĉinio, kiel kerna gvidforto, formiĝis en la historio de la longtempa revolucia batalo. Hodiaŭ sendube ne ekzistas lukto pro regpotenco inter la demokratiaj partioj kaj la Komunista Partio, sed la diversaj partioj sub la gvido de la Komunista Partio bone kunlaboras kaj kune konstruas socialismon. La Komunista Partio havas pli ol 46 000 000 membrojn, dum la aliaj 8 demokratiaj partioj kaj la Industria kaj Komerca Federacio 250 000 membrojn. Se laŭ la proporcio de la nombro de la membroj la demokratiaj partioj povas gajni nur tre malmultajn sidlokojn en la kongreso. Nun diversflankaj personoj demokratie diskutas kaj konsiliĝas pri la ŝtataj aferoj kaj ilin kontrolas. Ili libere parolas, kolektas utilajn opiniojn kaj fine ellaboras politikojn kaj leĝojn reprezentantajn la interesojn de la plejmulto de la popolo. Tio relative konformas al la realo de Ĉinio kaj rapidigas la paŝojn. Tio estas vera demokratio por la plejmulto."

DISKONIGO DE LEĜOJ


Novembre de 1985 la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso faris rezolucion por popularigi elementajn sciojn pri leĝoj inter la civitanoj. En pli ol unu jaro 420 milionoj da homoj jam partoprenis la lernadon. Ili konsistigas 56% de

(Daŭrigo sur p. 26)

Ĝjaŝing, perlo sur Hangĝjahu-ebenaĵo

Teksto de CAŬ BAJLONG

Fotoj de CAJ MING



En Ĝjaŝing

Mia unua impresio pri Ĝjaŝing estas, ke tuj kiam la trajno atingis la stacion, la pasaĝeroj konkure elvagoniĝis por aĉeti bongustajn *zongzi*-ojn (rizo envolvita en bambuaj folioj) kaj verdajn senkornajn trapojn. Ĉi tiuj estas famaj produktaĵoj de Ĝjaŝing kun originala loka gusto.

Ĝjaŝing estas fama akvoriĉa urbo kun historio de pli ol 2 000 jaroj. Ĝi situas sur la riĉa Hangĝjahu-ebenaĵo en la mal-supra baseno de Jangzi-rivero, najbarante oriente al la plej granda ĉina industria urbo Ŝanhajo kaj okcidente al la fama pitoreska urbo Hangĝoŭ. Ĝi produktas fisĉojn, rizon kaj

tekstilaĵojn kaj famas pro silko. Kun totala areo de ĉ. 4 000 kvadrataj kilometroj kaj pli ol 3 milionoj da loĝantoj ĝi ampleksas la urban kvartalon kaj antaŭurbon, la urbon Hajning kaj la guberniojn Tongŝjang, Ĝjaŝan, Pinghu kaj Hajjan. Tie troviĝas la fama pitoreskejo Nanhu-lago kaj la monda miraklo "Fluso de Hajning". En 1983 Ĝjaŝing fariĝis urbo malfermita al aliaj landoj.

NANHU-LAGO

Mi vizitis Nanhu-lagon sude de Ĝjaŝing kaj proksime al ĝia kvartalo. La lago estas tre bona loko por ripozo kaj turismo de oficistoj kaj laboristoj. La vasta

lagsurfaco povas ankaŭ reguligi klimaton. La lagbordojn ombras verdaj arboj. Malgranda insulo en la lago estas atingebla per plezurboato. Sur la insulo staras la fame konata antikva Nebul-pluva Turo. Ĉirkaŭe estas kioskoj, longa koridoro, stalagmitoj kaj kavernoj. Mi vizitis la lokon en pluveto. De malproksime mi vidis la turon en nebulo, duonvideblan kaj unikan.

Sur Nanhu-lago kuŝas boato. Julie de 1921 en ĝi oni sekrete pasigis la lastan tagon de la 1-a Tutlanda Kongreso de la Komunistista Partio de Ĉinio.

En Nanhu-lago oni kultivas trapojn. Trapo-rikoltantoj movas lignajn kuvojn inter trapaj folioj. La tieaj trapoj estas rondaj kaj senkornaj, kun verda ŝelo kaj blanka karno bongusta.

En Ŝjuĝja-vilaĝo ĉe Nanhu-lago blankaj domoj el brikoj kaj tegoloj staras en verda arbaro kaj sin montras tre kvietaj. La vilaĝo havas pli ol 150 familiojn kaj pli ol 400 loĝantojn. Jam en 1983 pli ol 26 hektaroj da akvosurfaco estis dividitaj por laŭkontrakta familia kultivado de trapoj, kio multe altigis la aktivecon de la kultivantoj. La hektara produktokvanto en 1986 estis pli ol 10 500 kg. Vilaĝano Ŝju Liŭŝeng diris al mi, ke li kulturas ĉ. 0.5 hektaron laŭ kontrakto kaj enspezas pli ol 6 000 jŭanojn en unu jaro. Liaj edzino kaj filo laboras en fabriko funkciigata de la vilaĝo. La totala enspezo de lia

familio atingas pli ol 10 000 jŭanojn. Ĝi ankoraŭ ne estas la plej multa en la vilaĝo. Li diris, ke ĉiuj malnovaj kabanoj en la vilaĝo estis anstataŭigitaj per novaj brikaj tegolitaj domoj en la lastaj du jaroj. Al multaj familioj ne mankas televidilo, fridujo kaj elektra ventumilo.

FLUSO EN HAJNING

Kiam mi venis al Ĉjantang-rivero en Hajning, estis jam multaj rigardantoj sur la bordoj. De la antikveco fluso de Hajning estas nomata miraklo de Ĉinio. La 18-an de la oka monato laŭ la ĉina luna kalendaro Hajning estas bona loko por rigardi fluson. Ĝi najbaras sude al Ĉjantang-rivero kun buŝo en formo de klariono. Kiam tajdo leviĝas, marakvo enfluas en la 100-kilometre larĝan riverbuŝon. La tajdo iom post iom ruliĝas antaŭen. Pro la limigo de la mallarĝiganta river-surfaco, la barado de la mar- kaj riverfunda terenoj kaj la puŝo de malantaŭe, la muĝanta tajdo stariĝas rekte sur la rivero.

Posttagmeze, starante sur bordo, mi aŭdis muĝadon similan al tondro kaj iom post iom laŭtiĝantan kaj vidis en malproksimo 3-metran tajdon en longa vico same kiel multaj ĉevaloj galopantaj. Kiam la tajdo frapis la bordojn, la akveroj saltis pli ol 10 metrojn alten. La vestoj de nemalmultaj rigardantoj estis malsekigitaj.

Iu rigardanto diris al mi, ke ĉiujare en tiu tago la nombro de en- kaj eksterlandaj rigardantoj estas pli ol 100 000. Antaŭ kelkaj jaroj oni metis en maron kvin ferdratajn kaĝojn plenigitajn per ŝtonoj. La plej granda kaĝo entenis ok kubmetrojn da ŝtonoj kun pezo de 12 tunoj. Ĉiufoje, kiam venis tajdo, la kaĝoj estis forportitaj.

KAMPARANO-ENTREPRENISTO

Laŭ la reforma kaj pord-


malferma politikoj multaj kamparaj familioj de Ĝjaŝing per propra mono ekfunkciigis entreprenon. En Ganpu-urbeto de Hajjan-gubernio mi vidis kamparano-entrepreniston Ĝaŭ Ĵonghŭa. Antaŭ du jaroj li kune kun 5 kamparanaj familioj ekfunkciigis malgrandan tekstilan fabrikon per 25 000 jŭanoj. La fabriko produktas ĉefe dilonan gabardinon kaj tartanon. Por senĉese disvolvi la produktadon, li tre atentis krei novajn specojn de produktaĵoj. En 1986 la Ĉina Tekstila Universitato elfaris la unuajn ĉinajn specialajn fibrojn kun internacia nivelo, kiuj povas efike preventi brulon aŭ eksplodon kaŭzitan de statika elektro el vestoj portataj de homoj laborantaj en industriaj kaj scienc-esploraj departementoj. Por ricevi patenton, Ĝaŭ ne disdonis la profiton de la unua jaro, sed kolektis sufiĉe da mono. Li kaj liaj kamaradoj ne sciis teknikon, ili do engaĝis fakulojn el Ŝanhajo kiel konsilantojn. Kaj finfine ili sukcese kompletigis la produktan sistemon de elektrokonduktaj fibroj, ŝtofo kontraŭ statika elektro kaj laborvesto kontraŭ statika elektro.


Ĝaŭ Ĵonghŭa diris al mi, ke laborvesto kontraŭ statika elektro produktita de la fabriko estas 10-oble malpli multekosta ol tiu importita kaj ĝia kvalito ne estas malpli bona ol la lasta. Nun ĝi havas grandan debiton en 21 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio. La produktovaloro en tiu jaro atingis 2.6 milionojn da jŭanoj kaj la imposto kaj profito donitaj al la ŝtato 0.4 milionon da jŭanoj, 2-3-oble pli multe ol tiu en 1985. Nun la fabrikon funkciigas 39 familioj. La nombro de la oficistoj kaj laboristoj pliiĝis de 20 al 104. Oni ankaŭ konstruis novan fabrikdomon kun areo de 2 000 kvadrataj metroj.

VORTOJ DE VICURBESTRO

Vicurbestro Ŝju Ljangĝji konigis al mi la perspektivon de praktikado de la reforma kaj pord-malferma politikoj en Ĝjaŝing. Li diris, ke en la lastaj tri jaroj la politikoj jam efikis en Ĝjaŝing. La totala produktovaloro de industrio kaj agrikulturo kaj enspezo de la popolo en 1986 duobliĝis kompare kun tiu en 1983, kun jara meznombra kresko, de 26.05% kaj 27.06% respektive.

La Ĉinŝan-a Nuklea Elektrejo en konstruado





La Lernejo por Administrantoj de Ĝjaŝing-aj Provizaj kaj Disvendaj Kooperativoj

En la estonta konstruado Ĝjaŝing profitos sian nunan superecon, kun Ŝanhajo, Hangĝoŭ kaj la baseno de Tajhu-lago kiel centro kaj multe profitos la ekonomian superecon kaj scienc-teknikan forton de Ŝanhajo por disvolvi sian ekonomion. Iuj entreprenoj de Ŝanhajo, ekz. fabrikoj de led-kaj kaŭĉukŝuoj, silkaj tekstilaĵoj, vestoj, transformatoroj, laŭparoliloj, ĉiutage bezonataj kemiaj produktoj kaj fabrikoj petrol-kemiaj, ĉiuj horizontale ligiĝis kun tiuj de Ĝjaŝing. Ŝanhajo liveras al Ĝjaŝing ĉefe monon, teknologion, krudmaterialojn kaj ekipaĵojn por sufiĉe uzi ĝiajn fabrikdomojn kaj laborfortojn. Ambaŭ flankoj egale dividas la profiton kaj la danĝeron kaj sin bazas sur egalrajteco kaj reciproka utilo.

Vicurbestro Ŝju diris, ke la perspektivo de Ĝjaŝing estas brila. La Ĉinŝan-a Nuklea Elektrejo en Hajjan estas jam ekkonstruita. En 1989 oni plenumos la unuaperiodan konstruadon kun generatora kapacito de 300 000 kW. kaj sin preparas por konstrui termoelektrejon kun generatora kapacito de 2.4 milionoj da kW.

Trafike, la Ŝanhaj-Hangĝoŭ-a Ŝoseo rekonstruiĝas nun en modernan ŝoseon kun larĝo de

15 m. Ĝapu-haveno nomata "Granda Haveno de la Oriento" distancas nur 40 km. de la urbo, kaj oni povas konstrui tie plurajn ankrejojn por 10 000-tonelaj ŝipoj. Post la rekonstruado la flughaveno 7 km. for de la urbo povos servi al grandaj pasaĝeraj aviadiloj.

Fine la vicurbestro diris, ke estonte Ĝjaŝing fariĝos grava urbo por prilabori eksportaĵojn de

Kontrolo de la kvalito de litaĵoj



Ŝanhajo.

EN NOVE DISVOLVATA REGIONO

En la lasta tago de la intervjuo mi venis al nove disvolvata regiono de Ĝjaŝing okcidente de la Granda Kanalo. La regiono konsistas el kvartaloj de elektronika industrio, kulturo kaj eduko, kaj administrado kaj loĝado. Jam finkonstruiĝis plejparto de la projektitaj stratoj kaj altaj kaj mezaltaj etaĝdomoj. La alia parto estas streĉe konstruata. En la kvartalo de elektronika industrio estas ok fabrikoj elektronaj, preciz-instrumentaj, elektrekipaĵa k.a. Ili ĉiuj estas translokitaj tien de aliaj lokoj. La entreprenoj ne nur altigis la totalan produktovaloron de industrio de Ĝjaŝing kaj plimultigis specojn de elektronikaj produktaĵoj, sed ankaŭ grandigis la teknikan forton de Ĝjaŝing.

En la kvartalo de kulturo kaj eduko jam finkonstruiĝis domoj en institutoj eduka, financa kaj ekonomika, kie oni kulturos talentulojn aparte por praktiki la reforman kaj pord-malferman politikojn en Ĝjaŝing. ■



La Nebul-pluva Turo

Knabinoj rikoltas trapojn.





En Ĝjaŝing

Novaj domoj de kamparanoj
de Hajjan






Laborlinio en la transformatora fabriko Gūangming

Laboristino de la silktapiŝa fabriko Pinghu





Argilaj bestoj




ĈINAJ MOROJ

Templo de homaj prapatroj kaj argilaj bestoj

Teksto kaj fotoj de LI ĈJANG

Metiartistoj demonstras faradon de argilaj bestoj.



Ĉina legendo diras ke la tri prapatroj Fuŝji, Njuŭa kaj Ŝennong iam vivis en la nuna gubernio Hŭajjang de Henan-provinco. Fuŝji kaj Njuŭa estis gefratoj, kiuj estis prapatroj de la homaro. La legendo diras ke ĉi tie Njuŭa knedis homojn el argilo. Jam de la primitiva tempo la ĉina nacio adoris Fuŝji kaj Njuŭa kiel siajn prapatrojn kaj kultas ilin per plej solenaj ritoj.

Ankaŭ en Hŭajjang cirkulas la diro, ke antaŭ 2 500 jaroj, en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno, la fama ĉina antikva erudito Konfuceo foje vizitis Hŭajjang, esploris grandan kranion, trovitan de lokanoj kaj konstatis, ke ĝi estis la kranio de Fuŝji. Poste oni enterigis ĝin apud la urbo kaj konstruis por ĝi imperiestran maŭzoleon. Ĝi estas la fama Maŭzoleo de Fuŝji. Poste oni konstruis antaŭ la maŭzoleo templon, t.e. la Templon de Fuŝji kaj Njuŭa, kiun popolanoj nomas Templo de Homaj Prapatroj.

De antikve la ĉinoj kultas ilin kiel svatajn diojn kaj kiel prapatrojn. En ĉiu dua monato laŭ la ĉina luna kalendaro viroj kaj virinoj, venintaj de diversaj lokoj, kultas ilin, preĝante pri feliĉa geedziĝo kaj nasko de filo. Ĉi tie la antikva moro konserviĝis ĝis hodiaŭ. Ĉiujare oni okazigas antaŭ la Templo de Homaj Prapatroj foiron, kiu komenciĝas de la dua monato laŭ la ĉina luna kalendaro kaj daŭras unu monaton. Kompreneble, la nuna foiro estas multe pli enhavoriĉa ol la antaŭa. Tie ne nur rendevuiĝas geamantoj, sed ankaŭ okazas kulto al la homaj prapatroj kaj komercado.

En la tagoj de kulto de la prapatroj kaj foiro, ambaŭflanke de la antaŭe kvietaj stratoj etendiĝas du vicoj da standoj, kiuj formas grandan bazaron. La templo estas plena de homoj, iuj aĉetas tie faskojn da incenso, papere faritajn kultajn tabulojn por la prapatroj, petardon kaj



Foiro en la Templo de Homaj Prapatroj

paperajn monerojn por dediĉi ilin al Fuŝji kaj Njuŭa.

Meze de la ĉefa halo de la templo estas la statuo de Fuŝji en sida pozo. La statuo havas imperiestran aspekton faritan laŭ imago de posteuloj, sed ne laŭ la legendo.

En la foiro standoj de argilaj figuroj estas plej multaj. Estas allogaj la provincaj, groteskaj vulgaraj ludiloj, kiujn oni nomas argilaj hundoj. Ili tre plaĉas al la vizitantoj.

Argila hundo estas la ĝenerala nomo de diversaj argilaj bestformaj ludiloj, kiaj simieto kun persiko, tigo kun pajla ĉapo, streptopelio kun misforma beko, dukapa hundo, raneto, birdeto, testudeto. La argila hundo povas esti ludita kiel fajfilo.

Kunportante argilajn hundojn en korbo, la vendistoj fajfas per ludilo kaj fanfaronas, ke liaj argilaj hundoj havas aspektojn tiajn, kiajn Njuŭa faris el argilo

siatempe. Se vi pli atente rigardas la duonhoman vizaĝon de argila simio, vi certe konstatas, ke la argila simio estas iagrade simila al homa prapatro. La groteskeco de argilaj hundoj donas misteran impreson, kvazaŭ ili venus de la malproksima pratempo. Jam de longa tempo homoj ŝatas la argilajn hundojn. Ĉar ili portas ian misteron kaj krome, oni kredas, ke ili estas talismanoj. Iuj eĉ opinias, ke ili kiel bonkoraj feinoj sekrete helpas ilin plugi, teksti kaj fari aliajn laborojn. Tial la vizitantoj de la foiro ĉiu aĉetas kelke da argilaj hundoj por konservi ilin en sia ĉambro aŭ donaci al siaj amikoj.



La ĉina aŭtoindustrio ĉe turnopunkto

La ĉina aŭtoindustrio nun estas ĉe turnopunkto. La aŭto-fabrikado, antaŭe traktata en Ĉinio kiel prilabora industrio, nun estas difinita de la ŝtato kiel ĉefe disvolvenda industrio. Laŭ takso, en la 2000-a jaro Ĉinio havos sian aŭtoindustrian sistemon kapablan konkurenci internacie kaj povos produkti aŭtojn en sufiĉaj kvanto kaj specoj respondaj al la enlanda bezono kaj eksporto.

La ĉina aŭtoindustrio kreskis de nulo ĉe la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Nun la jara produktokvanto de aŭtoj en Ĉinio estas 400 000. Tamen kompare kun la aŭtoindustrio de la mondo, tiu de Ĉinio estas malforta kaj postiginta. En la pasintaj 30 jaroj la ĉina aŭtoindustrio starigis la produktan sistemon ĉefe de mezgrandaj kamionoj, kio kaŭzis malracian konsiston de la produktaĵoj, nome malmultecon de pezaj kaj malpezaj kamionoj kaj personaŭtoj. La malracieco de la

konsisto de la produktaĵoj stumbligis ne nur la progreson de la aŭtoindustrio mem, sed ankaŭ tiun de la tuta nacia ekonomio.

Dank' al la reformado al la ekonomia sistemo kaj la praktikado de la malferma politiko, senprecedence vigliĝis la materiala interŝanĝo inter la urboj kaj kamparo kaj tiu inter regionoj. Venis pli kaj pli multaj eksterlandanoj por komerca intertraktado, investado kaj turismo, kaj pli kaj pli multaj aŭtoj estas bezonataj, sekve la aŭtoproduktado ege ne adaptiĝis al la bezono pri aŭtoj. La malsata ĉina aŭtomarkato estis envolvita en tajdon de importado de aŭtoj. Laŭ statistiko en la lastaj 30 jaroj Ĉinio importis pli ol 1.3 milionojn da aŭtoj kontraŭ 13 miliardoj da usonaj dolaroj. Tiu sumo da mono estis trioble pli granda ol la totala investo de la ŝtato por la ĉina aŭtoindustrio. Ĉu en la urboj, ĉu en la kamparo, ĉie en Ĉinio oni vidas fremdlandajn

aŭtojn. Eĉ malgrandaj infanoj povas facile distingi "Benz", "Crown"...

Importo de multaj aŭtoj vekis grandan atenton de la ĉina registaro. Konsiderante la disan investadon dum longa tempo, ripetitan konstruadon, malaltan nivelon de kvalifikiteco, malracian strukturon de entreprenoj, malfortan povon de scienc-esplora ekspluatado kaj malmalmodernajn produktaĵojn, la ŝtato difinis en la Sepa Kvinjara Plano (1986-1990), ke la aŭtoindustrio estu ĉefa industrio, kaj difinis por ĝi la normon "supera nivelo, alta startpunkto, vera kvalifikiteco kaj granda produktokvanto". Por realigi la celon, la aŭtoindustrio de Ĉinio starigis en la reformado la tri aŭtoindustriajn grupojn "Unua Aŭtofabriko", "Dua Aŭtofabriko" kaj "Ĉongĉing-a Aŭtofabriko", por ke ili fariĝu kernaj entreprenoj kvalifikitaj, altnivelaj kaj pogrande produktantaj aŭtojn kun fama fabrikmarko.

Personaŭto "Santana" sur strato



Antaŭe en Ĉinio troviĝis centoj da aŭtofabrikoj, tamen nur malmultaj el ili povis produkti ĉiujare 100 000 aŭtojn. Du plej grandaj aŭtofabrikoj, nome la Unua Aŭtofabriko de Ĉangĉun kaj la Dua Aŭtofabriko de Hubej, kies investo konsistigis nur 20% de la totala aŭtoindustria investo de la ŝtato, produktas tamen 80% de la aŭtoj de la tuta lando. La malnova sistemo tro katenis tiujn grandajn entreprenojn, malvigligis ilin kaj malutilis al ilia propra disvolviĝo. La Unua Aŭtofabriko de Ĉangĉun starigita en la 50-aj jaroj estas la plej malnova bazo de aŭtofabrikado de Ĉinio. Tiu

fabriko metis finon al la historio, ke Ĉinio ne povis produkti aŭton. Sed en la pasintaj 30 jaroj ĝia produktaĵo neniam ŝanĝiĝis en tipo. Tamen en tio ne kulpis la fabriko. Male en la 30 jaroj ĝi projektis 75 novajn tipojn de aŭtoj kaj 38 tipojn de motoroj, sed pro la sistemo neniu el la projektoj estis realigita.

Dank' al la reformado la tri grandaj aŭtoindustriaĵoj grupoj revigliĝis kaj rapide disvolviĝis en la novaj kondiĉoj.

Post efektiviĝo de "salajro surbaze de progresiva kresko de profito", la Unua Aŭtofabriko de Ĉangĉun mem kolektis kapitalon por ŝanĝi la aŭto-tipon kaj sin transformi. Premise de neĉesigo de produktado, la fabriko plenumis en tri jaroj la soltrakan vertikalan ŝanĝon de produktaĵoj, nome produkti novtipajn aŭtojn samtempe kun ĉesigo de produktado de la malnovtipaj. La laboro por la tuta transformado egalas al tiu necesa por konstruado de samskala fabriko. Multaj teknikaj normoj de la novtipaj kamionoj Jiefang CA-141 atingis aŭ superis la avangardan nivelon de samspecaj produktaĵoj eksterlande. La fabriko jam fariĝis modelo por malnovaj entreprenoj en samtempaj produktado kaj ŝanĝo de tipo de produktaĵoj kaj en serioza teknika reformado.

En la reformado la Dua Aŭtofabriko de Hubej ekfunkciinta en la posta periodo de la 70-aj jaroj fariĝis pli vigla. Post la fondiĝo de la aŭtoindustria grupo en 1980 ĝi jam havas ĉ. 200 filiojn alte kvalifikitajn. Ĝiaj produktaĵoj multiĝis de tri fundamentaj tipoj al 46 fundamentaj kaj variigitaj tipoj kaj pli ol 50 speciale reformitaj tipoj. Kune kun siaj filioj la fabriko kreis 168 reformitajn tipojn, kiuj formis grandan serion da produktaĵoj kun marko "Dongfeng". Nun ĝi produktas ĉiujare pli ol 100 000 kamionojn kaj fariĝis unu el la tri



Muntado de la kampaj aŭtoj "Dongfeng", ĉiu kun ŝarĝkapablo de 2.5 tunoj

plej grandaj kamionaj fabrikoj de la mondo, kaj ĝia profito konsistigas trionon de la totala profito de la aŭtoindustrio de Ĉinio.

La industrio de peza aŭto de Ĉinio startis malfrue. La fabrikoj sin izolis unu de alia, la forto malkoncentriĝis kaj pro tio dum longa tempo ne formiĝis sendependa ekspluata povo, nek produktaĵo de kompleta serio kaj

alta nivelo. La fondiĝo de la aŭtoindustria grupo de Ĉongĉing finis tian stacion. Ĝiaj pli ol 30 filioj starigis novan sistemon de produktado kaj scienca esplorado surbaze de divido de faklaboroj. Ili reguligis la produktan strukturon, enkondukis fremdlandajn avangardajn teknologiojn kaj ekipaĵojn, elkribris malmodernajn tipojn kaj kreis en la pasintaj kelkaj jaroj tri tipojn de pezaj ŝarĝaŭtoj kaj unu tipon de



En muntejo de la novtipaj kamionoj "Jiefang"

motoro, produktis multajn specialajn aŭtojn, reformitajn aŭtojn kaj ĉasiojn de pasaĝeraj aŭtoj kaj formis kompletan ekspluatadon de klasifikitaj produktaĵoj kaj sistemon de scienca esplorado.

Por ludi la rolon de ĉefa industrio en la nacia ekonomio, la ĉina aŭtoindustrio devas atingi la skalon de miliono da aŭtoj. Por tion atingi, laŭ la sperto de la evoluo de la monda aŭtoindustrio, estas necese disvolvi produktadon de personaŭtoj. Nun en la mondo kvar kvinonoj de la aŭtoj estas personaŭtoj. Kiel pilota industrio, la personaŭta industrio alportis al multaj landoj ekonomian impeton. Sed tre malforta estas la produktado de personaŭtoj de Ĉinio, kaj ĉiu milo da ĉinoj posedas nur 0.5 personaŭton, kio multe distancas de la monda nivelo.

Por akceli la aŭtoindustrion, oni reguligas la konsiston de la produktaĵoj kaj laŭplane faras strategian transiron de kamiono al personaŭto. Gvidate de la principo de skala ekonomio kaj kvalifikiteco, la ŝtato starigis en la lando unuecajn punktojn kaj decidis starigi produktan sistemon de la ĉina personaŭta industrio surbaze de la du aŭtoindustriaj grupoj "Unua Aŭtofabriko" kaj

"Dua Aŭtofabriko" en kunlaboro kun armeaj kaj civilaj aŭtoentreprenoj.

La Unua Aŭtofabriko produktos luksajn kaj mezluksajn personaŭtojn per la metodo de "kombino de teknika enkonduko kaj propra ekspluatado". Laŭ plano la jara produktokvanto atingos 30 000, kaj sur tiu bazo atingos 150 000.

Sur la nuna bazo la Dua Aŭtofabriko havos jaran pro-

duktokvanton de 150 000 en la unua konstrua periodo, kaj 300 000 en la dua. La tipoj de la aŭtoj estos ordinaraj personaŭtoj kun cilindra kapacito de 1.0-1.6 litroj. Tiu tipo, la plej bonvena al la internacia merkato, povos servi enlande kiel ĉefa tipo por ofica uzo aŭ kiel grava eksportaĵo.

Ŝanhajo fariĝos unu el la bazoj de la ĉina personaŭta industrio. La urbo jam difinis, ke la personaŭta industrio estu unu el la ses ĉefaj industrioj multe disvolvataj. La Ŝanhaja Aŭtokorporacio Daĝong investita de Ĉinio kaj FR Germanio enkondukis produktadon de la germana personaŭto "Santana" kun avangarda nivelo de la 80-aj jaroj. Nun la produktopovo estas 10 000 en jaro. La korporacio klopodas por atingi la celon produkti 30 000 aŭtojn kaj 100 000 motorojn en ĉiu jaro. Ŝanhajo decidis komenci de la enlanda produktado de "Santana" kaj iom post iom starigi la produktan sistemon de aŭtopeca kompleto de la personaŭta industrio por meti la bazon por la vigla disvolviĝo de la aŭtoindustrio de Ŝanhajo kaj de la lando. ■

Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

GMT	Al Regionoj	Ondoj (m)	kHz
20:00-20:30	Eŭropo	40.1	7470
		32	9365
		30.1	9965
22:30-23:00	Latin-Ameriko	30.4	9860
		26	11515
11:00-11:30	Japanio, Koreio	31.6	9480
		43.1	6955
13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.7	11650
		19.4	15385

La E-movado de Ĉangĉun en disvolviĝo

Ĉangĉun estas urbo, kie vigliĝas E-movado. Antaŭ nelonge mi partoprenis en la Ĉangĉun-a Celebra Kunveno por Komenciĝo de la Dua Centjariĝo de Esperanto. Tie mi informiĝis pri la E-movado en la urbo. La kunveno daŭris de la 13-a ĝis la 15-a de decembro 1987. Kvankam ĝi estis mallonga, ĝi tamen estis revuo al la E-movado de la urbo en Ĉinio.

LA DISVOLVIĜO DE ESPERANTO KAJ SOCIA SUBTENO AL ĜI

Antaŭ 10 jaroj preskaŭ neniuj esperantistoj estis en Ĉangĉun. Sed nun en ĝi lernas nian lingvon ĉ. milo da homoj kaj pli ol 800 esperantistoj ĉeestis la inaŭguron. Laŭdire, la Ĉangĉun-a Esperanto-Asocio, Ĉangĉun-a Sciencist-teknikista Esperanto-Asocio kaj Ĉangĉun-a Medicina Esperanto-Asocio havas centojn da membroj. En oktobro 1986, la Ĉangĉun-a Teledidstacio okazigis Esperantokurson, kiun partoprenis pli ol 1 000 homoj.

Kial okazis tiel granda ŝanĝiĝo en kelkaj jaroj? Daj Liming, vicprezidanto de la Ĉangĉun-a Esperanto-Asocio, diris al mi, ke en la lastaj jaroj ili plurfoje faris prelegojn kaj aranĝis ekspoziciojn por propagandi Esperanton inter diversaj rondoj de la socio. Samtempe por havi socian medion favoran al E-movado, ili klopodis gajni la subtenadon de ĵurnalismaj rondoj por pluapase propagandi la lingvon.

Tie mi vidis, ke multaj sociaj organizoj subtenas Esperanton. Ekz., kune okazigis la kunvenon

15 organizoj, inter kiuj ĉ. duono estis neesperanta. Ili estis la Ĝjilin-a Teledidstacio, Ĉangĉun-a Teledidstacio, Ĉangĉun-a Geologia Instituto, Ĝjilin-a Tradukista Asocio, Ĝjilin-a Lernejo de Blindaj Infanoj, Redakcio de "Familia Mondo", Orienta Kompanio de Geofizika Teknika Servo k.a. Ili provizis la kunvenon per mono, materialoj, veturiloj kaj ejoj respektive. Pli ol 30 aktoroj de la Ĝjilin-a Ĉjuji-trupo* prezentis senpage speciale por la kunveno. Ili esprimis sian volon lerni la lingvon kaj prezenti per ĝi.


La lokaj ĵurnalismaj rondoj multe priatentis la kunvenon. Raportistoj el teledidstacio, radiostacio, redakcioj de ĵurnaloj kaj gazetoj vizitis la kunvenon kaj raportis pri ĝi. En la pasintaj jaroj la ĵurnalismaj rondoj multfoje propagandis Esperanton kaj la E-movadon en- kaj eksterlandan. Ili faris multe da laboro por Esperanto. La sonregistro de Ĝoŭ Juĉen pri Esperanta instruado de Liŭ Minghuj al lernantoj gajnis la

duan premion por elstara kontribuo donitan de Radio Pekino en 1986. Dum la kunveno mi renkontis raportiston, kiu diris al mi: "Esperanto estas ponto al la sankta harmonio. Ĝin ni devas progagandi."

GEKNABOJ KAJ ESPERANTO

La plej interesa dum la kunveno estis prezentado de la Esperantista Arta Trupo de la Ĝjilin-a Lernejo de Blindaj Infanoj. Kun sunokulvitroj kaj mano en mano, multaj amindaj geknaboj, sub la helpo de sia instruisto, suriris la scenejon. La plej juna inter ili estis 11-jara kaj la plej aĝa 19-jara. Ili kantis Esperante "Ĉangĉun brakumas vin" kaj aliajn kantojn, deklamis Esperantan poemon, prezentis dancon kaj ludis nacian muzikon. La prezentado estis plena de juneco. Estas videble, ke dank' al Esperanto ili pli forte amas la vivon kaj havigas al si la ŝancon disvolvi sian art-talenton. Kiu povas kredi, ke ili lernas Esperanton de nur kelkaj

• Blindaj geknaboj en kantado





Brita esperantisto Richard Noward helpas komencantojn.

monatoj.

Ankaŭ geknaboj el la E-kurso de la elementa lernejo Ĉangtonglu prezentis bonajn programerojn. En 1985 la Ĉangĉun-a Esperanto-Asocio komencis instrui nian lingvon en elementaj lernejoj. Ĉ. 140 lernantoj partoprenis en la lernado. Instruistino el la elementa lernejo Ĉangtonglu diris al mi, ke 34 lernantoj en ĝi lernas Esperanton kaj povas paroli pli ol 200 frazojn pri ĉiutaga vivo kaj prezenti Esperante. Nun ili korespondas kun geknaboj de Japanio kaj Hungario pri siaj vivo, familioj kaj lernejo. Ŝi diris: "Dank' al Esperanta aktivado ili larĝigas sian vidkampon, multigas sociajn sciojn, kulturajn en si internacian konscion. Tiu laboro, utila al ekspluatado de ilia inteligenteco, estas tre signifoplena."

STUDENTOJ INTERESIĜAS PRI ESPERANTO

Alia grava laboro de la Ĉangĉun-a Esperanto-Asocio estas propagandi Esperanton inter studentoj. Ĝi prenas la Ĉangĉunan Geologian Instituton kiel sian

bazlokon kaj laŭpaŝe disvastigas Esperantan laboron inter aliaj altlernejoj. Gvidantoj de la instituto ĝoje akceptis la proponon, ke ili estu honoraj prezidanto kaj vicprezidanto de la Ĉangĉun-a Esperanto-Asocio. Ili aranĝis por ĝi kunvenejon kaj financis ĝian eldonadon de "ABC de Esperanto en Scienco kaj Tekniko", "Mikrokomputilo", "Geologio Internacia", "Ĉu Vi Konas la Teron?", "Deklingva Etimologia Leksikono" kaj aliaj libroj. Krome, la Eduka Sekcio kaj Scienc-esplora Sekcio de la instituto subtenis ilin en funkciigo de E-kurso inter studentoj kaj fondo de la Studenta Esperanto-Asocio de la Ĉangĉun-a Geologia Instituto kaj kuraĝigis ilin interŝanĝi librojn kaj gazetojn kun internaciaj geologiaj rondoj. La instituto difinis, ke Esperanto estas la unua fremda lingvo en ĉiu fakoj, kaj senpage liveris ĉiujn ejojn por la kunveno.

De 1984, respondeculoj de la Ĉangĉun-a Esperanto-Asocio estis multfoje invititaj fari prelegojn pri Esperanto en universitatoj, okazigi Esperanto-ekspoziciojn kaj funkciigi E-

kursojn. La Ĝjilin-a Agronomia Instituto, Ĝjilin-a Politekniko, Nordorienta Normala Universitato kaj aliaj tri altlernejoj sinsekve fondis siajn E-organizaĵojn. Esperanto estas instruata en la Ĉangĉun-a Poŝta kaj Telekomunika Instituto. Por kontentigi la postulon de studentoj, la kunveno donis speciale al ili la prelegon kun la temo "La Nuna Interŝanĝo de Scienc-Teknikaj Informoj kaj Lingva Problemo", kiun ĉeestis ĉ. 200 studentoj kaj 4 profesoroj. Post la prelego multaj studentoj aĉetis E-lernolibrojn.

SIGNIFA PROPONO

En la 15-a de decembro 1987, la 128-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, okazis ĝenerala kunveno. Esperantistoj el Pekino, Ŝanhajo, Hejlongĝiang, Ĝjilin, Ŝandong kaj Ljaŭning aprobis post diskuto la proponon de la Ĉangĉun-a Esperanto-Asocio al gvidantoj de diversaj rondoj: por antaŭenpuŝi la E-movadon en Ĉinio, kiu havas kvinonon da loĝantoj de la mondo, kaj servigi Esperanton al la reformo, pordmalfermo kaj moderniga konstruado de la lando, kaj al la mondpaco, ili subtenu, lernu, propagandu, disvastigu kaj uzu Esperanton; kuraĝigu uzi ĝin en reformo, pordmalfermo kaj ekonomia disvolviĝo; efektivigu la difinon de la eduka departemento de Ĉinio, ke Esperanto estu kiel fremda lingvo en ekzamenado por promocii fakulojn; rekomendu propagandi ĝin en publikaj lokoj, kaj vidindejoj, marki Esperante turismajn produktojn, popularigi Esperanton en alt-, mez- kaj element-lernejoj, precipe en infanĝardenoj, kaj inter handikapuloj, kaj vaste apliki Esperanton en scienc-teknika kampo k.a., por ke Esperanto fariĝu dua lingvo de homoj.

La kunveno plene sukcesis. ■

*Ĉjuji, formo de ĉina popola arto.

2-A KONKURSO POR TEATRAĴO DE EVA

1. Esperantlingva Verkista Asocio — EVA organizas sian 2-an Internacian Konkurson por verkado de ORIGINALA TEATRAĴO en ESPERANTO.
2. La Konkurson povas partopreni ĉiu esperantisto sen ia ajn limigo /kun escepto de la jurianoj kaj iliaj familianoj/.
3. Unu konkursanto rajtas konkursi kun maksimume du verkoj.
4. La konkursaĵo devas esti aŭ a/ memstara originala teatraĵo verkita en Esperanto, aŭ b/ teatraĵo de jam ekzistanta verko originale verkita en Esp.
5. La konkursaĵo devas esti teatraĵo kun daŭro de 60-90 minutoj, kun almenaŭ 5 aktoroj.
6. La temo de la teatraĵo estas tute libera.
7. La aŭtoro devas sendi la konkursaĵon tajpitan en 4 kopioj /kiujn oni ne resendos/, al la Sekretario de la Konkursos, identigante sin per kaŝnomo kaj aldonante sigelitan koverton kun sia vera nomo kaj adreso. Sur la koverto estu skribitaj nur la kaŝnomo kaj la nomo/j/ de la konkursaĵo/j/.
8. Anticipe elektita ĵurio el tri personoj/kun tri anstataŭantoj/ aljuĝos tri premiojn kaj tri honorajn menciojn.
9. La premioj konsistas el: UNUA PREMIO: 1.000/mil/usonaj dolaroj, DUA PREMIO: 500 /kvincent/ usonaj dolaroj, TRIA PREMIO: 250/ducent kvindek/usonaj dolaroj, TRI HONORAJ MENCIOJ, sen financa efekto.
10. La gajnintoj de monpremioj devigas sin kontribui al la Fondaĵo Grabowski: la gajninto de la UNUA premio per du "kuponoj" en valoro de 100 usonaj dolaroj, la gajninto de la DUA kaj la TRIA premioj per unu kupono en valoro de 50 dolaroj.
11. La teatraĵo premiita por la UNUA premio estos proponita por prezentado dum la proksima Universala Kongreso de Esperanto, post kio la aŭtoro retenos siajn aŭtorajn rajtojn.
12. La teatra trupo, kiu prezentos la premiitan teatraĵon dum la U.K., estos premiita per la sumo de 1.250 usonaj dolaroj, el kiu sumo ĝi kontribuos 100 dolarojn al la fondaĵo Antoni Grabowski.
13. Ĉiuj premioj estos financataj el donaco de s-ro Adamo Paŭlo Goralski Pawlikovski, fondinto de Fondaĵo Antoni Grabowski.
14. La limdato de la alsendo de la konkursaĵoj estas la 30-a de aprilo de 1988. La rezulto de la Konkursos estos proklamita dum la 73-a U.K. en Roterdamo. La prezentado de la elektita teatraĵo estos proponita al la 74-a U.K.
15. Konkursaĵojn bonvolu sendi al la Konkursa Sekretario: Spomenka Štimec, N. Dimic 14., YU-41410 Velika Gorica, Jugoslavio.

Por EVA
la prezidanto T. Sekelj

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: unu internacia respondkupono por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: unu intern. resp. kup. por spaco de unu linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp-organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* 16-j. Eröss Magdolna dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Narcisz 4/B.7; Miercurea-Ciuc Harghita 4100, Rumanio.

* Antal Gabriella dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Avintului 6/A/6, Miercurea-Ciuc Harghita 4100, Rumanio.

* 90-j. fraŭlo dez. kor. kun tutmondo. Ĉu vi ŝatas finlandajn pm. kaj pk.? Bv. skribi al: Kisulan Apo, Pk 1, 31900 Punkalaidun, Finnlando.

* 29-j. komencanto dez. kor. kun samideanoj kaj interesiĝas pri historio, literaturo, fremdaj lingvoj, Ĉinio. Adr.: Vladimir Borzikov, Risovoje, K-Perekopska distr., Krimea reg., USSR 334917.

* 20-j. knabino vol. kor. pri ĉiuj temoj. Leuka Masarikova, Luzicka 7,

Praha 2-Vinohrady, 120 00, ĈSSR.

* 21-j. f-ino Kathleen Strickland dez. kor. tm. Adr.: 157, Star Road, Peterborough Anglio PE1 5HG.

* Geodeziistoj Francisko Karasz (23-jara) kaj Zoltano Dio (23-j.) dez. kor. kun 20-30-jaraj gejunuloj. Adr.: 3200 Gyogyos, Marx K. u. 8, Hungario.

* Mezaĝa viro laboranta en entrepreno, kiu produktas muzikajn blovinstrumentojn dez. kor. kun esperantist(in)o, kiu interesiĝas pri Ĉeĥoslovakio. Vaclav Papez, Druzstevni 20, 358 00 Kraslice, Ĉeĥoslovakio.

Por akceli interkomprenon kaj amikecon

— Pri la vojaĝo de la Japana Esperantista Turisma Grupo en Ĉinio

De la 25-a de oktobro ĝis la 3-a de novembro 1987 la Japana Esperantista Turisma Grupo (JETG) el 16 personoj sub la gvido de s-ro Umeda Yoshimi, vicprezidanto de UEA, vizitis Ŝanhajon, Ĉingdaŭ, Ĝĵinan, Taj'an, Ĉjufu kaj Pekinon. Mi havis ŝancon akompani la japanajn amikojn kaj pasigi kune kun ili 10 neforgeseblajn tagojn.

JETG diferencas de aliaj turismaj grupoj. Ĝi venis al Ĉinio, ĝuste kiel s-ro Umeda Yoshimi diris, por akceli la interkomprenon kaj amikan kontakton inter la japanaj kaj ĉinaj esperantistoj, profundigi ilian amikecon kaj progresigi la E-movadon.

La aŭtoro (maldekstre) kaj nova EPC-peranto s-ino Kitabatake Hitomi en Ĉjufu



9 el la 16 japanaj esperantistoj partoprenis la 71-an UK en Pekino en 1986, kaj iuj el ili multfoje vizitis Ĉinion. Ekz., estas la 4-a fojo, ke s-ro Deguchi Kyotaro vizitis Ĉinion, ankaŭ lia edzino Deguchi Mayuko jam dufoje venis en Ĉinion; estas la 10-a fojo, ke s-ro Umeda Yoshimi vizitis Ĉinion; s-ro Nishikawa Toyozo vizitis Ĉinion jam 16-foje ekde 1957.

La plejparto de la grupanoj estas maljunuloj, kun meza aĝo de 60 jaroj. Ili travivis la pasintan epokon, en kiu malakordis Ĉinio kaj Japanio. Ju pli ili konas la pasintecon, des pli ili domaĝas la hodiaŭan amikecon, kion ekzem-

plas la parolo de s-ro Deguchi Kyotaro: "Ni ne povas forgesi la historion. Rememorigi pri la malagrabla historia konflikto inter Japanio kaj Ĉinio estas ĝuste por pli domaĝi la hodiaŭan amikecon inter la japana kaj ĉina popoloj." La 80-jara grupano Nishikawa Toyozo estas prezidanto de la Takatsuki-a Esperanto-Societo kaj vicprezidanto de la Takatsuki-a Asocio por la Amikeco inter Japanio kaj Ĉinio. Li multe kontribuis al la amikeco inter la du popoloj. Li venis en Ĉinion trifoje en 1986. S-ro Umeda Yoshimi kontaktigis kun ĉinaj esperantistoj, post kiam Ĉinio kaj Japanio restarigis diplomaciajn rilatojn en 1972. Fariĝinte vicprezidanto de UEA, li multe laboras por plifortigi la kunlaboron inter UEA kaj ĈEL, sukcesigi la 71-an UK en Ĉinio kaj akceli la amikan kontakton inter la ĉinaj kaj japanaj esperantistoj. La plej juna f-ino Hamada Yumi venis en Ĉinion en 1977 kune kun sia patro, aferŝarĝito de la japana ambasadorejo en Ĉinio, lernis en la 55-a Mezlernejo de Pekino dum unu kaj duona jaroj. Poste ŝi diplomitiĝis el la ĉinlingva fakultato de la Tokia Fremdlingva Instituto en Japanio. Ŝi diris, ke de multaj jaroj ŝi sopiras Pekinon, kaj ke la vizito aparte interesas ŝin. S-ino Kitabatake Hitomi volonte fariĝis en 1987 peranto de EPC, kaj dediĉos grandan energion al tiu laboro.

La japanaj amikoj estis varme akceptitaj de ĉinaj esperantistoj. Ili ĉeestis kunsidon de ŝanhajaj esperantistoj por interŝanĝi sper-



Renkontiĝo de pekinaj kaj japanaj esperantistoj

tojn en lernado de Esperanto kaj vizitis iaman loĝejon de Verda Majo. Akompanate de esperantistoj de Ĉingdaŭ, ili vizitis la urbon kaj parkojn kaj partoprenis en la geedziĝa ceremonio de du esperantistaj paroj. La Ĉingdaŭ-a Televido filmis la aktivadon de la gastoj kaj raportis ĝin vespere. La amikoj renkontiĝis kun esperantistoj de Ĝjnan kaj Ĉjufu, partoprenis en balo kaj rigardis kultron al Konfuceo en lia templo. De post 1984 la ceremonio okazas ĝenerale en la 27-a tago de la oka monato laŭ la ĉina luna kalendaro, la naskiĝtago de Konfuceo. Sed ĝuste tiam okazis en Ĉjufu konferenco por studo pri famaj ĉinaj historiaj kulturaj urboj kaj ĝiaj ĉeestantoj el 62 urboj deziris rigardi kultron al Konfuceo. La gastiganto de la konferenco faris specialan aranĝon. La gastoj tre ĝojis: "Ni havas bonan ŝancon, tre bonan."

En Taj'an en Ŝandong-provinco la gastoj ne povis ascendi Tajŝan-monton, ĉar la telferoj ne estis uzataj pro ventego. Antaŭ longe ili jam aŭdis, ke Tajŝan-monto estas majesta kun pompaj pejzaĝoj kaj

multaj famaj historiaj restaĵoj. Ili bedaŭris, ke ili ne povas ĝui tion. Ili esperis, ke ilia deziro realiĝos en la venonta fojo.

Dum la restado en Ĉinio la turisma grupo intervidiĝis kun registaraj gvidantoj kaj la prezidantoj de E-organizoj de tiuj lokoj. S-ro Umeda Yoshimi interŝanĝis kun ili opiniojn por akceli la amikan kontakton inter

la japanaj kaj ĉinaj esperantistoj kaj vigligi la E-movadon en Azio.

La 3-an de novembro la turisma grupo forlasis Ĉinion por reveni al Japanio. Ĉe la adiaŭo s-ro Umeda Yoshimi diris: "Nia amikeco estas eterna, kvankam ni kune pasigis mallongan tempon." S-ro Deguchi Kyotaro ripetis: "Ĝis revido, ni venos denove, mi certe venos kun mia edzino!"

Japanaj gastoj sur la Ĝjnan-a Pontego super la Flava Rivero



Karmemore al prof. Ivo Lapenna

de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj
redakcio de "El Popola Ĉinio"

Ĉe la sojlo de 1988 al ni subite venis informo pri la bedaŭrinda forpaso de prof. Ivo Lapenna en la Zamenhofa Tago de 1987. Ĝi forte skuis la ĉinajn esperantistojn, kiuj lin konas.

Prof. Ivo Lapenna estis unu el la plej grandaj figuroj en la historio de la Internacia Lingvo kaj arkitekto de la moderna Universala Esperanto-Asocio. Kiel komitatano kaj estrarano de la asocio kaj kiel ĝia prezidanto dum deko da jaroj, li direktis ĝiajn energiojn al la publika prezento de Esperanto al la plej altaj instancoj. Li estas konata kiel ĉefa rolanto en akceptigo de ŝlosila rezolucio favora al Esperanto ĉe la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo en 1954 kaj kiel pledanto por Esperanto antaŭ ŝtatestroj, intelektuloj kaj sciencistoj.

La firma kaj senkompromisa sinteno de prof. Lapenna pri la seriozeco de la pretendoj de Esperanto faris lin granda malamiko de ĉia misuzo kaj misprezento de Esperanto, kaj de sektismo kaj diletantismo. Li insistis pri plej altaj normoj en la lingvouzo kaj pri respekto al la humanecaj idealoj de la Internacia Lingvo.

Li estis brila informanto por Esperanto — jam en siaj studentaj jaroj en Jugoslavio kaj poste kiel gvidanto kaj inspiranto de la informa laboro en UEA. Tra ĉiuj malfacilaĵoj kaj seniluziigoj li restis senlaca laboranto por la lingvo. Li estas aparte memorata kiel brila oratoro kaj talenta verkisto en la Internacia Lingvo. Multaj ankaŭ memoras lin kiel instruanton kaj inspiranton de

tuta pli juna generacio de aktivuloj por Esperanto. Li estis tutmonde agnoskata ekster la Esperantomovado kiel gvida figuro en la internacia juro.

Kiel malnova amiko de la ĉinaj esperantistoj, prof. Lapenna multjare zorgis pri la ĉina Esperantomovado kaj havis konstantan kontakton kun la Ĉina Esperanto-Ligo. Li estis ankaŭ leganto kaj kontribuanto tre simpatia al la revuo "El Popola Ĉinio". En sia letero al ĝia redakcio li skribis: "Mi alte aprezas vian laboron kaj la nunan saĝan, kleran kaj interesan linion de 'El Popola Ĉinio'. Krome, la vere bonegan, preskaŭ seneraran lingvon." Liaj vortoj ege kuraĝigis la redaktorojn. Fruvintre de 1986, por sia rubriko "Jubilea Jaro de Esperanto" la redakcio petis kontribuojn de li kaj aliaj bone konataj



Prof. Ivo Lapenna

esperantistoj. Januare de la sekvanta jaro la redakcio ricevis lian artikolon "Internacieco de Esperanto" kaj aperigis ĝin en la junia numero.

Fine ni ripetu jenajn vortojn en la mesaĝo de UEA: Se lia forpaso markis la finon de unu epoko en la historio de Esperanto, des pli gravas, ke ni daŭrigu konscie kaj konsciencie lian laboron en la dua jarcento. Nenio alia pli bone taŭgas por honori lian memoron. ■

Kondolenco

Kun profunda malĝojo ni ricevis la informon, ke s-ino Yukiko Isobe, ĉefdirektoro de la Japana Esperanto-Instituto, forpasis je la 15-a de januaro 1988.

Kiel elstara figuro en la japana Esperantomovado s-ino Isobe faris valoran kontribuon por nia lingvo kaj en Japanio kaj en Azio. Aliflanke, ŝi ankaŭ multe klopodis por la pliantaŭenigo de la amika kontakto kaj kunlaboro inter la ĉinaj kaj japanaj esperantistoj.

Kiel nia multjara entuziasma amiko kaj leganto, s-ino Isobe kelkfoje vizitis Pekinon kaj estis varme bonvenigita de ni. Ŝia ĉeesto ĉe la 71-a Universala Kongreso en Pekino en 1986 estas ŝia lasta vizito al Ĉinio.

Al la familianoj de s-ino Yukiko Isobe ni esprimas nian plej sinceran kondolencan.

La Red.

Malgranda montvilaĝo

Bejcun estis longtempe malriĉa montvilaĝo en norda Ĉinio. Nun ĝi iom post iom riĉiĝis kaj fariĝis "urbeto" en montaro.

En la vilaĝo kruciĝas du cementaj ŝoseoj kun totala longeco de 2 000 metroj kaj larĝeco de 6-8 metroj. Ili ligiĝas kun ĉiuj stratoj grandaj kaj malgrandaj en la vilaĝo. Ambaŭflanke de la ŝoseoj fluas kanaloj kun arboj ĉe la bordoj. Tie sin trovas lernejo, kultura centro, pilkludejo, teatro k.a. En malproksimo vidiĝas novaj loĝdomoj de kamparanoj.

Se vi promenas sur strato vespere, vi vidos, ke ĝi estas

movoplena, kun multaj vendejoj, inter kiuj estas lunĉejo, kiun funkciigas patro kaj filino. Pro iliaj bongustaj bakitaj kukoj multaj laboristoj ŝatas ĝin viziti post sia nokta deĵoro.


Subtere de la vilaĝo kuŝas granda kvanto da karbo kaj ŝtonoj utiligeblaj por konstruado. De post 1983 oni starigis tie kelkajn fabrikojn por ekspluati la subterajn riĉfontojn. La pokapa enspezo de la vilaĝo en 1987 atingis jam 1 000 jŭanojn.

En la pasinteco la vilaĝanoj loĝis en kaverndomoj, sed hodiaŭ du trionoj de la familioj transloĝiĝis en domojn el brikoj kaj

tegoloj. Iu kvin-membra familio havas novan domon kun sep ĉambroj, fiŝbasenon kaj arbojn en la korto. En la ĉambroj estas diversaj envazaj floroj kaj diversaj elektraj aparatoj.

Jam en 1984 la vilaĝo investis 10 mil jŭanojn por instali pli ol 70 telefonojn disponeblajn por sesono de la familioj.

La maljunuloj, kiuj ne havas gefilojn, ricevas prizorgon de la kolektivo, kaj infanoj povas viziti lernejon senpage. Multaj riĉiĝintaj junuloj, kiuj ricevis nur elementan edukon, nun havas kondiĉojn por altigi sian klerecon. ■



NOVAJ LIBROJ ELDONITAJ DE ĈEE

En 1987 la Ĉina Esperanto-Eldonejo (ĈEE) eldonis 9 librojn, kiel "Laŭtema Vortaro Esperanto-Angla-Ĉina", "Atlaso de Insekta Morfologio", "Ĉinaj Protektataj Bestoj", "Ĉinaj Tradiciaj Festoj" kaj "Tibeto sur la Monda Tegmento", 4 porinfanajn bildlibrojn kaj 12 seriojn da poŝtkartoj pri pejzaĝoj, kiel "16 Vidindaj Lokoj de Pekino", "Dek Famaj Floroj de Ĉinio", "Pejzaĝoj de Ĉinio", "Famaj Vidaĵoj en la Mondo", "La Flav-grua Turo" kaj "Liĝjang-rivero". En 1987 ĈEE eldonis plej multajn poŝtkartojn. Gesamideanoj povas mendi ilin ĉe perantoj en sia lando aŭ rekte ĉe la Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN) P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

JARKUNSIDO DE UFEGT

Por celebri la 100-jaran jubileon de Esperanto, ĉinaj fervojistoj-esperantistoj okazigis en Pekino en 1987 la Jarkunsidon de la Unuiĝo de Fervojistaj Esp-Grupoj Tutlandaj (UFEGT), en kiu oni prezentis la 72-an UK kaj la 39-an kunvenon de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF), interŝanĝis spertojn kaj diskutis pri la estonta laboro. S-ro Li Sen, provizora respondeculo de UFEGT, informis, ke IFEFF akceptis UFEGT kiel sian 20-an landan membroorganizon. La jarkunsido decidis funkciigi korespondan kurson de Esperanto por ĉinaj fervojistoj kaj eldoni sian periodaĵon.

FORPASIS S-RO ĜJANG ĈUNFANG

Ĝjang Ĉunfang, fama ĉina tradukisto, kompilisto-eldonisto, eksĉefredaktoro de la Ĉina Enciklopedia Eldonejo kaj membro de la societo "Amikoj de Esperanto", forpasis en Pekino la 17-an de decembro 1987 en sia aĝo de 75 jaroj. Li varme subtenis la Esperantan laboron kaj proponis eldoni enciklopedion pri ĉinaj fundamentaj scioj en Esperanto. Lia forpaso estas perdo por la ĉina E-movado. La redakcio de EPĈ tre bedaŭras tion kaj




S-ro Ĝjang Ĉunfang

esprimas koran kondolencon al liaj familianoj.

BILDOBENDO PRI SIMPLA TAJĜIĈŬAN EN ESPERANTO

La Ljaŭning-a Eduka Son- kaj Bildobenda Eldonejo eldonis bildobendon pri simpla Tajĝiĉŭan en Esperanto, kun 45-minuta daŭro, kaj distribuas ĝin en- kaj eksterlande. Tiuj, kiuj ĝin bezonas, skribu al s-ro

Poŝtkartoj eldonitaj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo



Ĝaŭ Ŝjuegang. Adr.: Shenyang-a Sporta Instituto, Shenyang, Ĉinio.

LA VOJAĜAGENTEJO "KONFIDO" FONDITA

Lastatempe fondiĝis en Pekino la vojaĝagentejo "Konfido", kiu akceptas turistojn el diversaj lokoj, ĉu unuope, ĉu kolektive, ĉu familie. La pago estas malpli alta ol tiu postulata de aliaj vojaĝagentejoj je 5-10%. La turistoj povas laŭvole elekti itineron. "Konfido" servas per esperantistaj ĉiĉeronoj. Ĝi havas rilatojn kun la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la Pekina Esperanto-Asocio kaj ricevas ilian helpon. Ĝi varme bonvenigas kaj favoras alilandajn esperantistajn turistojn, kaj senpage liveras ejojn por Esperantaj kunvenoj. Esperantistoj, kiuj volas vojaĝi en Ĉinio, skribu al sino Li Min. Adr.: Xisanhuan Beilu n-ro 21, Haidian-distrikto, Pekino, Ĉinio.

INFORMOJ EL ALIAJ LOKOJ

La Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj sankciis lastatempe la fondiĝon de siaj ekonomia kaj komerca filio kaj junulara filio.

La Sennacieca Asocio Tutmonda akceptis en 1987 ĉinajn esperantistojn Ĝaŭ Ĉenghŭa kaj Ĝuo Minĉang kiel siajn membrojn.

La Esperanta filatelaĵo de Ĉen Ŝan "Internacia komuna lingvo — Esperanto" gajnis la duan premion en la 4-a Ekspozicio de Filatelaĵoj en Siĉŭan-provinco.

La Ĝiŭĝjang-a Alumeto-fabriko en Ĝjangŝji-provinco faris 4 kolorajn alumeto-markojn, kies fono estas helverda kun malhelaj grizo kaj verdo. Ili surhavas respektive emblemon de la 100-jara jubileo de Esperanto, verdan stelon, portreton de Zamenhof kaj vortojn Esperantaj kaj ĉinajn.

EPĈ ESTAS ABONEBLA EN GDR

Ĉiu GDR-ano povas aboni la revuon "El Popola Ĉinio" ekde la 1-a de januaro 1988. Oni direktu sin al: Zentralvertrieb des PZV, Übigauer Str. 4, Falkenberg/Elster, DDR-7900.

NOVA REVUO "LATINAMERIKA MEMUARO"

Latinamerika Memuaro (LM) estas la kvarmonata informilo de LATINAMERIKA PERESPERANTA KULTUR-CENTRO (LAPEK), la plej juna kaj aktiva E-organizo en Latinameriko. LAPEK estas vastiĝanta centro de peresperanta kultura interŝanĝo. LM estas modesta, sed serioza kunkrampaĵo 20-paĝa, per kiu vi konas la latinamerikajn kulturon, pensmanieron, klasikan kaj modernan literaturon ktp. (Prov) ekzemple-ro kontraŭ US\$ 1 aŭ egalvaloro; dujara abono (ses numeroj): US\$ 5. Ni proponas interŝanĝon. Adr.: Apartado Aéreo 528, Armenia (Q), Kolombio.

IEKA DENOVE STARTAS

La Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista post sia kunveno dum la Jubilea Kongreso en Varsovio decidis denove pligrandigi informadon pri aŭtomobilistaj aferoj.

Multaj esperantistoj-aŭtomobilistoj vojaĝante tra la mondo bezonas la helpon ĉe riparado de aŭto, informojn pri hoteloj, kampadejoj ktp. IEKA helpas ilin solvi tiujn problemojn pere de siaj landaj reprezentantoj, aŭ IEKA-retoj en multaj landoj.



La Esperantaj alumeto-markoj faritaj en Ĝiŭĝjang

Se vi estas preta aliĝi al IEKA, turnu vin al via landa reprezentanto, aŭ se ĉi tiu ne ekzistas en via lando, vi mem povas fariĝi la landa reprezentanto. Por pliaj informoj skribu al provizora sekretario: S-ro Julia Guillaume, 66 Village de Grasse, F-78810 Feucherolles, Francio.

LA 11-A INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO

La Kultura Centro de Kontpellier proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon pri Esperanto de la 20-a ĝis la 28-a de aŭgusto 1988. Samtempe vi trapasos agrablajn feriojn en montara ripoza loko. Ĉi tiun jaron la restado estos aparte interesa ĉar ni kalkulas multe da alilandanaj partoprenantoj por krei vere internacian etoson. Aliĝo/Informo: Esperanto, 5 rue du Dr Roux, 34000 Montpellier, France.


SCIIGOJ DE IAHE

Pro teruraj financaj kondiĉoj kaj organizaj problemoj IAHE sciigas ĉiujn siajn membrojn, aliajn esperantistojn kaj E-instancojn, ke ekde la 1-a de januaro 1988 IAHE glaciigas sian agadon ĝis la 1990-a jaro. En la sama periodo ne plu aperados ankaŭ ĝia gazeto "VOĈO DE HANDIKAPULOJ". Tamen viajn urgajn informojn, eldonaĵojn kaj aliajn materialojn IAHE-sekretario akceptas al adreso:

IAHE Ŝkolska 25, YU-56227 Borovo, Jugoslavio.

Por helpi al IAHE s-ro Dušan Adnadj, eldonisto, decidis verki kaj eldoni Leksikonon pri filmarto kaj petas ĉiujn nunajn kaj iamajn kolektantojn de fotoj de filmgeaktoroj helpi al li sendante superflujajn fotojn aŭ proponante interŝanĝon. Por detalaj informoj bv. turni vin al: S-ro Dušan Adnadj, Ŝkolska ul. 25, YU-56227, Jugoslavio.

La nova Esperanta periodaĵo "Latinamerika Memuaro"



KORESPONDI DEZIRAS

* Sendu flaŭrojn kaj ricevu nunajn brazilajn poŝtmarkojn. S-ro Carlos Alberto Bianchini, Rua Silverio José Bernardes Nr. 301, Bairro Mercês Uberaba-Minas Gerais-38.060, Brazilo.

* 57-j. emeritino dez. kor. kun ĉina virino pri popularaj temoj por perfektigi Esperanton. Adr.: Aleksandra Falkowska, Wolodyjowskiego 8A-10, 15-309 Bialystok, Pollando.

* 17-j. Joanna Dederko dez. kor. tutmonde pri muziko, sporto kaj

mondo. Adr.: ul. Zbozowa 2/7, 61-668 Poznan, Pollando.

* 36-j. esperantisto-kuiristo serĉas geamikojn "seriozajn" por interŝanĝado de Esperantaj filatelajoj, insignoj, medaloj, bk, moneroj, prospektoj kaj libroj. S-ano Vlada Hasala, Poŝtkesto 34, CS-696 62 Straznice, Distr. Hodonin, Ĉeĥoslovakio.

* Mi tre deziras korespondi kun ĉinaj geartistoj-esperantistoj pri diversaj temoj de arto (pentraĵo kaj ĉefe emajlo). Adr.: S-ro Maurice Henry, 11, rue des Biaunes, 78510 Triel-sur-Seine, Francio.

* Novaj esperantistoj vol. kor. kun ĉinaj gesamideanoj. Adr.: Soveta

Unio, SU-252035, Kiev-35, ul. Urickogo, d.19 kv. 73, Pogorelaja, Svetlana.

* 18-j. lernanto de Jugoslavio dez. kor. Esperante, latine, angle kaj itale, pri seriozaj temoj kaj kolektas gramofonajn diskojn kaj insektojn. Fekete Naudor, 24435 Mol. Jvo Lola Ribar 7, Jugoslavio.

* 26-j. Gala Arkadiusz dez. kor. kun diverslandanoj por praktiki la lingvouzon kaj kolektas mapon, bildkartojn kaj pm. Adr.: ul. Moniuszki 3/25, PL-43-400 Cieszyn, Pollando.

(*Daŭrigo de p. 5*)

la adoltaj civitanoj. Fama ĉina dramisto Caŭ Ju diris: "Nun la urbanoj kaj kamparanoj havas pli kaj pli klaran nocion pri leĝo kaj civitaneco. Ĉinio estis profunde influata de feŭdismo dum miloj da jaroj. Se la civitanoj ne konas leĝojn, ili ne scias, kiuj el iliaj rajtoj kaj interesoj estas protektataj de la leĝoj, kaj povas nur obei la lokajn gvidantojn, el kiuj iuj estas tre tiranaj. La lernado komprenigas la popolon kiel defendi siajn leĝajn rajtojn kaj interesojn kaj prudentigas la kadrojn senbride agantajn. Antaŭe oni diris, ke krima reĝido ricevas saman punon kiel krima civitano, kio ne efektiviĝis. Hodiaŭ aperis bona fenomeno, ke ĉiuj estas egalaj antaŭ leĝo."

Progresas ankaŭ la ĉina justico. La Supera Popola Kortumo forte subtenas la lokajn popolajn juĝeojn por bone fari juĝajn aferojn malgraŭ ĉia koncerno. Inter la gravaj ekonomiaj krimuloj punitaj en 1986 estis 151 kadroj de almenaŭ gubernia nivelo. El la kazoj traktitaj en 1987 la plej okulfrapa estis tiu pri Ni Ŝjance, la eksprovincestro de Ĝjangŝji-provinco, kondamnita al du-jara mallibereco pro ĉaso de privataj interesoj. Tio vekis fortan eĥon ĉe diversaj socitavoloj. Oni diras, ke la juĝejo procedis juste.

PERSPEKTIVO

Kiel grava strategia celo de la moderniga konstruado kaj kiel nova ŝtata sistemo, la altgrada socialisma demokratio ankoraŭ ne estas perfekta kaj bezonas longtempan konstruadon.

Multaj reprezentantoj klarigis al mi la kialon: Pro la granda loĝantaro, malrapida ekonomia disvolviĝo, malaltnivelaj kulturo kaj edukado,

postĝintaj trafiko kaj komunikado, kaj profunda tradicia influo de feŭda despotismo, Ĉinio ankoraŭ restas en la komenca periodo de socialismo. Kaj konstruado de altgrada demokratio estas neeviteble limigita de tiuj kondiĉoj. Estas nereala ĉia provo tuj turni Ĉinion en landon kun altgrada demokratio. Ĝi povas nur fuŝi la demokratiigon.

La plano pri reformado de la politika sistemo farita de la 13-a Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio okazinta en la fino de oktobro 1987 inkludas serion da konkretaj rimedoj antaŭenpuŝi demokratiigon de la partia kaj ŝtata politika vivo. Ekz., por perfektigi la bazan sistemon de la socialisma demokratia politiko, la kongreso decidis daŭre perfektigi diversajn funkciojn de la kongreso kaj ĝia Konstanta Komitato, plifortigi leĝdonan laboron kaj juran kontroladon, pluapase elvolvi la rolon de la partiaj kaj senpartiaj demokratoj en la ŝtata politika vivo, rapide ellabori leĝojn pri la gazetaro, eldonado, asociado, kunveno kaj manifestacio, starigi la apelacian sistemon de la popolo kaj plue perfektigi la regionan aŭtonomecon de nacimalplimultoj.

Ankaŭ la interparola kaj interkonsiliĝa sistemo de diversaj socitavoloj nun aperinta en la urboj kaj kamparo de Ĉinio estas enhavata en la reformado de la politika sistemo. Por la reformado la popolo volonte partoprenas en diskutado pri politikaj aferoj kaj esprimas sian opinion. La interparolo kaj interkonsiliĝo de diversaj socitavoloj estas efikaj por interkomunikado inter la partio, registaro, popolaj societoj kaj popolo. La sistemigo de la interparolo kaj interkonsiliĝo de diversaj socitavoloj certe plibonigos la demokratian vivon de la popolo kaj puŝos al nova stadio la konstruadon de la socialisma demokratia politiko de Ĉinio. ■

Internacia konferenco por antaŭenpuŝi akupunkturon kaj mokson

De la 70-aj jaroj la ĉinaj tradiciaj terapioj akupunkturo kaj mokso rapide disvolviĝas en multaj landoj kaj estas vaste atentataj kiel efika kuraca metodo. Laŭ nekompleta statistiko, pli ol 120 landoj kaj regionoj aplikis la terapiojn. Multaj landoj funkciigas kursojn de akupunkturo kaj mokso, kaj starigis respondajn studrondojn, kio akcelis aplikadon, popularigon, scian esploron kaj akademian interŝanĝon pri akupunkturo kaj mokso.

Antaŭ nelonge, oficiale fondiĝis en Pekino la Monda Federacio de Akupunkturaj kaj Moksaj Institutoj, kiu celas akceli la interkompreniĝon kaj kunlaboron inter la akupunkturaj kaj moksaj rondoj de la mondo, la internacian akademian interŝanĝon, plue disvolvi sciencan esploron de akupunkturo kaj mokso kaj fari kontribuon al la homa sano. La federacio konsistas el 55 akupunkturaj kaj moksaj institutoj (inkl. de 5 internaciaj) de proksimume 100 landoj kaj regionoj kun pli ol 37 800 membroj kaj starigis sian centran oficejon en Pekino.

Samtempe kun tio, okazis en Pekino ankaŭ la Unua Monda konferenco de Akupunkturo kaj Mokso organizita de la Ĉina Instituto de Akupunkturo kaj Mokso.

La konferenco ricevis sume 1 200 disertaciojn, inter kiuj 200 estis verkitaj de alilandaj fakuloj kaj 1 000 de ĉinaj. Ilia ĉefa enhavo estas klinika esploro de akupunkturo kaj mokso kaj koncernas kuracadon de la malsanoj

de nervoj, psiko, angioj de koro kaj cerbo, spiro, digesto, genurina sistemo, haŭto k.a. Iuj disertacioj pritraktas la atingojn en esplorado pri frua kadukiĝo, adipozo, alopecio, mildigo de ebriiĝo, fumad-abstino, narkotaj-abstino, kosmetiko kaj aids-malsano kaj nombro da disertacioj konigas *ĝinglŭojn* (ĉefaj kaj akcesoraj vojoj, tra kiuj cirkulas la vitala energio kaj ĉe kiuj lokiĝas la akupunkturaj punktoj), akupunkturajn punktojn kaj eksperimentadon pri la teorio de akupunkturo; mokso kaj akupunktura anestezo.


La disertacioj de ĉinaj akupunkturaj kaj moksaj fakuloj montris ilian superecon en esplorado de akupunkturo kaj mokso. Ĉiŭ Maŭjang de la Nankina Ĉinmedicina Instituto prezentis 6

spertojn en altigo de la klinika kuracefiko de akupunktura kaj moksa terapioj gvidate de la teorio de la ĉina medicino. Han Ĝjiŝeng de la Pekina Medicina Universitato raportis sian progreson en la teoria esploro pri akupunktura sendolorigo. Kaj Joŭ Ŝiĝeng de la Jantaj-a Hospitalo de Ŝandong pritraktis sian sukceson en kuracado de kronika prostatito per lasera akupunkturo.

Ankaŭ al alilandaj fakuloj ne mankis bonegaj disertacioj. La ĉin-devena italo prof. Pan Ŝjanĵi diris en sia prelego, ke li sukcese faris 100 operaciojn pri eksterkorpa cirkulado de la koro per akupunktura anestezo. Li konkludis, ke akupunkturo povas anstataŭi anestezaĵon. Ankaŭ fakuloj de Japanio, Sovetunio, Pakistano, Nederlando kaj Egiptoj

La Unua Monda Konferenco pri Akupunkturo kaj Mokso





Prof. Ĝu Mingĉing de la Pekina Akupunktura kaj Moksa Instituto kuracas pacieron per akupunkturo en la konferenco.

tio konfirmis en siaj disertacioj la pozitivan rolon de akupunktura anestezo.

Akupunkturaj kaj moksj fakuloj kaj ĉigong-aj majstroj de Ĉinio demonstris en la konferenco pikadon de strumo per arĝenta pinglo, kuracadon de apopleksia hemiplegio per trapikado de kaphaŭtaj akupunkturaj punktoj kaj moksan kaj ĉigong-an kuracadon, kio multe interesis ĉinajn kaj alilandajn fakulojn de akupunkturo kaj mokso.

En la konferenco estis aranĝita la ekspozicio de sciencaj fruktoj de la ĉina medicino kaj kuracaj instrumentoj de pluraj landoj.

La nove elektita prezidanto de la federacio Hu Ŝjiming diris en la

konferenco: "Akupunkturo kaj mokso estas riĉaĵo ne nur de Ĉinio, sed ankaŭ de la mondo. La akupunkturo kaj mokso de Ĉinio apartenas al la mondo."

La fondiĝo de la federacio kaj la malfermo de la konferenco akcelos la disvolviĝon de akupunkturo kaj mokso en la mondo kaj montris, ke la ĉina akupunkturo kaj mokso fariĝis monda medicino.

Oni devas konfesi, ke akupunkturo kaj mokso, kiel multaj aliaj kuracrimedoj, ne estas ĉiopova. Sed fidindaj atestoj konvinkas, ke akupunkturo kaj mokso estas sufiĉe valora kuracrimedo kaj okupas gravan lokon en la tradicia ĉina medicino. ■

MASAĜO EKSTERFLANKE DE TIBIO

Teniĝo: En sida aŭ stara pozo (sida pozo preferinda).

Movoj: Premu la dekstran maleoloston per kvar maldekstraj kurbigitaj fingroj (kiel en la bildo 23) kaj la muskolon eksterflanke de la tibio per la fingropintoj, oblikve masaĝu ĝis sub la genuo kaj inverse. Unu fojo konsistas el unu masaĝo supren kaj malsupren. Poste masaĝu la maldekstran kruron sammaniere. Spiru nature.

Fojoj: Po 20-30.

Efiko: Forigi la doloreton ĉe tibio, kuraci malfacilan iradon, konvulsion de suro, ŝveliĝon de tibio, neregulan sango-cirkuladon kaj neviglan vitalan energion.

MASAĜO DE FEMURKAVOJ

Teniĝo: En stara aŭ sida pozo.

Movoj: Premu la femurkavon per la manplatoj (kiel en la bildo 24). Masaĝu ĝin supren kaj malsupren (nek tro supren nek tro malsupren, kun la femurkavoj kiel la centroj). Unu fojo konsistas el unu masaĝo supren kaj malsupren. Masaĝu unue la dekstrajn femurkavojn kaj poste la maldekstrajn. Spiru nature.


Fojoj: Po 20-30.

Efiko: Elastigi muskolon, vigligi vitalan energion, akceli sango-cirkuladon kaj forigi artralĝion.

MASAĜO DE GENU-FLANKOJ

Teniĝo: Kiel supre.

Movoj: Premu la genu-flankojn



23

24

MASAĜO (V)

per la manplatoj (kiel en la bildo 25). Masaĝu malsupren ĝis sub la genuo (forte malsupren kaj malforte supren) foje refoje. Unu fojo konsistas el unu masaĝo supren kaj malsupren. Masaĝu unue la flankojn de la dekstra genuo kaj poste tiujn de la maldekstra. Spiru nature.

Fojoj: Po 30-40.

Efiko: Elastigi muskolon, vigligi ĝinglĉio-ojn (vojetojn en la korpo), stimuli vitalan energion, akceli sango-cirkuladon kaj faciligi iradon.

MASAĜO DE GENUO

Teniĝo: Kiel supre.

Movoj: Premu la dekstran genuoston per la dekstra manplato (kiel en la bildo 26). Forte masaĝu malsupren (nur la genu-oston) foje refoje. Faru la samon al la maldekstra genuo per la maldekstra manplato. Spiru nature.

Fojoj: Po 30-40.

Efiko: Kuraci gravan aŭ negravan artrititon kaj malfortan iradon kaj mildigi la doloreton ĉe genu-osto.

TURNADA MASAĜO DE GENUO

Teniĝo: Kiel supre.

Movoj: Premu la dekstran genuon per la dekstra manplato kaj metu la maldekstran manplaton sur la dekstran mandorson. Turne masaĝu forte la genuon internen. La manplato kaj la genuo devas strikte kuniĝi kaj samtempe turniĝi (kiel en la bildo 27), alie la masaĝo ne donos efikon. Unu fojo konsistas el unu cirkla masaĝo. Post la internen-masaĝo, premu tiun genuon per la maldekstra manplato kaj metu la dekstran manplaton sur la maldekstran mandorson. Turne masaĝu forte la genuon eksteren. La fojoj de la internen- kaj eksteren-masaĝoj devas esti egalaj.

Post la turna masaĝo de la dekstra genuo, masaĝu forte la maldekstran genuon internen, kun la dekstra manplato sur la maldekstra mandorso. Poste masaĝu forte tiun genuon eksteren, kun la maldekstra manplato sur la dekstra mandorso. Spiru nature.

Fojoj: Po 30-40.

Efiko: Kiel supre.

MASAĜO DE MALEOL-FLANKOJ

Teniĝo: Kiel supre.

Movoj: Premu la maleol-flankojn respektive per la dekstra kaj maldekstra manplatoj (kiel en la bildo 28). Unu fojo konsistas el unu forta masaĝo antaŭen kaj malantaŭen. Vi povas fari tian masaĝon ankaŭ per unu mano laŭ via bontrovo. Spiru nature.

Fojoj: 20-30.

Efiko: Akceli sango-cirkuladon, kaj delikatigi haŭton, forigi kalkanajn frost-fendetojn kaj nigrajn haŭtajn sulkojn.

MASAĜO DE PIEDDORSO

Teniĝo: Kiel supre.

Movoj: Premu la dekstran pieddorsan per la maldekstra manplato (kiel en la bildo 29). Faru la samon al la maldekstra pieddorso per la dekstra manplato. Unu fojo konsistas el unu masaĝo supren kaj malsupren. Spiru nature.

Fojoj: Po 20-30.


Efiko: Akceli sango-cirkuladon kaj delikatigi haŭton. ■



25



26



27



28



29

Bildrakontoj de Ĉina Esperanto-Eldonejo



Sonĝo de Ĝenĝen

Teksto kaj bildoj de Mej Jing, tradukita de Ŭang Ŝijong 46p. 18.4 × 17.2 cm. 88-Es-193P US\$1,70 £0,80

Knabino Ĝenĝen estas tro elektema en manĝado kaj manĝas tre malmulte. Ŝi ofte manĝigas animaletojn per bongustaj manĝaĵoj, kiujn la patrino preparis speciale por ŝi. Iun tagon Ĝenĝen havis strangan sonĝon, en ĝi ŝi fariĝis tre tre malgranda, ke ŝi povas eĉ rajdi sur la dorso de libelo. Kune kun la libelo Ĝenĝen venis en insektan mondon... Ĉu vi volas scii, kian sperton ŝi havis? Legu la libron.

Magia Peniko

Adaptita de Han Ŝing, Pentrita de Li Ŝiĝji, Tradukita de Ĝjang Hongĝang. 40p. 18.5 × 21 cm. 88-Es-178P US\$1,30 £0,65

Ma Ljang estis malriĉa sed tre bonkora knabo. Li tre ŝatis pentri, sed li ne havis monon por aĉeti penikon. Tamen li diligente lernis ĉiutage. Li desegnis bildojn per vergo aŭ lignokarbo. Lia diligenteco kortuŝis feon, kiu donacis al li magian penikon. Ĉio pentrita per ĝi povas fariĝi vera. Per la peniko Ma Ljang helpis la malriĉulojn kaj punis la avidajn riĉulojn.

Kun ĉarmaj bildoj, facile komprenebla teksto, la libro estas bona legaĵo taŭga por infanoj aŭ komencantoj.

Transiro de Ponto

Bildrakontoj de Le Ŝjaŭjing
20p. 18 × 20 cm. 88-Es-305P US\$1,10 £0,56

En ĝi kolektiĝas 18 grupoj da karikaturaj pri infana vivo, pentritaj de konata ĉina karikaturisto Le Ŝjaŭjing. Plena de humuro ĝi alportos al vi elkoran ridon kaj ĝojon.

Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Perantoj de EPC

aŭ Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



ĈINAJ ARTOJ

Nuntempaj porcelanaĵoj

Fotoj de ĜAŬ ĜIŜŬO

Bulbo-forma vazo kun de-
segno de peonioj kaj birdoj
farita en Gŭangdong

Vazo kun du oreloj en formo de elefanta
rostro (maldekstre), tri-pieda vazo (meze)
kaj vazo kun kvadrata aperturo kaj du oreloj
(dekstre) faritaj en Henan



Bludsegna flon




Homa figuro kun



vazo farita en Ĝingdeĝen

blua desegno farita en Ĝingdeĝen



Florvazo farita en Hebej





La plado "Belulinoj en Prin-
tempa Ekskurso" farita en
Hunan



Vinrinkilaro kun desegno de fluganta drako farita en Fuĝjan

KREI SIAN FIGURON PER SIAJ VERKOJ

— Pri verkisto Ke Junlu

“Mi ne volas malkaŝi al la publiko mian personan vivon, nek fariĝi objekto de la publika atento. Verkistoj kreas sian figuron ĉefe per siaj verkoj. Ili devas esti memfida al siaj verkoj,” tiel li komencis la parolon. “Mi estas memfida al miaj verkoj. Mi kredas, ke mi povos verki pli kaj pli bone, pli kaj pli da legantoj ŝatos kaj akceptos miajn verkojn. Ili transiros la landlimon kaj estos akceptataj de la tutmonda publiko.”

Li estas verkisto Ke Junlu. Ni unuafoje intervidiĝis. Lia prologo sentigis al mi fortan virecon. Tuj forvaporigis mia impresoj, kaŭzita de lia ordinara aspekto kaj vesto.

Sendube lia memfido havas solidan bazon.

La 41-jara Ke Junlu naskiĝis en familio de ordinara intelektulo. Antaŭ dekkelkaj jaroj li laboris 4 jarojn en kamparo de Ŝanŝji-provinco kaj poste funkciis kiel laboristo en nilon-fabriko de Ŝanŝji. En 1980 lia unua novelo “30 Milionoj” pri reformo en fabriko estis premiita kiel la tutlanda eminenta novelo. Post tio li kaj lia edzino kune verkis “Malfacila Endormiĝo” kaj aliajn 4 novelojn.

En 1984 aperis lia romano “Nova Stelo” kun 400 000 ideogramoj, ĝi vekis grandan eĥon tra la tuta lando. Post kiam la televida adaptaĵo de la samtitola romano surekraniĝis, la furoro de “Nova Stelo” envolvis la tutan landon. Reformado fariĝis la temo ŝatata de la publiko. Kiam oni interparolis pri la reformado, ili

ĉiam menciis la televidan filmon “Nova Stelo”.

“Nova Stelo” prezentas diversajn personojn de izolita, antikva gubernio ĉe la baseno de la Flava Rivero. En la gubernio Guling, famiĝinta jam antaŭ miloj da jaroj, iris batalo inter renovigo kaj konservativo, progreso kaj postĝinteco, civilizacio kaj malklereco, demokratio kaj arbitreco. En la romano la malgranda gubernio Guling spegulis la tutan landon. La aŭtoro priskribis la bolantan realan vivon en la varma tajdo de la reformado, la “Guling-an ritmon” — rapidegajn reformadon kaj laborstilon en la gubernio,

post kiam venis tien labori Li Ŝjangnan, juna sekretario de la gubernia partia komitato. Li priskribis la historian pezajon — burokratisman reton formitan de aro da oficistoj kun guberniestro Gu Ĵong kiel ĝia kerno kaj ankaŭ la postĝigajn feĉojn prezentantaj la feŭdajn konceptojn, klare montris la aktualecon, malfacilecon kaj kompleksecon de la reformado.

Modlinte Gu Ĵong kaj aliajn burokratojn grandajn kaj malgrandajn, la romano profunde sekis iun flankon de la nuna ĉina socio — negativan flankon en la reala vivo. Gu Ĵong, vicsekretario

S-ro Ke Junlu



de la gubernia partia komitato kaj guberniestro, estas kompare sukcese modlita arta figuro. En la proksimume 40-jara politika vivo li formis sian kompletan da kutimajn spertojn, kompletan da politikajn regulojn kaj kondiĉita reflekso. Li estis rigora al la intimuloj, tenera al la malproksimumuloj, ofte prezentis siajn opiniojn per ĉirkaŭfrazoj, surhavis pompajn vestojn por diversaj malhonoraj egoismaj agadoj. Pere de Gu Ĵong la aŭtoro rivelis feŭdan patriarkan penson kaj dekadencajn artifikaĵojn, ĉio ĉi montris liajn akran observadon kaj analizon forton de la vivo.

La aŭtoro dediĉis grandan fervoron al kaj enkorpiĝis sian idealon en Li Ŝjangnan, ĉefan heroon de nova stelo en la reformado. Li Ŝjangnan luktis kontraŭ Gu Ĵong ne por potenco kaj profito, fakte li batalis kontraŭ la postiĝinteco kaj konservativo de la gubernio, por ke la gubernio fariĝu la plej riĉa loko en Ĉinio. Tio ne estis iluzio, nek arogo. Lia ambicia plano pri reformado baziĝis sur la profunda enketado kaj esplorado. Koncerne tion, li ja estis harmonia kombiniĝo de ideala, kuraĝa kaj prudenta gvidanto kaj praktikanto, kiu bone konas la popolan staton, serĉas veron el la objektivaj faktoj kaj emfazas efikan rezulton. Li estis pioniro, antagonisma al burokratismo. Li elektis la akceptejon de la gubernia registaro por komenci reformadon en Guling. Sole en unu tago li solvis 14 malnovajn kazojn. Li gvidis la membrojn de la konstanta partia komitato de la gubernio iri en la vilaĝojn kaj ĉeloke solvis la problemojn pri fiŝbredado, tegmenta disfalo de elementlerneja domo kaj mishako de arbaroj. Ĉio ĉi montris la mirigan administran rapidecon de li, juna reformisto. Tio kompreneble celis skurĝi burokratismen, frakasi barojn survoje de la reformado kaj ankaŭ montris novajn karakterojn de li, reformisto en la moderna vivo.

Fakuloj opinias, ke la romano "Nova Stelo" vizaĝe al la realo, aktuale kaj koncentre spegulis la reformadon en la ĉinaj gubernioj kaj diversajn konfliktojn kaj batalojn en la kampara konstruado, kio estas multe valora. Tio montras ankaŭ, ke la aŭtoro estas malproksimumida kaj prudenta. La romano, serioza en stilo, impona en spirito, abunda je pasio kaj dialektiko, portas fortan modernecon kaj la lokajn trajtojn de la leŭsa altebenaĵo.

Post "Nova Stelo", Ke Junlu publikigis novelojn kaj romanojn "Izolita Insulo", "Tagiĝo kaj Vesperigiĝo", "Historio de Sistem-inĝenierada Fakulo" kaj "Nokto kaj Tago", entute kun 1 600 000 ideogramoj. La romano "Nokto kaj Tago", la baldaŭ eldonota "Pereo kaj Prospero" kaj la neplenumita "Pereo kaj prosperiĝo" estas kune titolita trilogio "Ĉefurbo". Ili kune nombras 1 800 000 ideogramojn. "Nokto kaj Tago" estas ĝemela romano de "Nova Stelo". Li Ŝjangnan kaj aliaj gravaj herooj en la romano "Nova Stelo" daŭre viglas en la romano "Nokto kaj Tago" kun la fono de la somero de 1982. Tamen juĝate laŭ pli rigora signifo "Nokto kaj Tago" estas ankaŭ memstara verko. Ĝi priskribis socian vivon, tute malsaman ol tiu en "Nova Stelo": Unu pri kamparo kaj la alia pri urbo. Ankaŭ ĝia arta stilo diferencas de tiu de "Nova Stelo".

Pri sia trilogio "Ĉefurbo", Ke Junlu diris: "Mi volas komplete prezenti ĉiujn sociajn tavolojn de Ĉinio en la verkaro inkl. tiujn de politiko, ekonomio, vivo, kulturo, etiko, moralo kaj ĝenerala tendenco de la disvolviĝo de ideologio kaj akademio. Tio estas panorama kaj enciklopedieca verko spegulanta la socian vivon de la moderna Ĉinio."


Koncerne sian verk-arton, Ke Junlu, verkisto kun malpli alta statur, diris laŭte: "Mi nature aplikas en mia verkado la

teknikojn, kiam ili povas sufiĉe, profunde kaj ĉioamplekse speguli la vivon. Se ne troviĝas tia tekniko, mi do kreas ĝin."

En 1986 Ke Junlu unuafoje prezentis teknikon de verkado "moderna realismo". Tiu freŝa esprimo entenas multajn signifojn. Unu el ili estas, ke verkisto devas havi sentojn apartan kaj proksimiĝeman kaj fari ilin perfekta unuiĝo, alivorte, ĉiu ajn verkisto devas esti tre sentema pri la gravaj aferoj de la socio kaj la socia ŝanĝiĝo. Kiam li esprimas ilin en literatura formo, li devas stari sur la historia, filozofia kaj arta alteco, sed ne simple priskribi la aferon.

Ĝuste pro intimeco al la socio, Ke Junlu ĝentile rifuzis la inviton de la Ŝanŝji-a Verkista Asocio al Tajjŭan por tie fiksloĝi kaj daŭre loĝas en la laborista loĝejo de la Nilon-fabriko de Juci. Li diris, ke loĝante en la malgranda urbo, kia Juci, li havas pli da eblo kontakti laboristojn, kamparanojn kaj koni ilian vivon, kio ja estas utila por lia verkado.

Ke Junlu ne volantas pli multe paroli pri sia verko, precipe pri la jam publikigita verko. "Mi volas, ke la legantoj mem faru recenzon kaj tion faru ankaŭ la historio," diris Ke Junlu. "Se iu alilanda amiko volas vere koni la modernan ĉinan socion, mi do rekomendus al li la verkaron 'Ĉefurbo'." ■



Gu Heng kaj Li Ŝjanganan

— Paragrafo el la romano “Kadukiĝo kaj Prospero”

“Kadukiĝo kaj Prospero” estas la dua romano de la trilogio “Ĉefurbo” de Ke Junlu. Ĝia unua volumo estos baldaŭ publikigita. En tiu romano, grave ŝanĝiĝis la sorto de la heroo Li Ŝjanganan de la romanoj “Nova Stelo” kaj “Nokto kaj Tago”. La nuna paragrafo estas interparolo inter la sekretario Gu Heng de la provinca partikomitato kaj la sekretario Li Ŝjanganan de la gubernia partikomitato.

— La Red.

Dum la manpremo kaj Gu Heng kaj Li Ŝjanganan sentis la forton de karaktero de la kompano.

Tiu ĉi estas plaĉa junulo, la stopla barbo ferkolora, la vesto malluksa, la gestoj kaj teniĝo modestaj, diskretaj, respektaj kaj senafektaj. Je la ekvido de Gu Heng la junulo montris koran ĝojon, kiun ofte havas junuloj ŝatataj de siaj superuloj. Tio kontentigis Gu Heng. Li ne ŝatas junulojn humilaĉe obeemajn kaj belafektajn, nek tiujn arogantajn kaj senskrupulajn. La nuna junulo, sendube, bone scias, kian rolon li devas ludi siaflanke. . . Ĉu Ŝjaŭli vere edziniĝos al li? Tia rezulto estos, kompreneble, nenatura, tro “rigida” — strange, kial ekestis la sento de “rigideco”?

La sekretario de la provinca partikomitato staranta apude — iagrade li decidis la sorton de Li Ŝjanganan — estas altastatura kaj humura. Lia manpremo sentigis entuziasmon, forton, senceremoniecon kaj kavalirecon. Post manpremo li tuj forskuis la manon, kio plene prezentis lian kredon je sia forto. Lia rido laŭta, la okuloj aglaj kaj la sinteno superrega. Aperis ankaŭ Ŝjaŭli. Ŝi

petole grimacis post la dorso de sia patro, kaj ŝiaj okuloj radiis de ĝojo. En palpebruma daŭro Li Ŝjanganan jam sentis la psikan premon pro la parolo — tian premon li plurfoje sentis dum la preparo de la interparolo.

“Nu, sidiĝu tie, kaj mi ĉi tie. Ni metu nin en dispozicion de interparolo, ĉu bone? Verŝu senrezerve viajn opiniojn penetri-vajn. Jen la stilo de heroo!” humure komencis Gu Heng gestante.

Ambaŭ sidiĝis en la legoĉambro. Soleneco kaj kvieteco regis en la ĉambro. La diafanaj purpuraj fenestrokurtenoj mildigis la brilan matenan sunlumon. Unu el la flankoj de la ĉambro estas okupita de libroŝrankoj, kaj la ceteran spacon okupis grandega skribotablo, sofoj kaj te-tableto, sur kiu staris envaza miniatura pejzaĝo.

“Ĉu vi ricevis mian respondan leteron senditan al via gubernio?” Gu Heng demandis kun rideto, kontente frotante la glatajn lignajn apogilojn de la fotelo. Je la ekvido de Li Ŝjanganan lia agrabla memoro pri la antaŭaj interparoloj vekis ĉe li varman ekscitiĝon. Li sentis esperon kaj

ĝuon, ke li povas havi kun tiu junulo profundan interparolon neoportunan en la ordinara medio, senkaŝe montri politikan saĝon, kiun oni devas implici en la ordinara medio, kaj rikolti kompletan komprenon kaj laŭdon de la kompano.

Li ekŝatis Li Ŝjanganan ĉe ilia unua interparolo. Li tro malofte havas tiel plaĉan kaj junan interparolanton, kia Li Ŝjanganan.

“Mi jam ricevis. Via letero multe kuraĝigis min,” respekte kaj iom ĝenate respondis Li Ŝjanganan. “Vi bone komprenas kaj subtenas min, kaj mi devas labori pli pene.”

“Ne, ne, Li Ŝjanganan. Vi ne faru al mi komplimentojn, kiam vi estas kritikata kaj tre bezonas Gu Heng, sekretarion de la provinca partikomitato, kiel vian apogilon. Kiom ajn vi komplimentas min, mi ne bezonas plenumi la devon protekti vin, ĉu vere?”

Dirinte tion, Gu Heng tuj sentis, ke li jam liberigis sin de la kutimaj implico, diskreteco kaj digneco de altrangulo, kaj dronis en ekscitiĝo pro la malkaŝema interparolo. Alie tuj montriĝus la specifa tono de “altrangulo” kune kun la korelativa mieno: Mi pensas, ke

mi komprenas vin junulojn. Mi ĝojas, ke mi povas trahaki por vi la vojon. Vi laboras vere bone, vi estas influa. Kaj ĝuste pro tio iuj ĉikanas vin. Ŝajnas al mi, ke vi devas bone prepari vin al io eventuala...

La malkaŝema parolo de la sekretario de la provinca partikomitato estis iom ekster la atendo de Li Ŝjangnan.

“Jes, tion mi komprenas,” li ankoraŭ estis en ĝeniĝo.

“Kion vi komprenas?”

“Mi opinias, ke en tiu ĉi tempo mi ne devas diri al vi komplimentojn. Sed...”

Ĝus antaŭe Ŝjaŭli portis al ili du glasojn da akvo kun glacio, kaj nun ŝi refoje venis per gajaj paŝoj sub la preteksto: “Jen du glaciaĵoj por vi.” Ŝi ŝajnis sin foriranta, sed fakte ŝi staris tie kaj, returninte la kapon, atente aŭskultis.

“Ha, Ŝjaŭli, vi foriru! Mi volas kun Ŝjangnan interparoli pri io serioza,” diris Gu Heng.

“Mi povus doni konsilojn al nia sekretario de la gubernia partikomitato... hm!” foriris ŝi, petole grimacante.

“Sed, sekretario Gu, mi volas diri nur la veron, ke mi ne bezonas multe paroli pri mia nuna situacio,” diris Li Ŝjangnan, “ĉar mi kredas, ke vi certe subtenos min, se la kondiĉoj permesos. Mi, junulo dorna, iom kritikema, estas malfacile tute komprenata de superuloj. Konatiĝi kun vi estas feliĉo por mi en la tuta vivo. Via kompreno ofte instigas min disvolvi mian talenton super mia efektiva kapablo. Mi por ĉiam restos dankema al vi, eĉ se vi ne povos protekti min pro la objektiva kialo.”

“Ŝjangnan, mi devas diri, ke mia helpo kaj subteno al vi estas malforta,” diris Gu Heng, “—ba, ankaŭ tiu vorto estas ceremoniaĵo,” li malkontente svingis la manon kaj daŭrigis, “Ni



parolu senkaŝe. Mi povas esti kalkulata kiel politikisto, ĉar mi regas provincon, kaj ankaŭ vi politikisto, ĉar vi regas gubernion. Vi estas tre taŭga sekretario de gubernia partikomitato. Sed vi nur estas unu ŝakpeco sur mia ŝaktabulo. Kompreneble, vi estas bona ŝakpeco, sekve mi ŝatas vin kaj promociis vin. Via malsukceso ja signifas mian malsukceson en nomumo de funkciuloj. Do nur pro tio mi devas multe peni por protekti vin. Kaj plie, ni havas la saman karieron de reformado. Tial, vi ne devas diri al mi, ke vi dankos min dum la tuta vivo. Hodiaŭ, kion ajn vi diros, eĉ se la plej puran veron, sendube, vi havos klaran celon, ĉu ne? Tamen, se mi ne estos sufiĉe potenca por protekti vin, mi do devos

flankenmeti la aferon. Mi devas konsideri, kiel uzi taktikojn por mia tuta ŝakludo.”

“Tial,” aplombe diris Li Ŝjangnan, “hodiaŭ mi venas fari al vi kelkajn proponojn pri la laboro de la tuta provinco.”

“Ĉu?” Gu Heng sentis iom da surprizo kaj ekbrilis liaj okuloj.

“Kaj cetere, mi petas vin tralegi mian raportaĵon.”

“Pri kio?”

“...” Li Ŝjangnan ekhezitis kun rigardo mallevita kaj respondis, levinte la kapon, “miaj notoj pri ‘La Socialismo de Ĉinio’.”

“Ho, Li Ŝjangnan!” Gu Heng ekridegis montrante fingron al li, “ĉu vi faris sufiĉan konsideradon?”

Ĉu vi volas gajni per tiu surprizo la korinklinon de la sekretario Gu Heng? Ĉu?"

Li Ŝjangnan ekridis sen ajna ekspliko.

"Ĝeneraldire, via taktiko estas tre saĝa. Mi ja estas tuŝita de via lerta taktiko, kvankam mi jam tute travidis vian celon. Ha, ha, mi devas konfesi, ke mi interesiĝas pri via propono por la laboro de la tuta provinco kaj via pripenso pri la socialismo de Ĉinio. Tamen mi malkaŝu vian ruzon: Hodiaŭ vi venis al mi por liberigi vin el la krizo, ke vi estas kritikata kaj alfrontas la danĝeron de ekŝiĝo. Alie via tuta aspiro al la socia reformado ne povus esti realigita. Tial, ĉiu via vorto portas la celon apertan aŭ kaŝitan. Ju pli profunde vi kaŝas vian celon, des pli akriĝas mia singardemo. Ha, ha!" Laŭte ridis Gu Heng, ekŝvingis la manon strategiiste. "Tiam, mi proponu al vi, ke vi parolu kutime kun mi en la plej mallerta maniero, kaj ĝuste tia maniero estas la plej sagaca por mi. Rekte konfesu al mi vian celon, vian turmentigon malfacile publikigeblan kaj ankaŭ vian ruzon ĉirkaŭi min."

Antaŭe la interparolo inter Li Ŝjangnan kaj Gu Heng temis ĉefe pri politikaj principoj, kaj nun li estis unuafoje esplorata de Gu Heng. Li ne povis ne esti konkerita de lia stilo. Tuj fariĝis afektaj kaj ridindaj liaj sentoj de superba tragika heroeco, kiuj leviĝis ĉe endomiĝo.

"Volu doni al mi cigaredon," li tuj demetis la humilan mienon kaj senceremonie etendis la manon.

"La cigareda porcio por mi estas tro malgranda. Hejme oni limigas min je la kvanto de cigaredoj. Mi povas doni al vi nur unu."

"Mi petas cigaredon pro tio, ke vi fumas ĉi tie. Mi faras tion por akiri psikan egalecon kun vi," Li Ŝjangnan ekbruligis la cigaredon.

"Verdire, mia interparolo kun vi estas sufiĉe bone preparita. Hieraŭ vespere mi plenigis plurajn foliojn per la skizo de la interparolo." Li Ŝjangnan faris kelkajn plenpulmajn enspirojn, levis la kapon kaj senkaŝe komencis la interparolon: "Mi difinis kelkajn regulojn por mia parolo."

"Do diru."

"Unue, mi venas ne por plendi, nek por embarasi vin."

"Due, mi certigas, ke mi ne plendos kontraŭ vi, eĉ se vi ne povos protekti min. Tio estas vera."

"Trie, en tiu momento mi devas pruvi, ke mi zorgas ne sole pri mia propra sorto, sed pli multe pri la tuta kariero, la vastasenca situacio. Kaj mi ankoraŭ volas — mi jam malkaŝe konfesis al vi (sincere kaj humure) — sentigi vin, ke mi estas tre utila por kaj bezonata de vi."

"Jes, daŭrigu."

"Tial hodiaŭ mi devas malmulte paroli pri mi mem kaj peti helpon, sed multe pri la laboro de la tuta provinco interesanta vin. Eble tio estas plaĉa al vi? Kaj cetere, mi devas paroli pli vaste, de nia provinco al la tuta lando. Jen mia principo."

"Kaj plie!"

"Nur tia principo morale konformas al mia personeco, sente al mia korstato kaj taktike," ekridetis Li Ŝjangnan, "nur tiel mi povas gajni vian plian komprenon kaj korinklinon. Kaj tio estas la plej konforma por mi al la neceso liberigi min el la persona krizo."

"Ha, bone, mi estas volvita jam en vian sisteman teorion." Gu Heng laŭte diris al Li Ŝjangnan montrante la fingron al li, "Hodiaŭ ni devas akiri veron: ĉiu homo estas pli komplika ol ni lin konas. Jen alia vero: Kiam oni malkaŝas sian plej profundan penson, ili fariĝas simplaj, kredeblaj, interesaj! Ĉu? Kia rezulto,

se hodiaŭ mi komencus la interparolon ne per la malkaŝema kaj sincera principo?" humure diris Gu Heng, stariĝis kun grava mieno, faris kelke da paŝoj en la ĉambro kun la manoj post la dorso kaj daŭrigis sian parolon: "Kutime, la granda parto de nia saĝo estas uzata por kaŝi nian veran penson kaj diveni alies veran motivaĵon!"

Li Ŝjangnan estis interparolanta kun la patro. Ŝjaŭli estis ĉiam en ia ekscitiĝo, havis la viglan intencon kuraĝe ŝarĝi sin per io, kaj cetere ian intimecon. Ŝi povis vidi, ke la patro ŝatas Li Ŝjangnan. Feliĉe, ke la interparolo dece okazis en ŝia hejmo. Ŝi rimarkis, ke ŝi aspiras pri edziniĝo kaj starigi sian neston laŭ la maniero de la infanoj en ludo. La deziro estis tiom nebula, afero estonta kaj nedecidita, tamen ĝuste pro tio, ĝi estis bela kaj alloga.

Ĉiufoje, kiam ŝi iris en la ĉambron, la patro ĵetis al ŝi ekzamenan rigardon por konstati, ĉu sento fluas inter ŝi kaj Li Ŝjangnan. Ŝi tute ignoris tion. Se ŝi restis en la legoĉambro nur unu minuton, ŝi vigligis la atmosferon kaj varmigis sin mem kaj ankaŭ la ĉambron; kiam ŝi foriris, ŝi restigis la gajan atmosferon kaj samtempe forportis sian aŭreolon. Ŝi vere sentis, ke ŝi portas ĉirkaŭ si aŭreolon oranĝan, brilan, ardan. Apenaŭ ŝi atingis la vestiblon, la muroj jam estis oranĝe kolorigitaj.

Ŝi ja estis granda oranĝa lanterno.

Sed kiam ŝi, elirinte el la kuirejo, trapasis la vestiblon kaj kiam ŝia rigardo renkontiĝis kun tiu de la patrino, ŝia temperamento estis iom detruita. La rigardo de la patrino evidentigis malkontenton. Kiel nigra maljuna arbo rekta kaj rigida, la patrino ĉiam rompis ŝian oranĝan aŭreolon. Sed kiam ŝi turnis sin kaj malaperis el la vido de la patrino, ŝi denove vigligis kiel kutime.

Hodiaŭ ŝi trovis, ke ŝi tre ŝatis la

karakteron de Li Ŝjangan. Ŝi ŝatis lin, ke li estas same entuziasma kiel ŝi — ŝi povis senti varmecon de lia korpo; kaj ŝi ŝatis lin ankaŭ pro tio, ke li ne estas tiel furioza, vigleca kaj senpacienca kiel ŝi. Li estis diskreta, sinretenema, aplomba, rezonema kaj neekscitiĝema, tute malsama ol ŝi.

Same kaj ankaŭ malsame!

Subite ekbrilis ŝiaj okuloj kaj ŝi manklakis. Ŝi trovis la grandan

veron: Virino ŝatas viron karaktere similan kaj malsimilan al ŝi mem. Tio estas vero de la amo. La "simileco" metas ilin ambaŭ sur saman ebenon, kaj ili povas interkomunikiĝi; kaj la "malsimileco" povas akordigi la konkavan kaj konveksan flankojn de la malsamaj karakteroj, pere de tio ili ambaŭ povas adaptiĝi unu al la alia, helpi unu la alian kaj reciproki novan signifon!

Per tiu kriterio ŝi ekzamenis

konatajn feliĉajn parojn da geedzoj kaj geamantoj, kaj neniu paro estis escepto. Por la geamantoj nepre necesas granda simileco en la karaktero, ĉar tio estas la bazo de amo; sed nepre necesas ankaŭ granda malsimileco en la karaktero, ĉar ankaŭ tio estas la bazo de ilia solida kunvivo.

Kiel interese!

Ŝi ja serĉadis amaton karaktere similan kaj malsimilan al ŝi.

"Min interesas kaj viaj proponoj pri la laboro de la tuta provinco, kaj viaj notoj pri la socialismo de Ĉinio. Sed pri tio ĉi ni interparolu poste. Min interesas nun la sorto de vi Li Ŝjangan. Nu, ĉu tio ne estas via deziro?" Gu Heng diris karese kaj humure, "ni objekte analizu, ĉu ni povos solvi la problemon kaj kiel solvi ĝin. Kiom vi scias pri la fono de la afero?"

"Estas tiel," Li Ŝjangan senkaŝe diris, "nun miaj kontraŭuloj ĉefe ne estas en la gubernia kaj provinca gvidantaroj — kompreneble, iuj el ili rilatas kun la afero — sed en Pekino. Mia artikolo kaj mia konduto en Guling estis iom rigidaj kaj koncepte pikis iujn. Kaj cetere, ĵaluzo de iuj samtempuloj estis rekte ekscitita. La du flankoj formis teruran fonon. Ili ĝuste kaptis la ŝancon. Nun ili tenas en la manoj leterojn, kiujn mi skribis al mia kunlernantino — pri tio mi informiĝis ĵus antaŭe. Eble la leteroj povas esti ilia efika armilo por ataki min."

"Mi jam legis la kopion de la leteroj."

"En la leteroj mi diris ion senbride, komentariis politikojn de la ŝtato, kaj la dirmaniero estas iom aroganta, tial nun ili atakas min, ke mi estas ambiciulo aspiranta esti ĉefministro — mi ja skribis en la leteroj: Se mi estus ĉefministro, mi farus tion kaj ĉi tion — ke mi malestimas ŝtatajn gvidantojn."



(Daŭrigo de p. 54)

avantaĝoj de d.e. Tio estas ĝojiga, tamen mi estas malkontenta pro "la forgesemo" de la skribintoj. Neniu skribis pri la problemoj, kiujn la entreprenemaj gepatroj alfrontos post la decido por eduki siajn gefilojn d.e.

Ĉi-foje mi deziras mencii nur la miaopinie plej gravan: la manko de konvenaj poemetoj, rimaĵoj-ludoj por etaj (1-3-jaraj) infanoj. Povas esti, ke aliaj gepatroj opinias tiajn porinfanaĵojn ne-gravaj aŭ ili mem verkas rimaĵojn,

sed mi ne apartenas (is?) al tiuj gepatroj.

La hejma "fabrikado" de la ŝanĝe simplaj rimaĵoj ofte rezultigas mizerajn verkaĉojn kaj malutilas pli al la infanoj ol la malhavo de rimaĵoj. Trafoliuminte kelkajn ekzemplerojn de la iama Gepatra Bulteno mi trovis eĉ ne unu el tiaj verkaĉoj.

Pri kiaj rimaĵoj-ludoj mi pensas? Pri simplaj t.n. nutristinaj rimaĵoj, kiaj ekzistas abunde, kaj en libroj kaj surbendigite, en la naciaj lingvoj kaj tio ebligas

amuzan kunludon de gepatroj kaj infanoj.

Ĉu iu povas mencii almenaŭ unu kaseton aŭ libron kun tiaj kantetoj kaj rimaĵoj aŭ bele ilustritajn fabellibrojn pri la klasikaj (Grimm, Andersen) fabeloj?

En la germana, angla kaj hungara lingvoj mi disponas pri ludeblaj rimaĵoj kaj mi volonte alsendos al la helpemaj esperantistoj-verkistoj.

HEGEDÜS FERENC (Hungario)

"Jes..." Gu Heng skuertis la kapon, "sed kiu lasis vin agi tiel elstare en Guling, ke multaj ĵurnalistoj raportis pri vi?" Post momenta silento li daŭrigis sian parolon vespere kaj humure, "malestimi ŝtatajn gvidantojn? Ĝeneraldire, la socio ne havos sian estontecon, se la junuloj ne malestimas la maljunulojn. Mi ja klare scias, ke vi malestimas min — kvankam vi ofte diras, ke mi estas akrevida, edifa por vi, tamen fakte vi kredas en la koro, ke vi estas pli eminenta ol mi! Tion vi ne bezonas nei!" Gu Heng malpeze svingetis la manon, "post dek jaroj, se vi estus sekretario de provinca partikomitato aŭ ĉefministro, eble vi laborus admirinde." Post paŭzo li daŭrigis, "sed tia hipotezo havas nenian bazon de realeco, ĉar tio ne dependas de la homa volo. Kaj plie, fari sin ĉefministro estas multe pli komplike ol bone plenumi la rolon de ĉefministro! Tio eble estas ĝenerala leĝo tra la mondo."

"Nun la ŝlosila problemo estas, ke mi ne povas senkulpigi min pri tiuj leteroj. Vi bone komprenas min, kaj vi povas aserti, ke mi estas komprenema, ambicia. Sed iuj aliaj povas kritiki, ke mi estas karierema, aroganta."

"La leteroj mem ja ne estas atesto de ia krimo, sed se oni intencas kalumnii vin, ili povas uzi

la leterojn kiel ateston. Per tiuj leteroj oni ne povas kondamni vin, sed via reputacio estos makulita. Iafoje, reputacio decidus la sorton!... Kion vi pretas fari?"

"Mi ne scias."

"Laŭ mi, la plej bonaj kontraŭrimedoj estas, unue, ke mi ne helpas vin klarigi la aferon, ĉar estas malfacile por mi klarigi ĝin; due, ankaŭ vi ne faru ian klarigon kaj lasu la aferon. Cetere, vi devas prepari vin al plua malboniĝo de la afero. Mi eble transpostenigos vin kadre de la provinco, malpromocios vin kaj flankenmetos vin por certa tempo. Kaj vi devas subtiri la voston kaj atendi la pason de la afero. Mi poste helpos vin."

"Ofte oni senkaŭze enketas iun kelkajn jarojn kaj venas al neniu konkludo, tiel ke la prienketo perdas la bonan ŝancon por disvolvi sian talenton."

"Ne estu tiel pesimisma pri la

afero. Iafoje ekzistas danĝero kiun ni ne povas rimarki, kaj iafoje ekzistas bonŝanco kiun ni ne atendas. Ekzistas alia eliro: ĉu vi povos trovi iun, kiu pledas por vi?"

"Tro malfacile," Li Ŝjangan kuntiris la brovojn meditante, "certe mia patro ne helpos," li paŭzis kaj daŭrigis, "nun por mi la unika metodo estas, ke mi verku artikolon pri la socialismo de Ĉinio surbaze de miaj notoj kaj prezentos ĝin kiel peticion al la supera instanco."

"Mi legu la notojn la unua," Gu Heng profunde vespiris kaj medidadis por liberigi tiun talentan junulon el embaraso, "vi devas prepari vin psike: kelkiam por pruvi sin kaj rebonigi la reputacion, ne helpas sole fari pli da laboro."

Ŝjaŭli vokis la patron al telefono, kaj finiĝis la interparolo. ■

KARIKATURO



Granda realisma poeto

Du Fu

de MEJ ĜI

Du Fu estis unu el la plej famaj ĉinaj poetoj de Tang-dinastio (618-907 p.K.). Li kaj la granda poeto Li Baj vivis en sama epoko. Ili estis intimaj amikoj.

Li Baj kaj Du Fu atingis preskaŭ same grandajn sukcesojn en la poezio, tial oni nomis ilin kune Li Du. Sed iliaj poemoj estis originalaj en ideologia enhavo kaj arta stilo. Simple dirite, la poemoj de Li Baj estas freŝaj kaj revoriĉaj kaj karakteriziĝas per romantika koloro. Sed tiuj de Du Fu estas melankoliaj kaj elspiras realisman koloron. Li puŝis la realisman literaturon de Ĉinio al nova etapo, kio estis lia plej grava kontribuo en la ĉina literaturo. Liaj poemoj estas verkitaj laŭ okazoj. Simile al ĝenroj, ili prezentas la tiaman socian fizionomion de

malsamaj flankoj. Tial de antikve oni honoras liajn poemojn per historio en versoj.

La realisma spirito de liaj poemoj prezentiĝas unue en la satiro kaj malkaŝo de la diboĉo, putriĝo kaj krueleco de la reganta klaso. Tiuj poemoj estas "Balado pri Vintra Ĉasado", "Balado pri Belulinoj" kaj aliaj. "Balado pri Vintra Ĉasado" priskribas la imponan kaj bonordan ĉasadon, alude ironias, ke lokaj registoj antaŭ ŝtataj danĝeroj nur sin amuzas per ĉasado. "Balado pri Belulinoj" mokis per ekstreme akraj kaj implicaj priskriboj la senkomparan diboĉon de la arogantaj kaj senhontaj imperiestraj boparencoj Jang Gūoĝong kaj liaj fratinoj. La poemo objektive priskribas la vivon de tiuj aristokratoj.

*"La tria de l' monato tria belas la vetero,
ekskuras multaj belulinoj ĉe Ĉjuĝjang-rivero¹.
En delikata blanka haŭto k' statur' gracia
sintenas ili en nobela alta maniero.
Broditaj pavo kaj ĉjilin² el oro kaj arĝento
sur silkaj vestoj rebriladas en tard-primavero.
Kio troviĝas sur iliaj kapoj?
Smerald-folioj ĉarmaj pendas ĝis sub la oreloj.
Kio vidiĝas post iliaj dorsoj?
Koketas zonoj ornamitaj riĉe ja per perloj."*

Tiuj nobelinoj estis gravaj personoj kun granda potenco, favorataj de la imperiestro Ŝjūanzong, sed Du Fu senkompate malkaŝis ilian lukson. En siaj poemoj Du Fu ne nur prezentis fiagojn de la regantoj, sed ankaŭ plurfoje malkaŝis la akran antagonismon inter la klasoj en la feŭda socio. En lia poemo "Jarfina Festeno" legiĝas jenaj versoj:

*"La registoj abomenas vinon kaj viandon,
Sed teksiloj kaj kabanaj vakas en kampo."*

En la poemo "Meditado sur la Vojo al Fengŝjan" legiĝas jenaj versoj:

*"En la kortego ruĝa dividiĝas
silkaĵoj, kiujn povrulinoj kreis.
Perforte oficistoj rabis ilin,
kaj ili al palac' liveris."*

En la sama poemo, per pli lakonaj versoj li brile sintezis la fenomenon de la klasa antagonismo:

"En ruĝaj domoj putras vin', viando,



dum frostmortintoj kuŝas ĉe vojrandoj."

Unuflanke, nobeloj vivis en lukso kaj diboĉado kaj, aliflanke, plebanoj mortis eksterdome de frosto kaj malsato. Tio estis ne nur objektiva kontrasto de riĉo kaj malriĉo, sed ankaŭ forta malkaŝo de la ekspluatado de la reganta klaso al la laboranta popolo. Kvankam Du Fu ĉiam portis fidelecon al la imperiestro kaj metis sian esperon pri la nacia sorto sur lin, tamen li montris sian indignon kontraŭ la regantoj kaj esprimis ĝin en siaj poemoj. En tio li havis klaran temon de poemo kaj atingis senprecedencan nivelon.

Liaj travivaĵoj ebligis al li verki poemojn spegulantajn la realon. En 712 p.K. Du Fu naskiĝis en familio de burokrato-bienulo. La familio ĝuis la privilegion ne pagi imposton nek soldatiĝi. Lia avo Du Ŝenjan estis fama poeto en la komenca periodo de Tang-dinastio. Kiam Du Fu estis juna, lia familio estis riĉa kaj ĝoja. Kun alta idealo li ŝatis rajdon, arkopafadon kaj ĉasadon kaj montris eksterordinaran literaturan genion. Depost la 20-a jariĝo li faris dek-jaran vojaĝon. Tiam li konatiĝis kun la granda poeto Li Baj. Du Fu estis je 11 jaroj pli juna ol Li Baj. Sed ili kvazaŭ malnovaj amikoj, kune ekskursis kaj travivis gajan tempon. Post la aĝo de 30 jaroj, kiam la granda Tang-imperio komencis dekadenci, ankaŭ lia vivo falis en ĉiam pli profundan mizeron kaj malfeliĉon. 35-jara, li venis al la ĉefurbo Ĉang'an. Li pensis, ke dank' al lia talento, oni certe havigos al li ŝtatan oficon kaj li povos realigi sian politikan idealon. Sed tute ekster lia atendo, post dek jaroj li akiris malgrandan oficon. La dekjara malfeliĉo vidigis al li la krimon de la reganta klaso kaj la mizeron de la popolo. La supre diritaj realismaj poemoj "Balado pri Belulinoj", "Meditado sur la Vojo al Fengŝjan" ja estis verkitaj tiutempe. Tiam li fariĝis poeto zorganta pri la patrolando kaj popolo. Dum tiu periodo li pavimis por si solidan realisman vojon de poezia verkado.

En la jaro 755 p.K. leviĝis la ribelo de lokaj militaristoj An Luŝan kaj Ŝi Siming. La lando kaj nacio falis en profundan mizeron. En la milita tumulto mortis de malsato ankaŭ la juna filo de Du Fu, kio kompreneble estis por li peza bato. Poste li kun siaj familianoj komencis vagan vivon. Ili sekvis la fluon de fuĝantoj kaj sin nutris per sovaĝaj fruktoj. La travivaĵo ebligis al Du Fu pli profunde kontakti malsupretavolajn popolanojn. Li propraokule vidis la detruitan landon post masakro kaj priarabado, popolanojn perdintajn siajn hejmojn kaj ilian fortan plendon. Li, kiel fuĝanto, jam estis ligita kun la sorto de la patrolando kaj popolo. Sekve, lia plendo pri la malĝusta traktado al lia individua talento tenis novan enhavon pri la socio kaj politiko. Ĝi fariĝis ironio kaj skurĝo al la putra kaj

nigra kortego, simpatio al la popolo kaj zorgo pri la nacia sorto.

Du Fu verkis multajn poemojn pri milito. Antaŭ la ribelo de An Luŝan kaj Ŝi Siming, la militemo de la regantoj kaŭzis pezan ŝarĝon al la popolo. Viroj fariĝis soldatoj, ofte vidiĝis la korŝira fenomeno, ke la gepatroj kaj edzinoj ploregas ĉe la adiaŭo de siaj rekrutitaj karuloj. "Balado pri Militĉaroj" verkita de Du Fu en la tempo, kiam li estis en la ĉefurbo sieĝata de la ribelantoj, reliefe prezentas tiujn tristajn scenojn:

*"Rulknaras veturiloj,
Ĉevaloj brue henas,
Rekrutoj sagojn kaj pafarkojn ĉe la lumboj
tenas.
Ilin postkuras tiom da gepatroj kaj edzinoj,
Ke Ŝjanjang-pont' en polvonubo dense densa
dronas.
Vojbare oni vestokroĉe kaj kun piedbatoj
Lamentas, ke la ĉielvolbo de vead' resonas."*

La okjara ribelo kaŭzis al la popolo pli profundan mizeron. Ĝi dezertigis vastan regionon. Liaj poemoj de multaj flankoj priskribas la epokon plenan de sango kaj larmoj:

*"Survoje vidiĝas nur plorado,
En urboj ne aŭdiĝas kantado."
(El "Rekrutoj")
"Kadavroj fetoras en herbaro,
Sango ruĝigas akvon kaj teron."
(El "La Disiĝo de Maljunuloj")*

En tiu periodo liaj plej famaj verkoj estis "La Pedelo de Ŝin'an-gubernio", "La Pedelo de Ŝihaŭ-vilaĝo", "La Pedelo de Tonggŭan-pasejo", "La Disiĝo de Nove-geedzigitoj", "La Disiĝo de Maljunuloj" kaj "La Disiĝo de Senhejmuloj", verkitaj en 759 p.K. En la urbo Lŭojang, kiu estis serioze detruita en la ribelo, la kortego de Tang-imperio denove komencis perfortan rekrutadon. Du Fu verkis la ses poemojn laŭ informoj ricevitaĵoj de Lŭojang al Hŭaĝoŭ. Pro la senĉesa militado la loĝantaro multe reduktiĝis kaj la junuloj estis tre malmultaj. Sed la registaro urĝis grandigi la armeon kaj perforte rekrutis novelojn, neadoltajn knabojn kaj eĉ maljunajn virinojn. "La Pedelo de Ŝihaŭ-vilaĝo" figure reaperigas la kruelaĵon de la pedelo en noktomeza rekrutado. La tri filoj de iu familio estis rekrutitaj por milito, el ili du mortis sur la bataalkampo. Informiĝinte pri la rekrutado, la maljunulo transrampis muron kaj fuĝis. Restis en la familio nur maljunulino, bofilino en ĉifonaĵo de la kapo ĝis la piedoj kaj suĉinfano. La pedelo neniel lasis la maljunulinon kaj rekrutis ŝin perforte. "La Disiĝo de Nove-geedzigitoj" priskribas paron da malriĉaj novaj geedzoj, ĉe kiuj

"Vespere nupta festo, sed matene —

Jam adiaŭo: Ho, kia rapido!"

En la poemo la novaj geedzoj adiaŭis unu la alian en larmado. La aŭtoro citis vorton de la novelo en la dua parto de la poemo kaj per tio esprimis sian deziron kuraĝigi al batalo por frakasi la ribelantan armeon. Jen la vortoj:

*"Jam ne memoru pri via edzino,
Penu prizorgi vian militservon!"*

Du Fu ne nur havis profundan zorgon pri kaj simpatio al la mizeraj popolanoj, sed ankaŭ varme laŭdis modestecon kaj sincerecon de la laboranta popolo. En la poemo "Ebriiĝo ĉe Oldulo Tjan", per simplaj kaj entuziasmaj versoj li bildigis sinceran maljunan kamparanon. Li restigis Du Fu por drinki kaj kriis ĉe la endomiĝo:

*"Li ordonas al l' edzin' aperti
grandan vinvazon, el kuvo preni."*

kaj

*"Li retenas min je ĉiu staro,
Laŭte petas fruktojn kaj kaŝtanojn."*

ĝis

*"Lunapero volas mian restadon,
Li kolere diras pri vinkvanto."*

*"Li ja estas tro impertinenta,
Mi tamen rigardas lin ne sovaĝa."*

Leginte ĝin oni sentis, ke inter la poeto kaj kamparano ekzistas intima amikeco.

Du Fu amis la patrolandon kaj popolon. Lia ĝojo kaj malĝojo ĉiam ligiĝis kun la sorto de la patrolando kaj la sekureco kaj danĝero de la popolo. Kiam la patrolando frontis kontraŭ danĝeron, li estis korŝirata:

*"Restas nur montoj kaj riveroj el ruina regno;
Printempe la ĉefurbo plenas de herbaro densa.
La floroj verŝas larmojn pro l' malordo de la*



*tempo
Kaj birdoj maltrankvilas por la foresto
parenca."*

(El "Printempa Vidaĵo")

Sed kiam venis ĝojiga informo pri restaŭro de la rompita patrolando, la melankolia poeto verkis la unuan gajan poemon:

*"Mi subite aŭdas reprenon de Hebej norda,
Kaj de larmoj malsekiĝas vesto mia.
Ekvidante la triston de l' edzino forblova,
Mi ordigas la poemojn, librojn, ĝojega.
Blankharula kantado ja bezonas drinkadon,
Printempo akompanas min al la hejma loko.
Tra l'montgorĝoj Baŝja kaj Uŝja mi ŝipos
senhalte,
Forlasinte Ŝjangjang, mi revenos rekte al
Lŭojang."*

Jen surpaperiĝas ĝojega kaj larmoplena figuro de la poeto.

En senlime trista aflikto Du Fu pasigis la duan duonon de sia vivo. En la lasta tempo li estis turmentata de malricĉo kaj malsano. Li mortis en kaduka ŝipo sur Ŝjangĝjang-rivero en 770 p.K. Pli ol 40 jarojn poste, lia ĉerko estis transportita de lia nepo al la hejmloko. Du Fu neniam formetis sian poezian penikon. Eĉ antaŭ sia morto li ankoraŭ verkis, sin apogante sur kapkuseno, kaj plendis por la mizera popolo.

Krom poemoj koncerne al la tiamaj politiko kaj socio, Du Fu verkis ankaŭ multajn poemojn kun alia enhavo, ekz., tiuj pri meditado, adiaŭo, objekto, pejzaĝo ktp., en ĉiuj specoj troviĝas eminentaj poemoj. Du Fu uzis ĉiujn poemajn stilojn, sin liberigis de ilia kateno kaj kreive disvolvis ilian rolon. Li skribis en poema formo biografiojn, notojn pri vojaĝo, leterojn kaj eĉ raportojn al imperiestro. Unuvorte, la poemo ĉe li estis ĉiopova. La plej elstara trajto de liaj poemoj estas realismo. Oni povas diri, ke lia sukceso estas senprecedenca en la disvolvigo de la ĉina klasika poezio, tial lia influo estas grandega, profunda kaj multflanka.

La lingvo en liaj poemoj estis delikata, diskreta, forta kaj iam eĉ miriga. Rilate al si mem, li diris:

*"Mi estas homo ŝatema je belegaj frazoj,
Sen mirigaj vortoj mi ne ĉesos ĝis la morto."*

En liaj poemoj oni povas vidi lian lingvan lertecon. Li estis lerta apliki popolajn dirojn, kio donis originalecon al liaj poemoj, altigis ilian esprimivon kaj pli proksimigis ilin al la popola vivo. ■

1. Ĉjuĝjang-rivero estis pitoreskejo sudoriente de la tiamaj Ĉang'an.
2. Ĉjilin — bonaŭgura besto en mito de Ĉinio

Elektitaj poemoj de Du Fu

Balado pri militĉaroj

Rulknaras veturiloj,
Ĉevaloj brue henas,
Rekrutoj sagojn kaj pafarkojn ĉe la lumboj tenas.
Ilin postkuras tiom da gepatroj kaj edzinoj,
Ke Xianyang-pont' en polvonubo dense densa
dronas.

Vojbare oni vestokroĉe kaj kun piedbatoj
Lamentas, ke la ĉielvolbo de vead' resonas.
Pri l' kaŭzo informiĝas iu hazarda pasanto.
"Konskripciite!" diras ripetfoje foriranto.
"Iu riveron gardis norde de l' dekkvina jaro,
Ĝis kvardek en ŭesto garnizone terkulturis.
Ĉe la forir' pedel' aranĝis por li la kaptukon.
Revene, jam grizulo, li denove forveturis.
Ĉe la landlimo sang' verŝiĝas kiel mara akvo,
Sed ne satiĝas, ve! Lia Majesto teravida.
Ĉu vi ne aŭdas:
En la ducent kantonoj oriente de Hua-monto,
Vilaĝoj ĉie dezertiĝas pro bankrot' rapida.
Eĉ se virinoj fortaj prenas sur sin la laboron,
La grenokampojn sieĝadas herbaĉar' senbrida.
Cetere, la soldatojn el Qin oni ĉien pelas
Kiel ŝarĝbestojn pro ilia braveco penspita.
Kvankam vi min demandas kun scivolo,
Ĉu mi kuraĝas plendi, ho sinjoro!
Ekzemple, en ĉi tiu jaro vintre,
Dum nin katenas la militorgio,
La ŝtat' imposton ekpostulas urĝe,
Per kio povus ni pagi, per kio?"



Jen klara vero: estas preferinde
Naski filinon ol infanon viran:
Filinon oni povus edzinigi al najbaro,
Dum pereo sensenca stampis jam la sorton filan.
Ĉu vi ne vidas:
Ĉe l' Blua Maro,
Ekde pratempo blankas disjetite la ostaro.
Novaj animoj ĉagreniĝas kaj malnovaj ploras.
En pluva tago ĉiuj ĝemas sub nebulvualo?"

La pedelo de Shihao-vilaĝo¹

Dum mi tranoktis en Shihao-vilaĝo,
Okazis tie rekrutig' per forto:
Trans muron savis sin la maljunulo,
Maljunulino paŝis al la pordo.
Kiel kolere la pedelo bojas!
Kiel petege la virin' malĝojas!
Jen de l' virino kortuŝa rakonto:
"Tri filojn oni ekspedis al fronto.
Leter' de unu venis lastatempe:
La du aliaj estas ĵus falintaj.
En malcerteco vivas la vivanto,
Por ĉiam jam finiĝis la mortintaj!
Restas neniu plu nun en la domo,
Escepte de nepeto, suĉinfano,
Kun la patrino vidva, kiun kovras
Nur ĉifonaj' de kapo ĝis kalkano.
Kvankam mi estas febla kaj maljuna,
Tamen mi volus jam nun kun vi iri
Por servi la armeon apud Heyang²
Kaj matenmanĝon ĝusttempe kuiri."

Silent' reregis en malfrua nokto,
Iu singultis, ŝajne, en angulo.
Kiam mi survojaĝis la matenon,
Min adiaŭis nur la maljunulo.

La disiĝo de nove-geedzigitoj

Kroĉiĝe al kanabo aŭ eriko
Ne povas alten grimpi la kuskutoj³;
Kvazaŭ survoje estus forĵetita
Virin' edziniĝinta al rekruto.
Dum mi fariĝas via novedzino,
Eĉ ne varmiĝas mat' en via lito.
Vespere nupta festo, sed matene —

Jam adiaŭo! Ho, kia rapido!
 Ne longas kvankam la vojaĝ', en Heyang
 Sur fronto vi servados garnizone,
 Sed kiel mi salutu l' bogepatrojn
 Ne plenuminte ritojn laŭbezone?
 En patra domo oni min edukis
 Ĉiam al enfermiĝo kaj modesto;
 Ili esperis, ke foje ligitaj
 La geedzoj vivados en kunesto.
 Nun malgraŭvole kuras vi al morto,
 Doloro la intestojn al mi tordas.
 Mi, ho ve! volus iri kune kun vi,
 Sed pli da implikaĵo tio portas,
 Jam ne memoru pri via edzino,
 Penu prizorgi vian militservon!
 Virino en armeo, oni diras,
 Igos ĝin perdi sian vervon.
 Mi, malriĉa knabino, perlaboris
 Longe kaj malfacile silkan veston:
 Mi ne plu ĝin bezonas kaj forlavas
 Ankaŭ la ŝminkon en via ĉeesto.
 Supre la birdoj grandaj aŭ malgrandaj,
 Flugadas ĉiuj pare en konkordo,
 Sed devas ni disvivi por eterne,
 Kiel perfidas, ve, la homa sorto!

Hejmenreveno⁴

La unua

En okcident', sub flamo ruĝa nubo,
 La sun' kliniĝas jam ĝis la eben',
 Antaŭ l' kaban' kverelas birda trupo:
 Jen, de l' vagant' millia⁵, la alven'.
 Mireg' tutdoma pri ĉeesto mia:
 Trankviliĝinte ni salutas larme.
 Migrante en malorda tempo tia,
 Dank' al bonŝanc' nur, mi revenas karne.
 De najbaroj scivolaj korto plenas,
 Kunsenta larmo ĉiujn premas gorĝe.
 Ĝis tarda nokto ni kandelon tenas,
 Sendormas, vidalvide — kvazaŭ sonĝe!

Lamento pri l' kabano detruita de l' aŭtuna vento⁶

Septembra vento muĝas furioze kaj forĉasas
 Pajltegon tritavolan de sur la kaban' pretere.
 La pajl' transflugas fluon kaj sin disjetita lasas:
 Jen surkroĉiĝas al arbsupro alta mallibere,
 Jen kirle-flirte falas en ŝlimmarĉon ĉe-rivere.

La knaboj de la sudvilaĝ', ho aroguloj! en la hela
 tago



Rabiste agas, mian maljunecon primokante,
 Enkuras bambuaron, pajlfask' sub la brako!
 Kun lang' kaj lipoj sekaj, vane alvokante,
 Suspiras mi rezigne sur baston' min apogante.

La vento mutas baldaŭ kaj inknigras nubtavolo,
 Ĉielon nebulgrizan surprizkaptas jam vesper',
 Mia multjara litkovril' glacias kvazaŭ fer',
 Pro l' buba piedbat' ŝiriĝis ĝia suba tolo.

La pluvo dense falas kvazaŭ stangoj de lupolo,
 Tegmenton trapenetas ĉe l' litkap' — sen seka ter',
 Sur la malsekaĵo kiel ja ripozi ĝis aŭroro?

Se dekmilĉambra palacego ie estus nur,
 Sub kies ŝirm' la malriĉuloj de l' tutmondo vivas
 korkontente,

Kaj spite ŝtorm' ĝi starus montsimile en sekur'.

Ho! kiam antaŭ mia okulpar' leviĝos ĉi domego
 monumente,
 La domrompiĝon propran kaj malvarmon mi
 suferos senlamente!

Esperantigis S.J.ZEE

1. Shihao(Sihaŭ)-vilaĝo, en nuna Ŝanŝjan-gubernio, Henan-provinco.
2. Heyang (Hejang): Nuna Mengŝjan-gubernio de Henan-provinco.
3. Kuskuto: *G.Cuscuta*.
4. "Hejmenreveno" estis verkita en 757 p.K. En la milita haoso Du Fu fuĝis de Fengŝjang al sia hejmloko Fuĝou. La unua parto priskribas la ĝojon kaj malĝojon de la poeto ĉe la intervidiĝo kun liaj familianoj kaj najbaroj.
5. Unu li-o egalas al duonkilometro.
6. La poemo estis verkita en Ĉengdu, aŭtune de 761 p.K. En 759 kune kun sia tuta familio Du Fu venis al Ĉengdu, venkinte nepriskribablajn malfacilojn en la longa vojaĝo. Helpate de amikoj, li konstruis kabanon. Sed furioza vento detruis ĝin. Antaŭ la plagita loĝejo la poeto verkis tiun ĉi poemon.

TRI GRAVAJ TASKOJ DE ĈINIO DE 1988

Antaŭ nelonge la aganta ĉefministro de Ĉinio Li Peng diris, ke la nuna stato de Ĉinio estas bona, sed la taskoj alfrontataj de ĝi restas penigaj. Ĝiaj tri gravaj taskoj en 1988 estas: Unue, stabiligi la ekonomion kaj profundigi la reformon. La ĉefa punkto estas daŭre praktiki kaj plibonigi diversajn respondecajn sistemojn de laŭkontrakta administrado de entreprenoj, fari teknikan revolucion, plifortigi sciencan administradon, disvolvi produktadon, plivastigi cirkuladon kaj plialtigi ekonomian efikon. Due, fari strukturajn reformojn al la institucioj de la centra registaro. La ŝlosila problemo por la reformo estas reguligi strukturon, doni pli da rajtoj al malsupraj institucioj, ŝanĝi ilian funkcion kaj instaligi registarajn organojn laŭ la principo apartigi la partian funkcion de la registara kaj la registaran funkcion de la entreprena. Kaj trie, akceli la konstruadon de socialisma demokratia politiko kaj spirita civilizacio. En la reformo de strukturo kaj starigo de sistemoj la diversnivela gvidaj organoj devas venki burokratismon, malmulte ŝvelparoli kaj multe labori, paŝon post paŝo perfektigi la sistemon de



Vigla trafiko sur la Granda Kanalo

interparolo surbaze de socia interkonsiliĝo kaj akceli la konstruadon de demokratio kaj leĝa sistemo.

NEAGRIKULTURA PRODUKTOVALORO DE LA ĈINA KAMPARO SUPERIS LA AGRIKULTURAN

En 1987 la totala neagrikultura

produktov valoro de la entreprenoj de Ĉinio superis 540 miliardojn da jŭanoj, kiuj konsistigis pli ol 50% de la socia produktov valoro de la ĉinaj kamparoj. Nun en Ĉinio 85 milionoj da kamparanoj, kiuj konsistigas kvinonon de la laborfortoj de la ĉina kamparo, okupiĝas pri neagrikultura produktado tute aŭ parte.

Rikolto de mandarinoj



235 000 NOVAJ KOLEKTIVAJ ENTREPRENOJ EN LA ĈINAJ URBOJ

De 1979 en la ĉinaj urboj estas funkciigataj per socia financado 235 mil novaj kolektivaj entreprenoj kun pli ol 12 milionoj da laborantoj kaj jaraj produktov valoro kaj negoca monsumo de 60 miliardoj da jŭanoj.

LA NOVA REKORDO DE FRUKTA PRODUKTOKVANTO

En la pasinta jaro la produktov kvanto de pomoj, mandarinoj, piroj, bananoj, kratagfruktoj, kaŝtanoj, juglandoj k.a. de Ĉinio atingis 14.5 milionojn da tunoj kaj per tio starigis rekordon en la historio. Nun ĉiu ĉino ĝuas meznombre 13.5 kilogramojn da fruktoj.

DIFERENCO KAJ KOMPRENO

La diferenco inter la gejunuloj kaj gemaljunuloj en la travivaĵo, ideologio kaj konduktaj normoj ofte kaŭzas malakordon, antagonismon kaj eĉ konflikton. Tio estas la problemo pri generacia diferenco bone konata.

En la nuna Ĉinio, la generacia diferenco inter la gejunuloj kaj gemaljunuloj montriĝas ĉefe en jenaj flankoj.

Koncerne la nocion pri valoro. La maljuna generacio de ĉinoj travivis du malsamajn sociojn, la malnovan kaj novan, kaj profunde sentas, ke ilia nuna vivo estas gajnita malfacile. Tial, ĉe la normo pri valoro, ili konsideras problemon, ĝenerale dirite, laŭ la interesoj de la ŝtato, kolektivo kaj aliaj homoj kaj metas la kolektivajn interesojn sur la unuan lokon. La nocio pri valoro por la maljunuloj "zorgi la unua pri la nacio kaj ĝui la lasta" estas nerefutebla. Sed la normo pri valoro por la nunaj ĉinaj gejunuloj estas diferenca de tiu de la maljuna generacio. Interalie, la plej reprezenta frazo cirkulanta inter

la gejunuloj estas "kaj por aliaj kaj por mi mem". Ne malmultaj gejunuloj ne volentas esti nur "pavimero" aŭ "ŝraŭbo". Ili rigardas diligentan laboron kiel virton, kaj samtempe la utilisma konscio ekzistas en ilia menso. Ili ekkomprenis la signifon kaj rolon de la "memo" kiel individuo, kaj ankaŭ konas, ke la "memo" for de la socio kaj kolektivo estas senvalora. En iu fabriko de Ŝenjang, Ĉinio, estas maljuna laboristo Ĝaŭ, kies filo laboras en la sama fabriko. La patro diligente laboris dekojn da jaroj. Ĉiufoje, kiam la fabriko faris salajro-altigon, li bonkore cedis sian ŝancon al alia. La fabriko laŭdis lin kiel lernindan modelon. Apenaŭ la filo laboris unu jaron, okazis salajro-altigo en la fabriko. Pri la salajro la filo disputis kun fabrika gvidanto. La gvidanto admonis, ke li lernu de sia patro. Sed li diris: "Mia patro kondukas noble, tio estas lia afero kaj por mi ne zorginda. Tamen oni ne devas redukti la sumon, kiun mi devas ricevi."

Pri la pensmaniero. Ĉinio estas

lando, kie originis la konfuceanisma kulturo. Oni ne devas subtaksi ĝian influon sur la pensmaniero de ĉinoj. En la maljuna generacio de ĉinoj "la ora mezo" havas tre grandan influon. Kvankam tiu pensmaniero iam kreis brilantan kulturon, tamen ĝia inercio kaj pasiveco iom post iom evidentiĝas en la disvolvo de la moderna socio. La pensmaniero de la juna generacio portas evidentan antimezan trajton. Ili kuraĝas prezenti novan aserton, krei kaj iri la unuaj. La gejunuloj adoras novo-krean spiriton. Ili kuraĝas malkaŝe diri: "Mi estas mi." Ĉen Ĝifeng, juna direktoro de la Tjanĝin-a Kranakva Inĝenier-Kompanio, diris: "En la laboro mi ne volas min kroĉi al alies aŭtoritato por realigi mian ideon. Mi neniam diris, ke 'la afero estas proponita de iu gvidanto', sed ke 'mi opinias, ke oni devas tiel fari' aŭ 'mi postulas tiel fari'." Ŝja Ĉaŭĝja, juna estro de la Ĉengdu-a Pakmateriala Delikatpresejo de Siĉŭan-provinco, diris: "Mi faras ĉion, nur se tio estas utila al la ŝtato kaj mia fabriko, ne konsiderante alies malaprobon."

Pri la vivmaniero. Pro la diferenco en la kulturo la vivmaniero de ĉinoj multe diferencas de tiu de la okcidentanoj. La maljuna generacio ŝatas vivi trankvile kaj stabile. Ili opinias, ke la stabila vivo estas la plej grava. Ili ne estas societemaj, nek ŝatas veston de moda fasono. La juna generacio ne volentas resti ĉe la malnova stato kaj aspiras al la bunta vivo. Ili estas societemaj kaj la vivmaniero inklinas al kuraĝe personeca manifestiĝo. Ili volentas kaj diligente labori kaj bone ĝui. Zeng Hŭajun, lernanto de la Hengjang-a 5-a Mezlernejo de

En mateno



Hunan-provinco, skribis al la redakcio de la gazeto "Zhongguo Qingnian" (Junularo de Ĉinio): "Mi simple ne povas kune vivi kun mia patro. Kiam mi lernis fotadon, li diris, ke tio ne estas honesta laboro. Kiam mi kun longa hararo min mode vestas, li do opinias min mallaboremulo. Li havas nenion komunan kun ni gejunuloj en la strebado. Li opinias, ke bravaj estas nur tiuj, kiuj scias nur manĝadon kaj laboradon."

Pri la edzeco kaj amo. En la tradicia ligo de edzeco plejparto de la ĉinoj geedziĝis laŭ la "ordono de la gepatroj" kaj la "perado de svatistoj". En la maljuna generacio la amo kaŭzita de la geedziĝo estas ĝenerala fenomeno. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, dank' al la propaganda laboro de la registaro pri la Geedziĝa Leĝo, la memdecida geedziĝo kaj ama libereco estas fundamente aprobita de la tuta socio. Sed la tradicia ideologio havas grandan influon sur la maljuna generacio, surbaze de siaj propraj spertoj en la geedza vivo dum dekoj da jaroj ili pli alte taksas la materiajn kaj moralajn faktorojn en la problemo pri amo kaj geedziĝo, sed neglektas la faktorojn de spirito kaj sento. Diference de tio, la ĉiam pli malferma socio konigas al la gejunuloj, ke oni ankaŭ devas apliki malferman sintenon al la amo kaj geedziĝo. Kiam la gejunuloj elektas sian amat(in)-on, ili pli multe konsideras la temperamenton, talenton, kareiron, ŝatokupojn kaj senton kaj metas la socian pozicion de la amat(in)a familio kaj ties enspezon sur la duan lokon. La gemaljunuloj plejparte rigardas eksedziĝon tabuo en la homa vivo. Sed la gejunuloj opinias, ke eksedziĝo same kiel geedziĝo estas normala.

Estas ĝojindé, ke kaj la gemaljunuloj kaj la gejunuloj jam konsciis pri la generacia diferenco. Se la antagonismo kaj konflikto



Diskuto inter du generacioj

disvolviĝos en ekstrema formo ĝis neregebla situacio, tio kaŭzos al la socio tumulton kaj maltrankvilon. Nur surbaze de egaleco, interkompreno kaj eliminado de la malakordo, oni povas starigi bonan socian komunikan sistemon, kaj sekve garantii la glatan disvolviĝon de la socia vivo. La laboro diversforma por elimini la generacian diferencan aperis inter gemaljunuloj kaj gejunuloj. Koncernaj sociaj departementoj, kiaj la Ĉina Komunisma Junulara Ligo kaj la Maljunula Asocio, ofte faras interparoladon. Post kiam la koncerna departemento de Ŝanhajo tri monatojn disvolvis "aĝo-

forgesan aktivadon", la "Maljunula Ĵurnalo" kaj "Junulara Ĵurnalo" de Ŝanhajo ricevis entute mil leterojn el diversaj lokoj de nia lando. Ankaŭ la aliaj sociaj organizoj faras kompreno-akcelan aktivadon inter gepatroj kaj gefiloj, instruistoj kaj lernantoj, majstroj kaj metilernantoj, gvidantoj kaj popolanoj, bopatrinoj kaj bofilinoj kaj rikoltis bonan rezulton. Multaj gemaljunuloj emocie diris: "Ni devas denove koni la nunajn gejunulojn." Ankaŭ gejunuloj havas la saman opinion kaj esprimas, ke ili devas pli bone kompreni la gemaljunulojn. ■

Filoj de drakoj en la ĉina mito

de LAN ŠAN

Drako en mito jam fariĝis simbolo de Ĉinio kaj la ĉina popolo. La tero de Ĉinio estas nomata "tero de drako", dume la ĉina popolo — "posteuloj de drako". 1988 estas draka jaro de Ĉinio. Oni esperas, ke ĝi, bonaŭgura besto, alportos bonŝancon.

En la Printempa Festo, la tradicia festo de ĉinoj, oni povas vidi ĉie diversformajn drakojn, pentritajn, faritajn, kaj ankaŭ povas aŭdi diversajn mitojn pri drako.

Antikva mito diras, ke drako havas naŭ filojn. Ili havas figurojn

tute malsamajn al ĝi. Ili havas ĉiusian propran formon, hobion, kapablon kaj devon.

La unua filo de drako nomiĝas Biŝji. Ĝi aspektas testude kaj ŝatas porti ŝarĝon. En Ĉinio troviĝas multaj monumentoj dorse portataj de ĝi.

La dua filo nomiĝas Ĉi'ŭen. Ĝi ŝatas ĉirkaŭrigardi kaj engluti objektojn. Tial oni ornamas per ĝi ambaŭ ekstrecojn de la firsto de tegmento de konstruaĵoj. Ĝi estas fiksita sur la firsto per akra spado tra la dorso. Nun oni povas vidi ĝin sur la antikvaj konstruaĵoj en la Imperiestra Palaco, Somera


Palaco k.a.

La tria filo estas nomata Pulaŭ. Ĝi iom similas al drako, sed malpli granda. Ĉar ĝi ŝatas muĝadi, tial oni faras la tenilon de sonorilego Pulaŭ-forma, por ke la sonorilo sonu pli laŭte kaj bele.


La kvara filo portas la nomon Bi'an. Ĝia aspekto similas al tiu de tigro. Ĝi, procesema, impresas majeste, kaj oni lokis ĝin sur la pordo de prizono, por ke ĝi teruru krimulojn. Antikve oni nomis prizanon "tigra prizono" eble pro tio ke oni erare prenis Bi'an kiel tigron.

La kvina filo nomiĝas Taŭtje.

Biŝji, la unua filo de la drako



Ĉi'ŭen, la dua filo de la drako



Pulaŭ, la tria filo de la drako





Bi'an, la kvara filo de la drako



Taŭtje, la kvina filo de la drako



Baŝja, la sesa filo de la drako

Ĝi estas avidema kaj frandema, kaj oni kutime aperigas ĝin sur *ding*. *Ding* estas manĝujo (ĝenerale tripodita) de antikvaj ĉinoj, kaj fiksita sur *dingo*, ĝi povas laŭplaĉe frandi la bongustaĵojn. Nun la bronzaĵoj ornamitaj per la figuro de Taŭtje estas valoraj historiaj objektoj.

La sesa filo estas Baŝja. Ĝi ŝatas restadi en akvo. Oni ornamas pilierojn kaj gargojlojn per ĝia figuro. Oni povas vidi ĝian figuron ĉe la ŝtonaj kolonoj antaŭ Tajhehalo de la Imperiestra Palaco en Pekino. Ĝia buŝo funkcias kiel defluilo.

La sepa filo nomiĝas Jazi, kiu ofte rigardas kun kolera okuloj. Ĝi estas batalema, kaj oni ornamis per ĝia figuro spadojn kaj glavojn. Oni facile trovas ĝian teruran figuron sur la teniloj kaj ringoj de antikvaj tranĉilegoj.

La oka filo estas nomata Sŭanni. Leonaspekta, ĝi ŝatas muzikon kaj fumon kaj kutimas sidadi senmove. Pro tio oni ornamis per ĝia figuro la budhajn soklojn en temploj kaj incensujojn. Oni povas vidi sur la delikataj bronzaĵoj incensujoj, ke ĝi sidas tenante en la buŝo la piedojn de la incensujo.

La naŭa filo Ĝjaŭtu estas malsama al siaj fratoj en karaktero. Ĝi emas sin fermi en la nesto kaj ofte rifuzas alies viziton. Tial oni lokas ĝin sur la pordo. Ĝi ŝatas teni ringon en la buŝo, kaj oni lokas ĝin ankaŭ sur akvovazejo kiel gardiston.

En alia mito drako havas ankaŭ du pliajn filojn Ĉiŭniŭ kaj Ĉaŭfeng krom la supreme menciitaj 9 filoj. La antaŭa ŝatas muzikon kaj ofte estis lokita sur muzikiloj dum la lasta estas riskema kaj kutime estis postenigita sur la traboj en la angulo de la antikvaj palacoj. ■


Jazi, la sepa filo de la drako



Sŭanni, la oka filo de la drako



Ĝjaŭtu, la naŭa filo de la drako



Pri apliko de Esperanto kaj kontaktiĝo per ĝi

ESPERANTO EBLIGIS AL MI LA KONATIĜON KUN VI

Vi havas konsciencan peranton Manfred Fuhrer. Li admonis min pri la abonrenovigo.

Trege mi ŝatas legi raportojn de viaj kaj eksterlandaj Esp-pioniroj. En la junia revuo mi legis kun miro kaj ĝojo la artikolon verkitan de profesoro Ivo Lapenna. La movado ŝuldas grandan dankon al tiuj eminentaj esperantistoj.

Mi estas via longjara abonantino. Ekde la komenco mi sentas grandan simpatian al la ĉina popolo. Mi ĝojas, ke Esperanto ebligis al mi la konatiĝon kun vi. La aldonita mono estas por subteni EPC.

KLARA JUSTIS (FR Germanio)

DANK' AL KORESPONDADO NI EKKONIS ĈINAJN MOROJN KAJ KUTIMOJN

Lastatempe en nia Junulara

Esperanto-Klubo, kiu troviĝas en la kulturdomo de fandejo Batory en la urbo Chorzów, Pollando, okazis ekspozicio pri Ĉinio. Via interesa revuo "El Popola Ĉinio" helpas nin en nia E-agado. Belaj kaj interesaj libroj por infanoj, bildkartoj kaj poŝtmarkoj altiras gejunulojn kaj infanojn por ekkoni Esperanton.

Dank' al korespondado kun ĉinaj geamikoj ni ekkonis ĉinajn morojn kaj kutimojn.

Kiel memoraĵon ni sendas al vi fotojn faritajn en nia klubejo. Al via revuo ni deziras, ke ĝi estu ĉiam tiel interesa kiel nun.

JANINA TOKARSKA (Pollando)

VENIS LA TEMPO POR PLI EMFAZI LA PRAKTIKAN UTILIGADON DE ESPERANTO

Leginte la artikolon de Tibor Sekelj "Kie estas la denaskaj esperantistoj?" en unu el la lastaj numeroj de via revuo, mi sentis la

bezonojn skribi al vi.

Unue mi volas diri ke mi tute konsentas kun la zorgoplenaj konsideroj de T. Sekelj pri la neorganiziteco de la denaskaj esperantistoj kaj, pli ĝenerale, de la familioj, kiuj efektive uzas Esperanton hejme kiel ĉiutagan lingvon.

Mi opinias, ke venis la tempo (aŭ eble, ĝi revenis, se oni konsideras ke antaŭ jaroj la organiza situacio ĉi-rilate estis pli bona) por rekunligi tiun gravan sektoron de la esperantistaro kaj pli emfazi la praktikan utiligadon de Esperanto, interalie per denaska instruado al la infanoj.

Ĉi-koncerne mi ŝatus nur informi viajn legantojn, ĉefe tiujn loĝantajn en Azio, ke jam ekzistas kerno de organiziĝo de Esperantlingvaj familioj, kun aranĝado de ĉiu-jaraj renkontiĝoj, kun interŝanĝo de informoj ktp.

Interesiĝantoj bonvolu kontakti min aŭ Erno Czigar, Kulich Gy. u. 25. V. 16., H-8100 Varpalota, Hungario.

RENATO CORSETTI (Italio)

LA PROBLEMOJ, KIUJN LA ENTREPRENEMAJ GEPATROJ ALFRONTOS POST LA DECIDO POR EDUKI SIAJN GEFILOJN, DENASKAJN ESPERANTISTOJN

Traleĝinte la artikolon de T. Sekelj, mi decidis ne heziti plu kaj trakti la temon de denaska esperantisto (d.e.) "Kie estas la denaskaj esperantistoj?" Tiun ĉi demandon mi ne povas prirespondi, sed "Kial malmultas ili?" mi eble povas.

Lastatempe aperadas ĉiam pli da artikoloj pri d.e. kaj la skribintoj de tiuj artikoloj vicigas la konvinkajn argumentojn pri la

(Daŭrigo sur p. 43)

Ekspozicio pri Ĉinio okazigita de la Junulara Esperanto-Klubo en la kulturdomo de la fandejo Batory



Grandiozaj Tri Gorĝoj

de ĜENG ĜENGJE

Elirinte de la altebenaĵo, Jangzi-rivero kunportas centojn da fluoj al Siĉŭan-baseno, kie ĝi fariĝas torenta. Antaŭe, kiam ĝi alfluis al la limtuŝejo de Hubej- kaj Siĉŭan-provincoj, ĝi estis barita de Uŝan-monto. Post longtempa geologia efiko, la torenta rivero kiel hakilego fendis la monton kaj tiel formiĝis la grandiozaj kanjonoj — la gorĝoj Ĉjutang, Uŝja kaj Ŝjiling. Jen la mondfamaj Tri Gorĝoj de Jangzi-rivero.

De la urbeto Bajdi en Fengĝje-gubernio, Siĉŭan-provinco ĝis Nanĝin-pasejo en la urbo Jiĉang, Hubej-provinco, la Tri Gorĝoj kun totala longo de 193 km. direktas sin orienten tra la gubernioj Fengĝje, Uŝan en Siĉŭan-provinco kaj la gubernioj Badong, Ziguj kaj la urbo Jiĉang en Hubej-provinco. Tuj ĉe ambaŭ bordoj de la gorĝoj staras verdaj

montoj, la rivera vojo estas zigzaga, rapidas la fluo, jen aperas, jen malaperas rifoj. La pejzaĝo kun multnombraj vidindaĵoj kaj historiaj restaĵoj faras la gorĝojn unu el la plej allogaj partoj de la rivero.

GRANDIOZA KAJ APIKA ĈJUTANG-GORĜO


Mi komencis mian vojaĝon orienten laŭ la rivero per la luksa ŝipo "Longĝong", forlasinte Ĉaŭtjanmen-kajon de la urbo Ĉongĉing.


Antaŭ ol eniri la gorĝon, mi restis iom da tempo en Ĝongŝan-gubernio. Tie norde de la rivero estas alta montpinto, laŭ kies deklivo staras 56-metra naŭ-etaĝa turo. Tio estas la fama Ŝibaŭĝaj. Rigardante malsupren de sur la montpinto, oni povas ĝui la

ĉarmon de la rivero kaj ĉielo. Kiam nia ŝipo preterpasis la urbon Ŭanŝjan, kie la rivero galopas al Ĉjutang-gorĝo en Fengĝje-gubernio, oni vidis la antikvan urbon Bajdi ĉe la gorĝo-buŝo. Historio diras, ke en la periodo de la Tri Regnoj (220-280 p.K.) Liŭ Bej, imperiestro de la regno Ŝu, levis militon kontraŭ la regno U. Trafite de fiasko, li retirigis al la urbo Bajdi kaj mortis tie en ĉagreno. Antaŭ la morto li konfidis la ŝtatan aferon kaj siajn filojn al la ĉefministro Ĝuge Ljang. La tragika rakonto estis tre kortuŝa, kaj pro tio ankaŭ la urbo famiĝis. Li Baj (701-762 p.K.), poeto de Tang-dinastio, brile priskribis la riveron kaj la urbon jene:

*"En matenruĝo mi forlasis la
monturbon Bajdi,
ĉe la tagfin' alvenas jam
Ĝjangling post mil lioj.
Boat' leĝera preterpasis jam
mil kaj mil montojn,
Eĥas ankoraŭ ambaŭborde la
simiaj krioj."*

Ĉjutang-gorĝo longas je 8 km. de la urbo Bajdi ĝis la orienta Daŝji-urbeto en Uŝjan-gubernio. Ĝi estas la plej mallonga el la Tri Gorĝoj kaj tre danĝera. La larĝa Jangzi-rivero fluas en la gorĝon, ambaŭborde de ĝi staras du krutaj nuboskrapantaj klifoj unu kontraŭ la alia, kvazaŭ kolosaj pordoklapegoj. Oni nomas ĝin Kujmen-pordo. Sur la rokmuro de la suda bordo estas reliefe gravurita "Kujmen imponas en la lando", kiu rimarkigas la ŝipveturantojn pri la danĝera gorĝo.





Junjang ĉe rivero

Ĉjutang-gorĝo posedas ne nur originalan imponan pejzaĝon, sed ankaŭ multajn historiajn restaĵojn. Pli oriente de la rivero troviĝas la unika Blovilo-ravino, vertiĝdona kornica vojo Mengljang-eskalo, komika “Kap-altère Pendanta Bonzo” k.a. La Blovilo-ravino situas en la supra parto de la gorĝo. Sur la flava rokmuro norde de la rivero estas vertikalaj kaverno-formaj fendoj, en kiuj oni trovis oblongajn objektojn, similajn al ĉinaj tradiciaj bloviloj (ĉina tradicia blovilo estas forme oblonga kesto). Tial oni nomas la lokon Blovilo-ravino. En 1972, tri drogherbo-kolektantoj, kiuj grimpis sur la rokmuron, raportis, ke la bloviloformaj ujoj estas 9 antikvaj ĉerkoj, kaj ke en ili estas bronzaĵoj spadoj kaj homaj ostoj. Arkeologoj konstatis, ke ili estas tomboj de la periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a. K.).

BELA KAJ MISTERA UŜJA-GORĜO

Elirinte el Ĉjutang-gorĝo, nia ŝipo veturis orienten plu. Trapa-

sinte la larĝan valon Daning-rivero, ni venis en la ĉarman Uŝja-gorĝon. La 40-km-a gorĝo etendiĝas de Daning-rivero en Uŝan-gubernio ĝis Gŭandukoŭ en Badong-gubernio.

La akvovojo en la gorĝo zigzagas kaj la akvo fluas iom milde. Ambaŭborde staras montpintoj altaj kaj malaltaj. La plejparto de la pintoj altas je 1 500 ĝis 2 000 m. super la marnivelo. Pinoj, bambuoj, aleŭritoj, grimplantoj, vepro, orkideoj, pteridoj k.a. kovras la montojn per verde, de montpintoj ĝis riverbordoj. Veturante tra la meandra gorĝo, jen la ŝipo apenaŭ povas iri antaŭen, barita de giganta monto, jen ĝi ĉirkaŭiras la monton kaj la vojo denove fariĝas glata.

De la gubernia urbo Uŝan orienten, oni havas la okazon apreci la belon de la 12 pintoj de Uŝan-monto. La pasaĝeroj svarmis sur la ferdekoj, por rigardi diversformajn kolosajn rokojn, similajn al tigroj, leonoj, galopantaj ĉevaloj, libro-stakoj ktp.

La plej grandioza el la 12 pintoj estas Diino-pinto. La nomo devenis de legendo pri hakmortigo de fidrakoj fare de diino Jaŭĝji. Sur la pli-ol-mil-metra pinto staras alta ŝtona kolono, kvazaŭ svelta knabino rigardanta la riveron.

La legendo diras, ke la edzino de la ĉiela imperiestro havas filineton Jaŭĝji. Iutage reveninte de ekskurso en la orienta maro, Jaŭĝji vidis, ke dek ferocaj drakoj super Uŝan-monto mortigas homojn kaj bestojn, ŝi hakmortigis la drakojn en la valo, sed iliaj ostoj fariĝis malmolaj rokoj, kiuj ŝtopis Jangzi-riveron kaj faris Siĉŭan-basenon maro. Jaŭĝji invitis siajn dek unu fratinojn al la monto por helpi la heroon Daju, kiu klopodis venki inundon por la popoloj kaj trafosi la riveron. Ŝi donacis al Daju ĉielan libron, kiu donis al Daju kapablon venigi venton kaj pluvon, movi teraĵon per fulmo, bruligi monton per fajro. Dank' al tio Daju hakfendis la montojn en la Tri Gorĝoj kaj faris Siĉŭan



Ušja-gorô

FOTO DE GAŪ ŠENKANG




Ĉjutang-gorĝo

FOTO DE GAŬ ŜENKANG

La Malnova Maŭzoleo Hŭangling

FOTO DE HAJ FENG






Daning-rivero, kiu fluas en Jangzi-riveron ĉe Uŝja-gorgo

FOTO DE ŜEN ĈEN

Diino-pinto

FOTO DE GAŬ ŜENKANG



Bajdi-templo

FOTO DE ĈJU ŬEJBO





Ŝjiling-gorgô

FOTO DE HŪANG TAŪPENG

“paradizo en la homa mondo”. Hodiaŭ en Uŝja-gorĝo restas la vidindejo “Teraso de Ĉiela Libro”, kie laŭ legendo Jaŭĝji donacis la ĉielan libron al Daju. Post kiam Jaŭĝji helpis al Daju trabori la Tri Gorĝojn, ŝi enamiĝis al la pura kaj verda rivero kaj la nubo-skrapanta Uŝan-monto, ŝi do senhezite decidis resti tie. Tiel ŝi fariĝis Diino-pinto, kaj ankaŭ ŝiaj fratinoj fariĝis pintoj ĉirkaŭ ŝi, kiuj kune nomiĝas 12 pintoj de Uŝan-monto.

La mallarĝa Uŝja-gorĝo estas ofte vualita de nebulo kaj nubaro, kvazaŭ tie la diino Jaŭĝji kaj ŝiaj fratinoj promenadus en tulo. Tio faris la kanjonon pli mistera kaj pli alloga.

ŜJILING-GORĜO KUN TORENTA FLUO KAJ MALPROFUNDAĴOJ

Elirinte el Uŝja-gorĝo, Jangzi-rivero venas al la vasta valo Ŝjangŝji, pli malsupre estas Ŝjiling-gorĝo, la lasta el la Tri Gorĝoj. Ĝi longas je 76 km, de la buŝo de Ŝjangŝji-rivero en Ziguj-gubernio ĝis Nanĝin-pasejo.

Ŝjangŝji estas fama loko en Uŝja-gorĝo. Laŭ legendo, tie estas la hejmloko de Ŭang Ĝaŭĝjun de Han-dinastio (206 a.K.-220 p.K.). Ŭang Ĝaŭĝjun estis unu el la famaj belulinoj en la ĉina historio. Post kiam ŝi edziniĝis al Huhanja, ĉanju (titolo de la ĉefo de la huno) de norda nacimalplimulto Huno, la paca kaj amika kunekzistado de han-nacieco kaj hunoj daŭris 60 jarojn.

Legendo diras, ke foje Ŭang Ĝaŭĝjun lavis sian vizaĝon ĉe la rivero, kaj neatente faligis sian perlon en la akvon, tuj la akvo fariĝis verda, klara kaj aroma. Tiel devenis la nomo Ŝjangŝji, kiu signifas aroman riveron.

Ŝjiling-gorĝo estas la plej danĝera el la Tri Gorĝoj. 58-jara kapitano Ĉen Anĵong diris al mi, ke subakve en tiu parto kaŝiĝas multaj rifoj kaj malprofundaĵoj, la

fluo estas rapida kaj zigzaga. La tri konataj malprofundaĵoj estas Ĉingtan, Ŝjetan kaj Kongling.

Popolkanto diras:

*Se Ĉingtan kaj Ŝjetan
ne tiel danĝeras,
ja malprofundaĵo
Kongling inferas.*

En la pasinteco, tie granda rifo longa je pli ol 200 m. kuŝis meze de la rivero, disfendante la akvon en fluojn sudan kaj nordan. Ankaŭ en la furiozaj fluoj kaŝiĝis rifoj. Veturante tien, la ŝipoj devis singarde eviti la rifojn, kaj ia neatento povis kaŭzi ŝiprompiĝon pro kolizio kontraŭ rifo. En 1900, germana ŝipo koliziis kontraŭ la rifo “Sanĝu”, traveturante Konling-malprofundaĵon. En la postaj pli ol dek jaroj neniu alilanda ŝipo aŭdacis eniri la gorĝojn. De tiam ĝis 1949 pliaj sep ŝipoj sinkis tie. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, navigvojoj laboristoj eksplodigis la rifojn per dinamito. La danĝerplena “infera pasejo” fariĝis glata vojo.

En la regiono ambaŭborde de Ŝjiling-gorĝo troviĝas granda areo da mandarinaj arboj. En la tempo de aŭtuno kaj vintro, oraj fruktoj pendas sur la branĉoj. Nur en la lastaj du jaroj, sep laŭriveraj gubernioj de Jiĉang-subprovinco pliiĝis plantareon de mandarinaj arboj de 8 600 hektaroj.

DEMONSTRADO PRI LA AKVOUTILIGA KONSTRUADO DE LA TRI GORĜOJ

La Tri Gorĝoj posedas ne nur belajn pejzaĝojn kaj multajn historiajn restaĵojn, sed ankaŭ abundon da akvoenergiaj riĉfontoj. La niveldiferenco inter Ĉjutang- kaj Ŝjiling-gorĝoj estas 150 m. kaj rezerviĝas pli ol 30 milionoj da kW. da potenciala hidroelektra generatora povo. Eksploatado de la potenciala povo certe donos al la popolo netakseblan profiton. Krome, ĝi ankaŭ helpas bridi superakvon de

la rivero kaj faciligi la navigadon.

Jam en 1918, Dr. Sun Jatsen, la granda antaŭirinto de la ĉina revolucio, proponis konstrui akvobaraĵon por utiligi la akvoenergion. Konkernan esploradon faris multaj homoj, inter ili estis alilandanoj. Iu usona baraĵprojekta specialisto venis en 1944 al la Tri Gorĝoj, faris topografian enketon kaj verkis “Raporton pri la Projekto de la Tri Gorĝoj de Jangzi-rivero” kun dekmiloj da vortoj. Printempe de 1946, la konkernaj departementoj de Ĉinio kaj Usono oficiale subskribis kontrakton pri projektado de la baraĵo ĉe la Tri Gorĝoj. Sed la projektado poste ĉesis pro historiaj kaŭzoj.

De post la 50-aj jaroj, la ĉina registaro metis la hidroenergian ekspluatadon de la Tri Gorĝoj en sian tagordon. La ŝtataj gvidantoj alvenis por inspekti la lokon en la pasintaj pli ol 30 jaroj. Preskaŭ dekmil akvoutiligaj kaj geologiaj specialistoj, inĝenieroj kaj tekni-

Signalistoj





Ŝjiling-gorĝo en vespero

kistoj de Ĉinio, Sovetunio kaj aliaj landoj faris penigan esploradon pri la konstruo kaj akumulis grandan kvanton da donitaĵoj. Fakuloj opinias, ke la baraĵo

devas esti konstruita en Sandoŭping, Ŝjiling-gorĝo, kies 20-km-a granita regiono estas la plej ideala loko por la baraĵo. La baraĵo estos granda konstruo por multflanka

utiligo. Laŭ decido de la ĉina registaro, pli ol 400 fakuloj faras refojan demonstradon kaj esploradon al la granda konstruo en teknikoj, ekonomia efiko, transloĝigo de loĝantoj, media ekologio, navigo, rezisto kontraŭ inundo, elektroproduktado k.a., por ke la projekto estu pli preciza kaj solida. La malsamaj vidpunktoj en la demonstrado helpas praktiki demokration en diskutado pri teknikoj, ke la gravaj decidoj de la registaro estu bazitaj sur demokratio kaj scienco.

* * *

Post vizito de la riverparto ĉe Sandoŭping, mi daŭrigis mian vojaĝon. Kiam la ŝipo preterveturis la malgrandan vilaĝon Nanĝingŭan ĉe la orienta ekstremo de Ŝjiling-gorĝo, la rivero tuj larĝiĝas de 300 al 2 200 m. Antaŭ ni aperis vasta horizonto. Tie Jangzi-rivero ne estas plu premita de montoj kaj valoj, sed libere etendiĝas antaŭen. ■

KORESPONDI DEZIRAS

* Ni interesiĝas pri junulara vivo, sporto kaj kompreneble pri Esperanto kaj dez. kor. kun samaĝaj esperantistoj. Adam Bdskarbi, ul. Staszica 6a/4, 63-400 Ostrow Wlkp, Pollando; Robert Kaczmarek, ul. Powstancow, Wlkp 8, 63-400 Ostrow Wlkp, Pollando; Kasia Ratajczak, ul. Kopernika 2a/19, 63-400 Ostrow Wlkp, Pollando.

* Inĝeniero pri aplikata arto dez. kor. kun ĉinaj esperantistoj por apliki Esperanton. Adr.: Albrecht K.-D., Str. der DSF 59, Weissenfels 4850, DDR.

* Membroj de Venezuela Esperanto-Unuiĝo dez. kor. kun diverslandaj geesperantistoj pri ĉiuj temoj. Ankaŭ tiu organizaĵo havas

novan bibliotekon kaj bezonas librojn, revuojn kaj broŝurojn. Adr.: Venezuela Esperanto-Unuiĝo (David G. Valecillos V.), Calle 79 Nr. 3C-72, Maracaibo-4002, Venezuelo.

* 33-j. bankoficisto dez. kor. t.m. pri ĉiuj temoj. Luiz Carlos, Lemos, Cp-501 (35.100) Governador Valadares (MG), Brazilo.

* Instruisto Dizdareviĉ Jusuf, 72000 Zenica, Str. Milivoja Piljuge 57, Jugoslavio dez. kor. kun geamikoj 25-50-jaraĝaj el Hungario, Japanio, FR Germanio, Francio, Pollando, Svislando, Hispanio, Kanado, Ĉinio, Irano, Sovetunio, Ĉeĥoslovakio, Italio, Svedio, Finnlando, Bulgario kaj Turkio.

* Juho Vattulainen serĉas letergeamikojn tutmonde. 81150 Riihikangas Roivas LT (Finland) Suomi.

* Eddy Silva Molina, SUL. Jorge Navarro, Apartado postal 4314,

Maragua 5, Nicaragua deziras korespondi kun geesperantistoj tutmonde.

* 26-j. Mohammad Kamali, fraŭlo dez. kor. tutmonde pri diversaj temoj (muziko, vojaĝo). Adr.: M. Kamali, Taabodi square Nr. 31, 91957-Maŝhed, Irano.

* 21-j. lernantino dez. kor. kun diverslandanoj pri turismo, sporto, muziko kaj filmo kaj kolektas p.m. kaj b.k. Halina Szymanska, Starkowo 25, 76-263 Duninowo, Pollando.

* 13-j. lernanto dez. kor. kun kamarado el Koreio, Japanio aŭ Ĉinio. Adr.: Miĥal Kouba, Smeralova 27, 58601 Jihlava, Ĉeĥoslovakio.

* Mi dez. kor. kun ĉiuj landoj, precipe kun Ĉinio, landoj de proksima oriento kaj Nordameriko. Sigita Žilionis (29-j.), Box 985, 232200 Vilnius ARP-2, Lietuvos TSR, Litovio, USSR.

AGRIKULTURO EN LA ESTONTECO

Nun, multaj personoj opinias, ke en la venonta jarcento kiu okupos la unuan lokon en la teknikoj, tiu fariĝos la unua potenca lando; kiu industrio aplikos la plej novajn fruktojn en la teknikoj, tiu fariĝos prospera departemento. Ĝis kia grado disvolviĝos la agrikulturo, kiu plej intime rilatos al la sorto de la homaro, tio estas afero ĝenerale atentata.

En la nuntempa agronomio fermentas multaj novaj temoj. Laŭ la disvolviĝo de esplorado, la gvidaj branĉoj de la sciencoj penetras ne nur en ekologion, matematikon, fizikon kaj kemion, sed ankaŭ en la kampojn elektronikan, kosmologian, oceanografian kaj bioinĝenieradan. El tio oni povas antaŭvidi, ke estonte en agrikulturo okazos jenaj ŝanĝiĝoj:

DISVOLVIĜO DE "EBENA TIPO" AL LA "TRIDIMENSIA"

Por akiri grandan kvanton da agrikulturaj produktoj sur limigita kampo kaj kontentigi la bezonon de la senĉese kreskanta loĝantaro, la efika rimedo estas disvolvi la plant-dispozicion de ebena formo al la tridimensia. t.e. oni ĉefe utiligos la "spacodiferencon" kaj "tempodiferencon" de diversaj plantoj en kreskado, zorgeme aranĝos kaj racie dispozicias, por formi diversan altefikan sistemon de produktado multgradan, plur-uzan kaj multvojan, tiel ke oni povos plene utiligi sunenerĝion, kaj ekspluati la latentan forton de akvo, sterko,

tero, aero kaj varmo por doni multoblajn produktokvanton kaj produktovaloron. En akvo oni kulturos dense, mikse, delikate kaj sur malsamaj tavoloj. Sur la tero oni plantos mikse altajn kaj malaltajn plantaĵojn, kreskigos kune lumamajn kaj ombroamajn plantaĵojn kaj kulturos herbojn, arbojn kaj arbustojn. Sur balkono kaj tegmento oni disvolvos "integran agrikulturon", tiam oni povos eĉ kombine kulturi bestojn, plantojn kaj mikrobojn.


DISVOLVIĜO DE "PETROLA TIPO" AL LA "EKOLOGIA"

Post la Dua Mondmilito, la okcidentaj landoj rapide suriris la vojon de "petrola agrikulturo", kio ege stimulis la disvolviĝon de la moderna agrikulturo kaj samtempe kaŭzis gravan malutilon. Sekve, aperis "ekologia agrikulturo" destinita por adaptiĝi al la naturo kaj reformi ĝin. Ĝi estas sinteza produkto-strukturo

konstruita laŭ la biologia kaj ekonomika leĝo pri la materia cirkulado kaj energia transformiĝo kadre de la ekologia sistemo kaj sub direktado de la fundamentaj principoj de ekologio. En tiu komplika sistemo materio cirkule funkcias. La ekologia agrikulturo certe ludos gvidan rolon en la estonteco.

DISVOLVIĜO DE "NATURA TIPO" AL LA "INSTALAĴA"

En la estonteco agrikulturo estos ekipita per modernaj asekuraj instalaĵoj, kiaj altgradaj aŭtomataj temperatur-regaj forcejoj, avangarda likvaj-transporta sistemo kaj ĉiuj perfektaj ekipaĵoj en agrikulturaj fabrikoj. Oni antaŭkalkulis, ke en la venontaj 10-30 jaroj rimarkinda parto da plantoj, legomoj kaj floroj estos transplantita de kampoj en forcejojn, kaj poste de forcejoj en tute aŭtomat-regan medion, kaj tiel iom post iom efektiviĝos la



enfabrika produktado. En la estonteco la britaj legomfabrikoj aplikos bend-forman transsend-sistemon, kulturos en ujoj kun artefarita grundo kaj faros grandskalan industrian produkadon. Tiam, la agrikultura produktado estos farata tutjare laŭ bezono de merkato.

DISVOLVIĜO DE "MEKANIZO" AL "KOMPUTILA REGADO"

La agrikultura mekanizo multe vivigas la modernan agrikulturon kaj ludas gravan rolon por liberigi laborfortojn. Nun iuj landoj esplore faras 5-a-generaciajn komputilojn, kaj "superintelektan roboton". Tiam komputiloj kaj alttalentaj robotoj administros agrikulturajn kultivejojn kaj plenumos diversajn kamplaborojn.

DISVOLVIĜO DE "LA TERO" AL "LA KOSMO"

En 2000 la loĝantaro de la mondo atingos 6 miliardojn kaj en 2025 ĝi eble atingos 9 miliardojn. Pro manko de agroj oni devos serĉi novajn lokojn por vivi. En maro oni entreprenos "akvan agrikulturon" aŭ faros "bluan revolucion" kaj krome devos ŝanĝi dezerton en oazon. Sovetunio kulturos legomojn en subtera koridoro, dume agrikulturo estos enkondukita en la spacon. En

2000 Usono eble la unua transloĝigos grupon da loĝantoj sur la lunon kaj la unua kosmoŝipo de Sovetunio manipolata de homoj atingos la marson, kaj poste oni faros aŭtomatajn minekspluaton kaj provadon de agrikulturo. Tiam fabriko kaj kultivejo eble funkcios en la kosmo.

Lastatempe, por ke la kosmonaŭtoj ne plu prenu solajn ladmanĝaĵojn, Sovetunio en modela "interstela flugatoro" faris provadon de malgranda legomoĝardeno, kiun oni ekipis per artefarita suno, kaj sekve, en ĝi kvazaŭ tutjare regis printempo. Dank' al tio bone kreskis multaj specoj da legomoj. La grundo estas artefarita "kosma tero". La plantoj kreskantaj tie ne bezonas sterkon, insekticidon kaj sarkadon, sed sola akvumo jam sufiĉas por riĉa rikolto kaj la kreskado bezonas nur mallongan tempon. En 21 tagoj unu kvadrata metro da areo povas produkti 10 kg. da legomoj puraj kaj senbakteriaj. Laŭ informo, oni jam rikoltis la unuajn plantojn de la "kosmo".

DISVOLVIĜO DE "KULTIVEJA TIPO" AL LA "ĜARDENA"

En la 21-a jarcento la tero fariĝos pli kaj pli valora. Iuj agronomoj do planas tiam ŝanĝi la

kultivejojn en agrikulturajn ĝardenojn. Nun Nederlando kaj Japanio faras provon pri tio. Singapuro planas konstrui 10 agrikulturajn scienc-teknikajn ĝardenojn kun diversaj bestoj, plantoj, floroj kaj amuzejoj ene. En la ĝardenoj ne nur la administrado estos farata per la plej nova teknologio, sed ankaŭ diversaj ekipaĵoj havos artisman formon, ekz., fiŝbredejo konsistos el interkruciĝantaj "akvovojoj" rondaj aŭ ovalaj kaj unu metron profundaj. Ili estos provizitaj per sistemo de cirkula trakto por garantii, ke la fiŝoj vivos en bona ekologia medio. Ĉiu legomoĝardeno estos belforma plantejo kaj la nutro estos liverata per komputilo.


DISVOLVIĜO DE "KEMIIGO" AL "BIONTIKO"

En la moderna agrikulturo oni jam vaste uzas kemisterkon, insekticidon, diversspecajn hormonojn k.a. Oni povas diri, ke ĉiflanke oni jam eniris en la kemian epokon. Tamen, biologoj povos krei tute novan mondon por agrikulturo per biologia inĝenierado. Por la venonta reformado jam aperis kuraĝiga antaŭsigno:

Aplikante la teknikojn de ĉelunuiĝo kaj geno-rekombino, oni povas kultivi originalajn specojn altproduktajn, bonkvalitajn, efike kontraŭfrostajn, kontraŭsekecajn kaj kontraŭtoksinajn. Oni ankaŭ povas krei tute novajn plantospecojn.

Aplikante la teknikon de ĉelunuiĝo, oni povas transigi la azotfirmigan genon de radik-tuberaj bakterioj de la legumenacaj plantoj sur rizon, tritikon, maizon kaj aliajn, por ke la plantoj sterku sin per si mem.

Nun oni jam sukcese enkondukis homgenon en plantoĉelon, kio ebligas al la plantoj multe produkti bestajn albuminojn, same kiel la mambestoj, kaj havi eternan imunecon kontraŭ diver-




saj plantomalsanoj kaj fiinsektaj plagoj.

Pere de artefarita sinteza enzimo, kiu "maĉas" kaj "digestas" herbopulpon, oni sukcese produktis sintezan freŝan lakton. Fakuloj diris, ke en 2000 oni povos grandkvante produkti proteinojn en fabrikoj kun amina acido egala al tiu de fiŝo, viando kaj aliaj manĝaĵoj, pere de ŝanĝo de genoj de mikromolekulo kaj biokemia enzimo kaj rekombino de ribozo kaj nuklea acido.

Aplikante mikrobofermantan metodon, oni faros el malutilaĵoj proteinojn. Pere de "bioreakciatoro" oni povas krei proteinojn enmetante krudaĵon en unu ekstremon de la aparato kaj ricevi senĉese produkton el ĝia alia ekstremo.

Oni akiros manĝaĵojn pere de




fotosintezaj reaktoroj aŭ en grandiozafoliaj fabrikoj.

Aplikante la rimedon de "embria transplanto" kaj "grave-diĝo en alies utero", oni povas rapidigi kreskon de bonrasaj bestoj. Enmetinte la kreskan genon de granda besto en la

korpon de la malgranda, oni espereble elkulturos supergrandan beston. Sciencistoj asertis, ke en la venontaj 20 jaroj, estos eble elkulturi laktobovinojn 10 000 funtojn pezajn kaj porkojn 12 funtojn longajn kaj 5 funtojn altajn.

LOKOJ MENCIIATAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Tibeta Aŭtonoma Regiono
2. Ĝjaŝing
3. Ĉangĉun
4. Hubej-provinco
5. Ĝinŝji
6. Ŝanhajo
7. Ĉingdaŭ
8. Ĝjnan
9. Taj'an-gubernio
10. Ĉjufu-gubernio

KUPRAJ MINOJ MALKOVRITAJ EN LA MEZA KAJ MALSUPRA BASENOJ DE JANGZI-RIVERO

Ĉinaj geologoj antaŭ nelonge malkovris kvar grandajn kuprajn minojn en la meza kaj malsupra basenoj de Jangzi-rivero, en kiuj miksiĝas pluraj mineraloj, kiaj sulfuro, oro kaj arĝento. Ili estis urĝe bezonataj de Ĉinio kaj iuj el ili estas importitaj dum longa tempo. Laŭ la prospektoritaj rezervokvantoj oni konstatis, ke ili estas sufiĉaj por ekspluati inter 20 kaj pli ol 100 jaroj.

BEJCIANG-HAVENA ELEKTREJO EKKONSTRUATA

Bejciang-havena Elektrejo de Ĝeĝiang-provinco, grava konstruo de la Sepa Kvinjara Plano (1986-1990), komencis konstruiĝi januare de la nuna jaro. Kun totala generatora kapacito de 2.4 milionoj da kilovattoj, ĝi estas unu el la plej grandaj termoelektrejoj de Ĉinio. Laŭ takso, la unua generatora kompleto ekfunkcios en 1990. Post finkonstruiĝo la elektrejo ĉiujare povos produkti 7.8 miliardojn da kWh.

ROBOTO FARITA TUTE DE ĈINIO MEM

Lastatempe scienc-esploristoj de la Pekina Fera-Ŝtala Instituto sukcese faris la roboton "JG-1" kaj per tio plenigis la blankon de tekniko pri la

regada sistemo de industria roboto en Ĉinio. Laŭ ekspertizo, la roboto kapablas paroli kun homo kaj ĝiaj normoj atingis la nivelon de samspeca produkto de la mondo en la 80-aj jaroj.

ĈINA AGENTA SERVO POR ALILANDAJ ŜIPOJ EN DISVOLVIĜO

Dank' al la pordomalferma politiko al la aliaj landoj, rapide disvolviĝas la ĉina agenta servo por alilandaj oceanaŝipoj. En 1987 la Ĉina Agentia Kompanio pri Alilandaj Ŝipoj, kiu respondecas pri la agenta servo en oceana transportado, akceptis 37 536 alilandajn ŝipojn kun pli ol 140 milionoj da tunoj da kargo kaj 238 alilandajn turismajn ŝipojn.

VIGLIĜAS LA GRANDA KANALO DE ĈINIO

En la pasintaj naŭ jaroj, elspezinte grandan monsumon, Ĉinio reguligis la 600-kilometran parton de la Granda Kanalo de Pekino ĝis Hangĝoŭ sude de Jangzi-rivero. Dank' al tio la jara transporta kvanto de varo de la kanalo superis 120 milionojn da tunoj kaj la kanalo fariĝis granda transporta akvoĵojo post Jangzi-rivero. Ankaŭ la parto de la Granda Kanalo norde de Jangzi-rivero estas iagrade reguligita.

INTERNACIA KOMUNIKA RETO DE ĈINIO

Nun Ĉinio havas pli ol 2 300 rektajn

komunikajn lineojn kaj pli ol 900 telegrafajn lineojn, kiuj ligiĝas kun 44 landoj kaj regionoj kaj pliigis 17-oble kaj 4-oble respektive kompare kun tiuj en 1978. Nun en Ĉinio oni povas fari telefonan kaj telegrafan komunikon en konektado kun ĉiu ajn lando kaj regiono.

TELEVIDILO KUN GRANDA EKRANO FARITA EN ŜANHAJO

La unua kolora vidiga sistemo de Ĉinio, kiu havas ekranon de 80 kvadrataj metroj, altan helecon kaj plurajn funkciojn, estas farita en Ŝanhajo. Regate de polimikromaŝina tekniko, ĝi havas pli ol dek funkciojn, kiaj televidigo de reklamo akompane de muziko, televiziaj programoj kaj novaĵoj, bildoregistrado kaj filma projekciado kun skriba klarigo. La normoj de ĉefaj funkcioj kaj teknikoj atingis avangardan nivelon de samspeca produkto de aliaj landoj en la 80-aj jaroj.

"SKIZO PRI EKSTERAJ AFEROJ DE ĈINIO" ELDONITA

La aŭtoritata libro "Skizo pri Eksteraj Aferoj de Ĉinio", kiu konigas komplete kaj sisteme al en- kaj eksterlandaj legantoj la politikojn kaj praktikon de Ĉinio pri eksteraj aferoj, estas eldonita kaj distribuata de la eldonejo "Mondaj Aferoj" en Pekino.

PROF. LIŬ JOŬFANG HONORITA PER MONDA SCIENCA PREMIO

61-jara prof. Liŭ Joŭfang estas fama ĉina urinoĝo pri kombino de ĉin- kaj okcident-medicinoj sub la Ĉina Instituto de Ĉina Medicino. Li akiris rimarkindajn sukcesojn en kuracado de malfacile kuraceblaj malsanoj, kiaj virosterileco, prostata proliferado kaj impotenteco. Novembre de 1987, la Konsilantaro de Monda Kulturo donis al li mondan sciencon premion "Albert Einstein" de 1987.

69 MONDAJ ĈAMPIONECOJ GAJNITAJ DE ĈINIO EN 1987

En 1987 ĉinaj sportistoj gajnis 69 mondajn ĉampionecojn kaj rompis 19 mondajn rekordojn en gravaj konkursoj en- kaj eksterlandaj. La koncernaj

Prof. Liŭ Joŭfang (maldekstre) intervidiĝas kun japanaj gastoj en sia kabineto.



Tibeto — nedisigebla parto de la ĉina teritorio

de SIN ŬEN

Ĉinio kun multaj naciecoj estas granda unueca lando kune fondita de la 56 naciecoj, kiaj hana, tibeta, mongola kaj ujugura, en longtempa kunlaboro. Jam antaŭlonge komenciĝis la amikecaj kontaktoj inter la tibetanoj kaj la aliaj ĉinaj

naciecenoj.

En la 7-a jc., t.e. la komenca periodo de Tang-dinastio, la rilatoj inter la tibetanoj kaj hanoj fariĝis pli intimaj. En 641 la imperiestro Tajzong (599-649) edzinigis la principon Ŭenceng (?-

680) al Sunzamkampo (?-650), la reganto de Tubo-reĝimo. La principo kunportis multe da hanoj metiistoj al Tibeto, kiuj certgrade akcelis la progreson de la tiama tibeta ekonomio kaj kulturo.

sportobranĉoj estis tabloteniso, volanludo, plonĝo, gimnastiko, halterlevo, pafado, akrobatika gimnastiko, judo, naviga modelo, aviada modelo kaj arkopafado. Krome, 43 sportistoj 90-foje rompis aziajn rekordojn.

20 MILIONOJ DA HOMOJ KURACAS SIN PER ĈIGONG-EKZERCOJ

Laŭ statistiko farita de la Ĉina Instituto de Ĉigong-scienco antaŭ nelonge, la nombro de ĉigong-ekzercantoj por sanitarco kaj sinkuracado superis 20 milionojn. Nun en Ĉinio estas praktikataj ĉ. 20 specoj da ĉigong-ekzercoj.

Ok beboj naskitaj de Ĝang Ŝuŝjang

LA UNUA BALSALONO EN TIBETO

La unua balsalono kun modernaj instalaĵoj de la Tibeta Aŭtonoma Regiono ekfunkciis en la hotelo Sunlumo de Lhasa, la ĉefurbo de la regiono. La salono kun plankareo de 849 kvadrataj metroj estas provizita per rotaciaj lampoj, globaj lampoj, lasero, altklasaj muzikdonaj aparatoj k.a. Oni funkciigas ĝin kun la celo liveri amuzejon al alilandaj turistoj kaj gejunuloj de Lhasa.

TAJŜAN-MONTO AKCEPTITA KIEL HEREDAĴO DE LA MONDA NATURO

La fama ĉina Tajŝan-monto estis

akceptita de Unesko fine de 1987 kiel heredaĵo de la monda naturo. El la multaj naturaj heredaĵoj de Ĉinio ĝi estas la unua akceptita kiel tia heredaĵo.

LA PLEJ PROFUNDA LAGO DE ĈINIO


Lastatempe sciencistoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj faris esploradon pri Hanas-lago de la Ŝingĵang-a Ujugura Aŭtonoma Regiono en nordokcidenta Ĉinio. La esplorado montris, ke la lago kun longo de 24 km. kaj meznombra larĝo de 2 km. havas profundon de 188.5 metroj. Ĝi estas la plej profunda el la lagoj de Ĉinio.


RARA GRANDA BOAO

Antaŭ nelonge dekkelkaj vilaĝanoj trovis raran grandan boaron en primitiva arbaro de Hunan-provinco en la meza baseno de Jangzi-rivero. La boao estas longa 38 metrojn.

VILAĜANINO DE ĈANGĈUN NASKIS OK BEBOJN

Vilaĝanino Ĝang Ŝuŝjang de Ĉangĉun, Ĝjilin-provinco de nordorienta Ĉinio, naskis ok bebojn unufoje, kio estas rara en Ĉinio. Inter ili la plej granda pezas 350 gramojn kaj la plej malgranda nur 0.6 gramon. La ok beboj mortis sinsekve pro antaŭtempa nasko.





Nova placo antaŭ Daĝaŭ-templo

Ekde tiam Tibeto seninterrompe sendis siajn senditojn al Tang-kortego. Tio daŭris ĝis la pereado de la reĝimo Tubo.

En la mezo de la 9-a jarcento, interne de la regantaro de Tibeto okazis tumulto kaj dissplitiĝo. Religianoj murdis Landama, la reganton de Tubo-reĝimo. Post tiu tumulto Tibeto dissplitiĝis en multajn tribojn, kiuj ekspediciis unu al alia. La bataloj inter ili daŭris 400 jarojn (de la mezo de la 9-a jarcento ĝis la komenco de la 13-a jarcento).

En Jŭan-dinastio (1271-1368) finiĝis la 400-jara ĥaoso de Tibeto. En 1253 la mongola ĥano Mengge (1208-1259) sendis trupojn al Tibeto kaj ĝin unuigis. De tiam Tibeto fariĝis parto de la ĉina teritorio.

En la periodo de la 13-a ĝis la 18-a jc. la politika kaj religia sistemoj de Tibeto estis difinitaj de la tiama centra registaro de Ĉinio. La nuna sistemo "Kombiniĝo de politiko kaj religio" ja komenciĝis en 1275. Tiam la imperiestroj de Jŭan-dinastio sendis altrangan oficiston pri civilaj kaj militaj aferoj en Tibeton. Ĉiujare la centra registaro impostis al la

tibetanoj kaj akceptis iliajn tributojn. En Jŭan-dinastio la registaro establis tie poŝtajn staciojn kaj staciojn por vojaĝantoj kaj faris censon kaj ekzamendon al lokaj oficistoj.

Post la disfalo de Jŭan-dinastio falis ankaŭ la regado de la religia ĉefo de Saĝja-sekto de Tibeto. Kaj la ĉefo de Geĝju-sekto anstataŭis la antaŭan. La dua religia ĉefo de Geĝju-sekto Ĝjajang sendis sian delegiton al Nankino en 1372 por peti aŭdiencon de Ĝu Jŭangang (1328-1398), la unua imperiestro de Ming-dinastio. Li esprimis al la imperiestro gratulon pro la establiĝo de Ming-imperio kaj petis de li sankcion pri la regado de la religia reĝo de Geĝju-sekto en Tibeto.

Ĉe la dekadenciĝo de Ming-dinastio ankaŭ la regado de la religia reĝo de Geĝju-sekto ŝanceliĝis. En la jaro 1643 Dalaj la Kvina kaj Banĉen la Kvara de Getu-sekto renversis la regadon de la religia ĉefo de Geĝju-sekto en Tibeto, helpate de la fortoj de mongola tribestro Guŝhan. Tiam la gvidantaro kun Dalaj kiel la ĉefo ekregis la tutan Tibeton.

En 1652 Dalaj la Kvina persone venis al Pekino por respektplene


viziti la imperiestron de Ĉing-dinastio kaj peti de li sian nomumon. En 1653, kiam Dalaj la Kvina revenis al Tibeto, imperiestro Ŝunĝi (1638-1661) nomumis lin Dalaj-lamao. La nomo Dalaj-lamao estas difinita ekde tiam.

En la komenco de la 20-a jarcento imperiismaj kaj aliaj eksterlandaj reakciaj fortoj senbride konspiris por detranĉi Tibeton de la teritorio de Ĉinio. Sed la ĉina registaro ĉiam tenas la suverenecon de la loko.

En 1930 la tiama centra registaro de Ĉinio sendis oficistojn al Tibeto kaj en la sama jaro ankaŭ la tibeta registaro sendis sian reprezentanton al la tiama ĉefurbo Nankino kaj starigis oficejon de la loka registaro de Tibeto en la ĉefurbo.

La 17-an de decembro 1933, forpasis Dalaj-lamao la 13-a. La loka registaro de Tibeto laŭkutime faris raporton al la nankina centra registaro en la 1-a de januaro 1934. Kaj ankaŭ la nankina centra registaro sendis specialan senditon al Tibeto por funebro en aprilo 1934.

En printempo de 1951 la jam plenaĝa Dalaj-lamao la 14-a komencis sian regadon super Tibeto. Li sendis delegitojn de la loka registaro de Tibeto al Pekino por fari intertraktadon en februaro de la sama jaro. La 23-an de majo 1951, la "Interkonsento de la Centra Popola Registaro kaj la Loka Registaro de Tibeto pri la Rimedoj de la Paca Liberigo de Tibeto" estis oficiale subskribita en Pekino. La sekvantan tagon Dalaj-lamao telegrafis al prezidanto Maŭ Zedong esprimante, ke li estas lojala al la Centra Popola Registaro, ke loka registaro de Tibeto kaj la tibetaj budaistoj kaj laikoj unuanime subtenas la interkonsenton kaj ke li volonte helpas al la popola liberiga armeo eniri en Tibeton kaj defendi la landlimon. ■




Nova fizionomio de Lhasa

Vido en Lhasa

Fotoj de JAŬ ŬEN kaj TAŬ PENG


Parko en ferio





Antaŭ Potala-palaco


Ĉe Lhasa-rivero



La antikva altebenaĵa urbo Lhasa estis konstruita antaŭ 1 300 jaroj, post la geedziĝo de la tibeta reganto Sunzamkampo kaj la princino Ŭenĉeng de Tang-dinastio. Ŝia edziniĝo multe akcelis la ekonomian kaj kulturen interŝanĝon inter la tibetanoj kaj hanoj kaj la konstruadon de Lhasa. Sed pro multaj historiaj kialoj Lhasa progresis malrapide, kaj en 1951, en la urbo estis preskaŭ neniuj bonaj konstruaĵoj, krom Potala-palaco, kelkaj temploj kaj luksaj domoj de iuj aristokratoj kaj

Junulinoj lernas fremdan lingvon ĉe turisto





Tibetaj junulinoj en festa kostumo


komercistoj, kaj la popolo vivis en ekstrema malriĉeco. Tiam la urbo havis nur 3 kvadratajn kilometrojn kaj 30 000 loĝantojn.

La nuna Lhasa ricevis novan fizionomion. De sur Potala-palaco oni vidas multajn novajn domojn ĉu ĉe la antikva Baĝjaŭ-strato, ĉu ĉe la fora Lhasa-rivero. La stratoj estas puraj kaj ne mankas domoj por publikutilaj,

komercaj kaj kulturaj servoj. La areo de la urbo plivastiĝis al 25 kvadrataj kilometroj, kaj la nombro de la loĝantaro kreskis al 110 000.

La progreso de la ekonomio de Tibeto donis okupojn al urbanoj. Ili laboras en fabrikoj, aŭ komercas, aŭ servas en registaraj institucioj, aŭ instruas en lernejoj, kaj ĉiuj plibonigis sian vivon.

La movoplana Baĝjaŭ-strato



ĈINAJ POŝTMARKOJ

Drako

de LU DONG

Jam en Ĉing-dinastio (1644-1911) oni presis la figuron de drako sur poŝtmarkoj. La registaro de Ĉing-dinastio emisiis la poŝtmarkojn "Granda Drako" (la tri pecoj en la unua vico), la poŝtmarkojn "Malgranda Drako" (la tri pecoj en la dua vico) kaj la poŝtmarkojn "Kurbiĝanta Drako" (la ok pecoj dekstre kaj sube). Ili estas kuriozaj por filatelistoj. La maldekstra poŝtmarko estis emisiita en la 5-a de januaro 1988 por la draka jaro de Ĉinio. Ĝiaj desegno kaj koloroj portas tipan nacian guston.

Drako, kiu havas serpentan korpon, cervajn kornojn, aglajn ungojn, ĉevalan kapon, fiŝajn skvamojn kaj karpajn barbofadenojn, estas totemo de la prapatroj de la ĉina nacio. Imperiestroj de la feŭda Ĉinio prenis drakon kiel sian transformiĝinton kaj la ĉina popolo prenis ĝin kiel sian prapatron. Drako, kiel mita figuro, estas simbolo de la ĉina nacio.

